

Dr. FERENC SZILÁGYI



CON EJERCICIOS DE LECTURA E ILUSTRACIONES

Adaptado para el uso en los países de habla española por

JORGE HESS

SEGUNDA EDICIÓN

1970

Kun la afabla skriba  
permeso de la verkinto,  
eldonis:


Con permiso especial  
otorgado por el autor,  
editó:

**CLUB VENADENSE DE ESPERANTO**

(Con Personería Jurídica)

ESPERANTO-KLUBO DE VENADO TUERTO

Avda. Sarmiento 387 - Venado Tuerto - Prov. Santa Fe - (Argentina)



Dr. FERENC SZILÁGYI

# CURSO PRÁCTICO DE ESPERANTO



Jonathan Cole  
489 Toledo Street  
Aurora, CO, 80011

FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

CON EJERCICIOS DE LECTURA E ILUSTRACIONES

Adaptado para el uso en los países de habla española por

JORGE HESS

SEGUNDA EDICIÓN

1970

Kun la afabla skriba  
permeso de la verkinto,  
eldonis:

Con permiso especial  
otorgado por el autor,  
editó:

CLUB VENADENSE DE ESPERANTO

(Con Personería Jurídica)

ESPERANTO-KLUBO DE VENADO TUERTO

Avda. Sarmiento 387 - Venado Tuerto - Prov. Santa Fe - (Argentina)

4862



## Prefacio E Instrucciones

---

**E**STAS palabras van dirigidas particularmente a aquellos que desean aprender Esperanto sin maestro, por medio de este pequeño libro, cuya edición sueca ha sido seguida de adaptaciones para su uso en varios países. Esto último es motivo de gran satisfacción para mí, puesto que demuestra el éxito de mi trabajo predilecto.

En primer lugar, querido alumno, quiero rogarle que haga uso de su imaginación y trate de figurarse que yo, el profesor, estoy sentado con Ud. a la misma mesa. El profesor hace preguntas y Ud. contesta. Lea las preguntas **en voz alta** y contéstelas **en voz alta**. Además encontrará de mucha utilidad el escribir las respuestas. Esto no será difícil; bajo las ilustraciones encontrará modelos para las respuestas.

Segundo: el Esperanto tiene una gramática muy simple, y después de cada lección encontrará notas gramaticales con ejercicios para su traducción escrita.

Tercero: si en el curso de su estudio encuentra que ha olvidado algo ya visto en una lección anterior, recurra al vocabulario que se halla al final del libro. Precediendo al vocabulario hallará un sumario de prefijos y sufijos.

Y, finalmente: repase sus lecciones, y trate de reproducir, sin las preguntas, las historietas narradas por las ilustraciones. Hallará al Sr. Adamson muy servicial.

Por consiguiente: lea en voz alta, conteste en voz alta, escriba lo más que pueda y hable por su cuenta acerca de las historietas, haga uso del vocabulario.

El autor aprovecha la oportunidad para agradecer al Sr. Oscar Jacobsson, quien tuvo la amabilidad de permitirnos hacer uso de sus excelentes series de Adamson, lo mismo que al Sr. Christer Olrog, cuyos dibujos constituyen una característica esencial del libro, y otros amigos suecos, cuyos gentiles consejos y colaboración han aligerado notablemente el trabajo del autor.

El Autor.

## Pronunciación

1. En Esperanto cada letra tiene sólo un sonido.
2. Las vocales son 5: a, e, i, o, u, y suenan como en castellano.
3. Con excepción de las siguientes, las consonantes se pronuncian como en castellano:  
**c** suena "ts": **dancas** (pron. dantsas).  
**ĉ** como "ch": **ĉu** (chu).  
**ĝ** siempre suave: **ĝemo** (guemo).  
**ĝ** como "ll" o "y" rioplatense, o como "g" italiana en "giardino," o como "j" inglesa, en jockey.  
**h** siempre aspirada, como una "j" castellana, pero más suave.  
**ĥ** como nuestra "j": **ĥoro** (joro).  
**j** como "y" en rey, hoy, ya.  
**j** como "j" francesa en "journal."  
**ŝ** como "sh" en el nombre Shakespeare, o como "ch" francesa.

**ŭ** es la "u" breve de Europa, pauta, y se pronuncia junto a la vocal que la antecede.

**z** como "z" francesa o italiana, o como "s" en musgo, rasgo.

4. Las letras q, w, x, y, no existen en el alfabeto de Esperanto. Tampoco existen letras dobles, ni mudas.
5. El acento recae siempre sobre la penúltima sílaba. El número de vocales de una palabra indica el número de sílabas que la forman. En Esperanto el acento no se escribe, sólo se pronuncia; no existe tilde. **Papero**, unua, leciono. **La j** y la **ŭ** no se consideran vocales: **paperoj**, unuaj, lecionoj. Compare iam (2 sílabas), jam (1 sílaba) **belaj** (2 síl), **balai** (3 síl), **baldaŭ** (2 síl.) **balau** (3 síl.).

N.B. Los de habla española deberán recordar que el sonido de la **b** es muy distinto al de la **v**, y que en Esperanto deben diferenciarse perfectamente. La **r** es siempre suave.

# Unua (1-a) Leciono



La libro

Libro. La libro. Aŭtomobilo. La aŭtomobilo. Papero. La papero.



La sinjoro staras, la sinjorino sidas.

La sinjoro. La sinjorino. Sinjoro, sinjorino. La sinjoro staras, la sinjorino sidas.

Ĉu la sinjoro staras? Ĉu la sinjorino sidas? Ĉu la sinjoro sidas? Ĉu la sinjorino staras?

(Jes, la sinjoro staras . . . . Ne, la sinjoro ne sidas, la sinjoro staras . . . .) Ĉu la libro staras? Ĉu la aŭtomobilo staras?



Mi.



Vi.

Ĉu vi staras? Ĉu vi sidas?



Elefanto.

Hundo.



Ĉu la elefanto sidas? Ĉu la hundo sidas? Ĉu la radioaparato staras?



La sinjoro ne staras, la sinjoro iras.

Ĉu la sinjoro staras? Ĉu la elefanto iras? Ĉu vi iras? Ĉu la radioaparato iras? Ĉu la sinjorino iras?



La sinjoro, la sinjorino dancas.

Ĉu la sinjoro staras? Ĉu la sinjorino dancas? Ĉu vi dancas? Ĉu la elefanto dancas? Ĉu la radioaparato dancas?



Ĉu Chaplin sidas ? Ĉu Miki-muso staras ? Ĉu Greta Garbo dancas ? Ĉu Miki-muso sidas ? Ĉu Chaplin dancas ?



Ĉu vi dancas ? Ĉu li staras ? Ĉu ŝi dancas ? Ĉu ĝi dancas ? Ĉu la libro dancas ?



Li kuŝas.

Ĉu la libro kuŝas ? Ĉu vi kuŝas ? Ĉu Chaplin kuŝas ? Ĉu li dancas ? Ĉu Garbo dancas ? Ĉu ŝi kuŝas ? Ĉu Miki-muso sidas ? Ĉu ĝi kuŝas ?



Li flugas.

Ĉu la sinjoro staras ? Ĉu li kuŝas ? Ĉu la kanario flugas ? Ĉu mi flugas ? Ĉu vi, sinjoro (sinjorino), flugas ? Ĉu laflugmaŝino flugas ? Ĉu Chaplin flugas ?

Ĉu la lampo flugas ? (Ne, la lampo pendas.) Ĉu mi pendas ? Ĉu la libro pendas ? Ĉu la aŭtomobilo pendas ? Ĉu la papero pendas ?




Sur la elefanto.

Ĉu li staras ? Ĉu li sidas sur la lampo ? Ĉu li sidas sur la elefanto ?




Seĝo, tablo.



Lito.


Ĉu vi sidas sur la tablo ? Ĉu la libro kuŝas sur la seĝo ? Ĉu la radioaparato staras sur la seĝo ? Ĉu vi staras sur la seĝo ? Ĉu vi kuŝas sur la tablo ? Ĉu la libro kuŝas sur la lito ? Ĉu la bildo pendas sur la lampo ? Ĉu mi pendas sur la muro (La bildo pendas sur la muro.)



Adamson ne staras, li kuras.

Ĉu la hundo kuras ? Ĉu vi kuras ? Ĉu Adamson kuras post la hundo ? Ĉu vi kuras post la hundo ? Ĉu la hundo kuras post vi ? Ĉu la hundo kuras post mi ?





**La hundo pendas DE Adamson.**

Ĉu Adamson kuras? Ĉu la hundo pendas? Ĉu la hundo pendas de sinjoro Adamson? Ĉu sinjoro Adamson pendas sur la hundo?

Ĉu mi pendas? Ĉu mi sidas? Ĉu vi pendas? Ĉu vi staras? Ĉu sinjoro Adamson sidas? Ĉu sinjoro Adamson flugas? Ĉu la hundo iras post Adamson? Ĉu vi kuras post Adamson? Ĉu la hundo kuras post vi?



**Adamson falas.**

Ĉu Adamson pendas? Ĉu la hundo falas? Ĉu vi falas? Ĉu la libro falas?



Ĉu la hundo kuras? Ĉu Adamson kuŝas? Ĉu la hundo iras? Ĉu vi iras? Ĉu Adamson dancas?

**Ŝi trinkas.**

**Li manĝas.**



Ĉu ŝi trinkas? Ĉu vi trinkas? Ĉu la sinjoro trinkas? Ĉu vi manĝas?



**Kiu?**



**Kio?**

*Kiu* staras? La sinjoro staras. *Kio* staras? La seĝo staras. *Kio* sidas?

Kiu pendas? (Adamson.) Kio pendas su. Adamson? Kiu falas? Kio falas? Kiu kuŝas sur la lito? Kio kuŝas sur la tablo? Kio kuras post Adamson? Post kiu kuras la hundo? Kiu sidas?



Li kuŝas  
en la  
krokodilo.

Ĉu la krokodilo manĝas? Ĉu la sinjoro sidas en la krokodilo? Kiu kuŝas en la krokodilo? Ĉu vi sidas en aŭtomobilo? Ĉu vi sidas en flugmaŝino? Ĉu la bildo pendas en la aŭtomobilo? Kiu kuŝas sur la lito? Kiu sidas sur la seĝo? Kio kuŝas sur la tablo? Kiu sidas en la aŭtomobilo? Ĉu la bildo staras sur la tablo. (Ne, ĝi pendas sur la muro.)



Li  
amas.

Ĉu la sinjoro trinkas? Kiu amas?  
Ĉu vi amas? Ĉu li amas?



Li kisas.  
Ŝi kisas.

Ĉu li manĝas? Kiu kisas? Ĉu ŝi kisas? Ĉu vi kisas?



La kato miaŭas.

Ĉu la kato miaŭas? Kio miaŭas?  
Ĉu la kato manĝas?



La hundo  
bojas. Li  
muzikas.



Ĉu la hundo miaŭas? Kio bojas? Ĉu la sinjoro miaŭas? Kiu muzikas? Ĉu la kato bojas? Ĉu vi miaŭas?

Vi ne miaŭas, vi ne bojas, vi parolas.

Ĉu vi parolas? Kiu parolas? Ĉu la hundo parolas? Ĉu la kato parolas?



Adiaŭ!

## Notas

1. El sustantivo (el nombre de las cosas) nos dice **qué cosa** es algo o alguien. En Esperanto el sustantivo termina en **o**: elefanto, hundo, sinjoro, sinjorino, klaso.
2. **La** es el artículo determinante: **libro**—un libro, **la libro**—el libro, **la sinjoro**—el señor, **la sinjorino**—la señora. En Esperanto no hay artículo indefinido (un, una, unos, unas).
3. El **verbo** indica lo que algo o alguien hace o siente. Cuando la acción es en el presente, el verbo termina en **as** en Esperanto. Y esta terminación no varía según las personas: manĝas, como, comes, come, comemos, coméis, comen.
4. **Stari**—estar de pie, parado.
5. **Sidi**—estar sentado, posado.
6. El sufijo **-ino** señala el femenino: sinjorino, artistino.
7. **Ĉu** (¿Dígame Ud . . . : forma las frases interrogativas, y reemplaza el signo ¿ del español: **Ĉu** la sinjoro staras? ¿El señor está de pié? **Ĉu** la hundo dancas? ¿Baila el perro?
8. **Jes**—sí. **Ne**—no.
9. **Mi**—yo, **vi**—tú (usted), **li**—él, **ŝi**—ella, **ĝi**—ello (neutro).
10. En español hay sustantivos masculinos y femeninos, como (el) libro y (la) mesa; en Esperanto sólo se indica el sexo en el nombre, cuando éste evidentemente lo exprese—ser humano y animales. Los demás nombres, por consiguiente, serán neutros: **libro, tablo**, o reemplazados por el pronombre neutro **ĝi**.
11. **Kiu**—quién, **kio**—qué (cosa).
12. **Iras**—va, anda.

### Traduzca al Esperanto :

La imagen pende. El está sentado en (sobre) la silla. El libro yace sobre la mesa. Un señor va (anda). El señor va. La señora habla. Yo no bebo. ¿Quién habla? ¿Quién está sentado? ¿Quién come? ¿Quién bebe? ¿Quién va? ¿Qué yace? ¿Qué pende? ¿(Es que) Adamson pende? ¿Hablo yo? ¿Está Ud. de pie sobre la mesa? ¿Está él sentado sobre la silla? ¿(Es que) Corro yo? ¿(Es que) el libro está (acostado) en el automóvil?

### Traduzca :

- 1.- ¿Quién esta sentado ?
- 2.- ¿ En qué (sobre qué cosa) está sentada la señora?
- 3.- El elefante está acostado sobre la cama.-

## Dua (2a) Leciono



Li skribas.


Ĉu li manĝas? Kiu skribas? Ĉu vi skribas? Ĉu vi skribas sur la lampo? Sur kio vi skribas? Mi skribas sur papero.



Ŝi legas.

Kiu skribas? Kiu legas? Ĉu vi egas?

*mi estas*



D-ro Francisko Szilágyi, Budapest.

Ĉu vi estas Doktoro Szilágyi? (Pr. Sila dji.)




La instruisto. La lernanto.

Ĉu la instruisto estas doktoro Szilágyi? Kiu vi estas? Kiu mi estas? Kiu estas instruisto? Kiu mi estas? Kiu estas instruisto? Kiu estas lernanto?



Homo — homo.

Ĉu vi estas instruisto? Ĉu vi estas instruistino? Kiu estas instruistino? Kiu estas lernantino? Kiu estas homo? (Mi estas homo.) Ĉu la instruisto estas homo? Ĉu la poeto estas homo?



Besto — besto.

Kio estas la elefanto? (La elefanto estas besto.) Ĉu la hundo estas besto? Kio estas la kato? Kio estas la instruisto?

Objekto.



Kio estas la libro? (La libro estas objekto.) Ĉu la lampo estas objekto? Ĉu vi estas objekto? Kio vi estas? Ĉu la instruisto estas objekto? Ĉu la kato estas objekto?



**Granda elefanto.**  
**Malgranda kato.**

Ĉu London estas granda? Ĉu la kato estas granda? Kio estas malgranda? Kio estas granda?



**La malgranda homo (infano) ploras.**

Ĉu vi estas infano? Ĉu la infano ploras? Kiu ploras? Ĉu vi ploras?



**La sinjoro estas riĉa, li ridas.**

Kiu ridas? Ĉu vi ridas? Ĉu la sinjoro ploras? Kiu ploras? Kiu ridas? Ĉu la sinjoro estas riĉa? Ĉu vi estas riĉa? Kiu estas riĉa? Ĉu la riĉa homo ridas? Kiu estas malriĉa?

\_\_\_\_\_ **Longa.**

\_\_\_\_\_ **Mallonga.**

Ĉu la muro estas longa? Kio estas longa? Ĉu kilometro estas longa? Kio estas granda? Ĉu la tablo estas longa? Kio estas mallonga?



**Bona ĉokolado.**

**Malbona ricino.**

Ĉu la ĉokolado estas bona? Ĉu vi estas bona lernanto? Kio estas bona? Kio estas bona besto? Ĉu la ricino estas bona? Ĉu Esperanto estas bona? Kiu estas bona?

**Bela sinjorino**



**Malbela sinjoro.**



Ĉu ŝi estas bela? Kiu estas bela? Ĉu Stockholm estas bela? Kio estas bela? Ĉu la sinjoro estas bela? Kiu estas malbela? Ĉu la muziko estas bela? Kio estas bela? Ĉu la gorilo estas bela? Kio estas malbela? Ĉu la hundo bojas? Ĉu la hundbojo estas bela? Ĉu la kato miaŭas? Ĉu la katmiaŭo estas bela?

**Alta.**



**Longa.**


Ĉu vi estas longa? Ĉu vi estas alta? Ĉu la muro estas alta? Kiu estas alta? Kiu estas malalta? Kio estas alta? Kio estas malalta? Ĉu la seĝo estas alta? Ĉu la muro estas mallonga? Ĉu ĝi estas malalta?



①

**Adamson sidas sur la ŝtono.**

Kiu sidas? Ĉu sinjoro Adamson sidas sur seĝo? Ĉu la ŝtono estas granda? Ĉu la ŝtono estas mola? Ĉu vi sidas sur malmola ŝtono? Kiu sidas sur la malmola ŝtono? Kiu sidas sur la seĝo?



②

**La leporo venas. Adamson dormas.**


Ĉu Adamson kuŝas sur la lito? Ĉu Adamson dormas sur la lito? Ĉu la lito estas mola? Ĉu la leporo iras? (Ne, la leporo venas.) Kiu venas? Ĉu la leporo estas homo? Ĉu ĝi estas granda besto?



③

**Adamson ne dormas. Li rigardas. La leporo rigardas. Adamson miras.**

Kio pendas? Ĉu Adamson dormas? Ĉu Adamson rigardas? Ĉu la leporo rigardas? Kiu rigardas? Kio rigardas? Ĉu Adamson miras? Kiu miras? Ĉu vi rigardas?



④

**La leporo ne iras, ĝi restas.**

Ĉu Adamson venas? Kiu iras? Ĉu la leporo iras? Kio sidas? Ĉu Adamson sidas sur la ŝtono? Ĉu sur la ŝtono estas homo? Kiu sidas sur la ŝtono? (Neniu.) Ĉu la leporo iras? (Ne, la leporo restas.) Ĉu vi iras? Ĉu vi restas? Kiu restas? Kio restas?

## Notas

1. **Estas**—es, está, soy, estoy, etc., traduce los verbos ser y estar.
2. El sufijo **-isto** señala la persona que ejecuta una acción habitualmente o por profesión: **instruisto**—maestro, **institutor**, **artista**—artista. La terminación **-anto** señala la persona que ejecuta una acción temporal: **Lernanto**—alumno, aprendiz.
3. **Homo**—ser humano, sin consideración de sexo o edad, hombre en sentido general.
4. **El adjetivo** (palabra descriptiva) es la palabra que califica el nombre (sustantivo), nos dice cómo es la cosa: grande, chica, fea, linda. En Esperanto todos los adjetivos terminan en **a**: **bona**—bueno-a, **bela**—bello-a, **riĉa**—rico-a, **granda**—grande. En Esperanto el adjetivo no tiene sexo: **bela sinjoro**, **bela sinjorino**.
5. El prefijo **mal-** indica lo contrario a lo expresado por la raíz de la palabra: **granda**—grande, **malgranda**—pequeño, **bona**—bueno, **malbona**—malo, **riĉa**—rico, **malriĉa**—pobre. No confundir **mal-** (contrario) con **ne** (simple negación): **malriĉa**—pobre, **ne riĉa**—no rico; **utila**—útil, **malutila**—perjudicial, **neutila**—inútil.
6. **Kiu** también significa **qué** cuando va seguido por un nombre: **kiu libro?**—¿Qué libro?
7. **Hundbojo**—ladrido de perro. Si quitamos la terminación **-as** de la palabra **bojas**, nos queda la raíz **boj'**. A ésta podemos agregar la terminación del sustantivo **-o**, obteniendo así **bojo**—un ladrido (nombre del acto de ladrar). Del mismo modo, de **miaŭas**—maulla, derivamos **maiŭo**—maullido (acto de maullar), y de **dormas**—duerme, duermo, etc., **dormo**—sueño (acto de dormir).
8. **Neniu**—nadie, ninguno-a.

### Traduzca al Esperanto:

El mal alumno duerme. Sobre el lecho está acostado (yace) el bello gato. El niño malo llora. ¿Se ríe Ud.? ¿Qué muro es largo? Yo soy un buen alumno: (yo) leo. El hombre rico está sentado sobre una silla: (él) escribe. Me admiro: la liebre cuelga. ¿Quién está sentado sobre la piedra dura? El libro largo está (yace) sobre la piedra grande.

### Traduzca:

- 1.- El elefante es un animal grande.
- 2.- Yo no soy rico.
- 3.- ¿Es usted un buen alumno?
- 4.- Sobre la silla hay un tomate (tomato).
- 5.- Adamson está sentado sobre la silla.
- 6.- El tomate es blando.

## Tria (3-a) Leciono



La fiŝo naĝas  
en la akvo.

Ĉu la fiŝo naĝas en vino? Ĉu vi sidas en akvo? En kio naĝas la fiŝo? Ĉu vi naĝas? Ĉu la naĝo estas sporto? Ĉu la akvo estas varma? Ĉu la kafo estas bona? Ĉu vi naĝas en *varma* akvo? Kio naĝas en malvarma akvo?

Ĉu ni dormas? (Ne, ni *lernas*.) Ĉu la instruisto lernas? (Ne, la instruisto *instruas*.) Ĉu ni sidas? Kiu instruas? Kiu lernas? Ĉu ni sidas sur la *planko*?

Ni = mi + vi.

Ĉu *ili* dancas? Ĉu *ili* manĝas? Ĉu ni parolas? Ĉu *ili* sidas? Ĉu *ili* parolas?

Li, ŝi, ĝi (singularo).

Ili (pluralo)



2 (du) sinjorinoj.  
Ili parolas.

Ĉu 1 (unu) sinjorino parolas?

Ne, *du* sinjorinoj parolas.

Ĉu la bestoj parolas? Ĉu sur la tablo estas *libroj*? Ĉu la papero, kuŝas sur la seĝo?

Kiu parolas? Sinjoro parolas.


Kiuj parolas? Sinjoroj parolas.  
Sinjorinoj parolas.

1, 2, 3, 4, 5 = unu, du, tri, kvar, kvin.

Ĉu kvin libroj kuŝas sur la tablo? Ĉu kvar seĝoj staras sur la planko? Ĉu tri sinjoroj lernas? Ĉu du bildoj pendas sur la muro?

La libro kuŝas sur la tablo. La seĝo staras sur la planko. Mi sidas sur la seĝo. La bildo pendas sur la muro.

Kie kuŝas la libro? (*Sur* la tablo.) Kie staras la seĝo? Kie vi sidas? Kie naĝas la fiŝo? Kie dormas Adamson? Kie vi dormas? Kie vi skribas?



Blanka.

Nigra.

Ĉu la sinjoro estas blanka? Ĉu la papero estas blanka? Kiu estas blanka? Kiu estas nigra? Kio estas nigra? Ĉu la sinjoro estas nigra? Kie estas la nigra libro?

Ĉu la ĉokolado estas blanka? (La ĉokolado estas *bruna*.) Ĉu la seĝo estas bruna? Ĉu vi estas bruna? Kiu estas bruna? Kio estas bruna? Ĉu la tablo estas blanka?

Ĉu la elefanto estas blanka? (Ne, *griza*.) Ĉu vi estas griza? Ĉu la tablo estas griza? Kio estas griza? Ĉu la muro estas griza?



Ĉu la kanario estas griza? (Ne, ĝi estas *flava*.) Ĉu la floro estas flava? Ĉu vi estas flava? Ĉu la papero estas flava? Ĉu la japanoj estas flavaj? Ĉu la svedoj estas blankaj? Ĉu ili estas *blondaj*? Ĉu vi estas blonda? Kiu estas blonda? Ĉu Greta Garbo estas bruna? Ĉu Norma Shearer estas nigra? Kiu estas flava?



Domo.


Ĉu la domo estas flava? Ĉu vi estas ruĝa? Ĉu Ruslando estas ruĝa? Ĉu la aŭtobuso estas ruĝa? Kio estas ruĝa? Ĉu la kanario estas ruĝa? Kie estas la libro? Kie kuŝas la blanka papero?

Kio estas blua? Ĉu la muro estas blua? Ĉu la elefanto estas blua? Ĉu la ĉokolado estas blua?




Stelo.

Kie estas la steloj? (Sur la *ĉielo*.) Kie estas la verda stelo? (Sur la esperantisto.) Ĉu vi estas perfekta esperantisto? Kiu estas perfekta esperantisto? Ĉu la libro estas verda? Ĉu la muro estas verda? Kio estas verda? Kio estas blua? Kio estas bruna? Kio estas nigra? Kio estas blanka? Kio estas griza? Kio estas ruĝa? Ĉu la ĉielo estas nigra? Ĉu la blua ĉielo estas granda



Nigraj—libroj.

Ĉu ili estas blankaj homoj? Kiu estas blankaj homoj? Ĉu la negroj estas flavaj homoj? Ĉu en Svedlando estas belaj sinjorinoj? Ĉu la griza elefantoj estas grandaj? Ĉu la muso estas ruĝaj?



Maljuna

Juna.

Ĉu vi estas juna? Ĉu la junaj homoj amas? Kiu amas? Kiu estas maljuna? Ĉu Deanna Durbin estas maljuna?



Li amas ŝin.

La juna homo amas kaj parolas (*diras*):

Fraŭlino, mi amas vin! Ĉu vi amas min?

La fraŭlino diras: Jes, mi amas vin! (Ili amas.)

La sinjoro amas ŝin. La fraŭlino amas lin. Ili estas feliĉaj. La feliĉa homo ridas, la malfeliĉa homo ploras.




Li kisas ŝin.  
ŝi kisas lin.

Ĉu la sinjoro kisas *min*? Ĉu li kisas ŝin? Ĉu vi rigardas *min*? Ĉu la sinjoro rigardas *min*? Kiu instruas vin?



La malbona homo batas *ĝin*.

Ĉu *ĝi* estas bona homo? Ĉu la hundo ridas? Ĉu la malbona homo manĝas *ĝin*? Kiu batas *ĝin*? Kiu venas?



Ĉu Adamson estas bona homo? Adamson iras? Kiu kuras post  
Ĉu la hundo estas bora? Ĉu Adamson? Ĉu la hundo kuras post

Mi.....Min  
Vi.....Vin  
Li.....Lin  
Ŝi.....Ŝin  
Ĝi.....Ĝin  
Ni.....Nin  
Vi.....Vin  
Ili.....Ilin



Adamson batas *lin*.

Ĉu la malbona homo batas? Ĉu Adamson estas bona homo? Ĉu Adamson batas *ĝin*? Kiu batas *lin*? Ĉu la hundo bojas? Ĉu la hundo rigardas *ilin*? Kio rigardas *ilin*? Ĉu la malbona homo batas? Kiu estas bona?

la kato? Ĉu la kato kuras post la muso? Ĉu Adamson ridas? Ĉu Adamson estas feliĉa? Ĉu la hundo amas lin? (Ne, la hundo malamas lin.)

Adamson kuras. Ĉu la hundo kuras? Ĉu Adamson *kaj* la hundo kuras? Ili kuras, *sed* la malbona homo sidas.

Ĉu vi sidas sur la planko? Ĉu la seĝo estas sur vi? (Ne, la seĝo estas *sub* vi.) Kio estas sub la libro?

Ĉu Esperanto estas bona? Kiu lernas ĝin? Ĉu la ruĝaj domoj estas belaj? Ĉu vi rigardas ilin? Ĉu la bifsteko estas bona? Ĉu vi trinkas ĝin? Ĉu la fraŭlino estas bela? Ĉu vi amas ŝin? Ĉu la lernanto estas bona? Kiu instruas lin? Kiu instruas vin? Ĉu la Adamson-bildoj estas interesaj? Ĉu vi rigardas ilin?

Sinjoro, sinjorino, mi diras:

*Adiaŭ! Ĝis revido!*

## Notas

1. **unu, du, tri, kvar, kvin**—1, 2, 3, 4, 5. La pronunciación de **kvar, kvin** no es difícil: mantenga los dientes y la lengua en posición de pronunciar la **v** mientras emite el sonido **k**.
2. El plural (más de uno) se forma añadiendo al nombre la terminación **j** (recuerde que **oj** se pronuncia como **hoy**). **Libro**—un libro, **libroj**—unos libros. El único artículo en Esperanto (**la**) no varía, no lleva **j** de plural.
3. Cuando el sustantivo está en plural, el adjetivo también toma la **j** final: **Flava seĝo**—(una) silla amarilla, **flavaj seĝoj**—(unas) sillas amarillas. Recuerde que la **j** no agrega sílaba a la palabra, y que el acento no cambia de lugar: **seĝo, seĝoj**.
4. **Kie** ?—¿ Dónde ?
5. **Ni**—nosotros, **ili**—ellos, ellas, **vi**—tú, usted, ustedes, **vosotros** (una o varias personas, como en inglés y francés).
6. **Kiuj**—quienes.
7. **Mi**—yo, **min**—me; **vi**—tú, **vin**—te; **li**—él, **lin**—lo; **ŝi**—ella, **ŝin**—la; **ĝi**—ello, **ĝin**—lo; **ni**—nosotros, **nin**—nos; **vi**—vosotros, **vin**—os; **ili**—ellos-as, **ilin**—los, las.  
**Li amas ŝin**—él la ama, **ŝi amas lin**—ella lo ama. **Ili amas min**

- ellos me aman, **mi amas ilin**—yo los amo. **Ni amas lin**—nosotros lo amamos, **li amas nin**—él nos ama. En español las palabras (pronombres) **yo, tú, él, nosotros, vosotros, ellos**, indican al actor de una acción (sujeto), mientras **me, te, lo, nos, os**, los indican al que recibe la acción. En Esperanto basta añadir al simple pronombre (**mi, li**, etc.) la terminación **n** para señalar el receptor de la acción (complemento directo).
8. De las palabras con la terminación **n** se dice que están en caso acusativo, y de las mismas sin la **n**, que están en caso nominativo.
  9. **Kaj**—y, é. **Sed**—pero, mas, sino. **Sub**—debajo.
  10. **Ĝis revido**—Hasta la vista.

## Traduzca al Esperanto:

El maestro enseña. En la casa hay (estas) cinco señores y dos señoras y tres niños. (Ellos) son buenas personas. El gato negro la golpea (a ella). Ella lo golpea (a él). Adamson la mira. Ella va detrás de él. Bajo el cielo azul hay casas rojas y bellas flores. El chocolate es marrón y bueno. El elefante gris es grande. La estrella verde no está en (sur) el cielo, sino (sed) sobre los esperantistas. ¿Quién es Ud.? ¿Qué hay sobre la mesa? ¿Dónde está el libro?

## T a r e a :

- 1.—Conteste en Esperanto las preguntas del primer párrafo de la Tria (3-a) leciono, "La fiŝo naĝas en la akvo."

## Kvara (4-a) Leciono



**Ĉambro.**  
**Fenestro.**  
**Plafono.**  
**Planko.**  
**Pordo.**

Kie ni sidas? Ni sidas en la ĉambro.

Kie estas la seĝoj? Kie estas la planko? Kie estas la ĉambro? (En la domo.) Kie estas la domo? Ĉu la fenestro estas granda? Kie estas la seĝo. (Sur la planko.) Kie pendas la lampo? (Sur la plafono.) Ĉu la pordo estas ruĝa?



**Forta.**

Ĉu la sinjoro estas forta? Ĉu vi estas forta? Ĉu la atletoj estas fortaj? Ĉu la muso estas forta besto?

Kiu vi estas? (Mi estas sinjoro A., sinjorino B..)

Kio vi estas? (Mi estas lernanto, lernantino.)

Kia vi estas? (Mi estas juna, forta.)

Kia la tablo estas? Kia la elefanto estas? Kia la muso estas? Kia la ĉokolado estas? Kia la ĉambro estas? Kia Adamson estas? Kia la ĉielo estas? Kiaj la atletoj estas? Kia estas Esperanto?



**Edzo.**  
**Edzino.**

Ĉu la sinjoro estas granda? Kia li estas? Kia estas la sinjorino? Ĉu la sinjoro estas *edzo*? Kiu estas la edzino? Ĉu vi estas edzo? Kie sidas la sinjoro? Ĉu la edzino sidas? Ĉu ŝi estas bela? Kia ŝi estas? Ĉu la sinjoro skribas? Kiu legas?



**Li kuiras**  
**en la**  
**kuirejo.**

Ĉu la edzo legas? (Ne, li ne legas, sed li kuiras.)

Ĉu vi kuiras? Kiu kuiras? Ĉu li kuiras en la ĉambro? Ĉu vi lernas en la kuirejo? Kie li kuiras?

Ĉu la sinjoro telefonas en la kuirejo? (Ne, sed en la telefonejo.)



**Telefonejo.**

Ĉu la homoj dancas en la telefonejo? (Ne, sed en la dancejo.)

Cu la atletoj kuras en la sportejo ?  
Cu la infanoj lernas en la kuirejo ?  
(Ne, sed en la lernejo.)

Kie la homoj kuiras ? Kie la infanoj lernas ? Kie vi telefonas ? Kie vi dancas ? Cu vi sidas en la kafejo ? Kie vi sidas ? Kiu kuiras en la kuirejo ?



Li estas malbona kuiristo.

Cu la instruisto lernas ? Kiu instruas ? Cu la kuiristo instruas ? (Ne, sed li kuiras.) Cu la sinjoro estas bona kuiristo ?



Kiu venas ? Kia estas la edzino ? Cu ŝi estas feliĉa ?



El la domo.

Cu la sinjoro kuiras en la kuirejo ? Kiu flugas el la kuirejo ? Kia estas la domo ? Cu la sinjorino estas forta ? Kia estas la edzo ? Kiu restas en la kuirejo ?

Cu la sinjoro flugas ? Cu la kanario flugas ? Cu la sinjoro estas kanario ?

Li ne estas kanario, tamen li flugas.  
Cu vi komprenas min ? Cu vi estas perfekta esperantisto ? Cu vi tamen komprenas min ?



Li fumas.

Kiu fumas ? Cu vi fumas ?



Cu li manĝas ŝin ? Kiu kisas ŝin ?

Li kisas ŝin — Li : la sinjoro. La sinjoro kisas ŝin.

Ŝi — la sinjorino, la fraŭlino (= ne edzino, juna sinjorino). Ŝin, sinjorinon, fraŭlinon.

Li kisas ŝin — La sinjoro kisas la sinjorinon (fraŭlinon).




Adamson sidas kaj fumas. La papilio sidas sur la fraŭlino.

Kiuj sidas? Kia estas la fraŭlino? Kia estas la benko? Ĉu la granda fraŭlino skribas? Ĉu Adamson estas granda? Kia li estas? Ĉu Adamson legas? Kiu fumas? Ĉu la granda fraŭlino fumas? Ĉu vi fumas? Kia estas la kato? Ĉu la kato estas blanka? Ĉu la kato iras? Kio sidas sur la fraŭlino? Ĉu la papilio estas granda? Ĉu ĝi estas bela? Kia la papilio estas? Ĉu Adamson estas juna? Kie ili sidas? (Sur la benko.)



**La kato batas la fraŭlinon.**

Ĉu la kato batas la papilion? Ĉu la libro kuŝas? Ĉu la papilio falas? Kio batas la fraŭlinon? Ĉu Adamson batas la fraŭlinon?



**La forta fraŭlino rigardas.**

Ĉu la forta fraŭlino rigardas la katon? Ĉu la forta fraŭlino rigardas sinjoron Adamson? Kiu rigardas vin?



**La kato sidas sub la benko. La cigaro falas.**

Ĉu la forta fraŭlino kisas sinjoron Adamson? Kie estas la nigra kato? (Ĝi estas sub la benko.) Ĉu la tablo staras sub la lampo? Kie staras la tablo? Sub kio estas la nigra kato? Kiu batas sinjoron Adamson? Kiun batas la forta fraŭlino?

Mi amas  
fraŭlinon,  
mi ŝatas  
ĉokoladon,  
libron...



Ĉu vi amas fraŭlinon? Kiun vi amas? Ĉu vi ŝatas ĉokoladon? Ĉu vi ŝatas muzikon? Ĉu la hundo amas la katon? Ĉu vi ŝatas katon? Ĉu vi ŝatas aŭtomobilon?

Ĉu vi ŝatas floron? Kia estas la floro? Ĉu la banano estas bona? Kion vi amas?



La riĉa homo havas domon, aŭtomobilon, diamantringon kaj monon. Ĉu vi havas diamanton? Ĉu vi estas riĉa? Kia vi estas? Ĉu vi havas libron? Kiu havas monon? Ĉu vi havas kuirejon? Ĉu vi havas edzinon?



### Pomo. Piro.

Ĉu vi manĝas bifstekon? Ĉu vi ŝatas bifstekon? Ĉu vi manĝas ĉokoladon? Ĉu vi ŝatas bananon? Ĉu la kato estas frukto? Ĉu la pomo estas bona frukto? Ĉu vi ŝatas piron? Kia estas la piro?

La ĉokolado, la piro, la banano estas *dolĉa*. La citrono estas *acida*.

**Acida citrono, acidaj citronoj. Acidan citronon, acidajn citronojn.**

Ĉu vi havas esperantajn librojn? Ĉu vi rigardas bonajn filmojn?



### Kelkaj.

### Multaj.

Ĉu vi havas kelkajn librojn? Kiu havas multajn domojn? Ĉu vi ŝatas multajn florojn en la ĉambro? Ĉu vi ŝatas belajn florojn sur la tablo? Ĉu vi havas multajn ĉambrojn?

La elefanto staras.



Ankaŭ la hundo staras.



Ĉu la elefanto staras? Ĉu ankaŭ la hundo staras? Ĉu la hundo estas besto? Ĉu ankaŭ la muso estas besto?

### Mallonga historio.

Adamo kaj Evo ne estas homoj. La homoj manĝas, trinkas, iras, ridas, ploras, sed Adamo kaj Evo *jam ne* manĝas, trinkas, iras, ploras, ridas. Ili *jam ne* estas homoj, sed ili estis homoj. Ili ne manĝas, trinkas, sed ili manĝis, trinkis.

Arbo.



Ĉu vi sidas en la ĉambro? Ĉu Adamo sidis en la ĉambro? Kie estis Adamo kaj Evo? Ili estis en la paradizo. Ĉu vi estas en la paradizo? Kie vi estas? Kio estis la paradizo? Ĝi estis granda *ĝardeno*. Ĉu en la paradizo estis multaj floroj kaj arboj? Kio pendas sur la arboj? Kie sidis Adamo kaj Evo? Ili sidis sur la *tero* sub la arbo. Vi manĝas bifstekon, ĉokoladon. Ĉu Adamo manĝis bifstekon, ĉokoladon? Kion li manĝis? Ĉu li estis vegetarano? Ĉu vi estas vegetarano? Ĉu vi trinkas kafon, teon, vinon, bieron? Ĉu Adamo trinkis kafon, teon, bieron? Kion li trinkis?



Ĉu vi havas radioaparaton? Ĉu Adamo havis radioaparaton? Ĉu li havis telefonon? Ĉu li havis aŭtomobilon? Ĉu la serpento parolis en la paradizo?

La serpento diris: Evo, manĝu pomon.

Ĉu Evo manĝis pomon? Ĉu ŝi ŝatis la pomon?



Adamo kaj  
Evo estis  
malbonaj.  
La anĝelo  
parolis:  
Iru el la  
paradizo!

La anĝelo diris:

Adamo kaj Evo, vi estas malbonaj homoj! Iru el la paradizo!

Kaj ili estis tre melankoliaj, ili ploris kaj ili iris el la bela paradizo.

Ĉu vi bone komprenis la historion?

Sinjoro, sinjorino, (fraŭlino), lernu, legu, skribu, parolu Esperanton! Estu perfekta esperantisto.

Bonan nokton!



### T r a d u z c a :

- 1.- Malkuraĝa, malforta, malkontenta, ludejo, ĉevalejo, lavejo.
- 2.- Mi vidis la nigran katon, kiu kuŝis sub la benko.
- 3.- La historio estas facila, tamen mi ne komprenas ĝin.
- 4.- Skribu klare ! Parolu elegante!

## Notas

1. **Kiu**—quien, cual, **kio**—que (cosa), **kie**—donde, **kia**—que (clase de), que aspecto. **Kia**?—Blanka, bela.
2. El sufijo—**ejo** indica el lugar destinado a un fin especial: **Li kuiras**—él cocina, **kuirejo**—cocina (lugar destinada a cocinar), **la infano lernas**—el niño aprende, **la lernejo**—la escuela. **Kafo**—café, **kafejo**—un café (comercio), **telefonejo**, **dancejo**, etc.
3. **Sed**—pero, mas, sino. **Li ne legas sed kuiras**—él no lee, sino cocina. **Tamen**—sin embargo, no obstante. **Tre**—muy.
4. La terminación **n** del acusativo también se usa cuando el complemento directo es un sustantivo: la **sinjoro** amas **ŝin**—la **sinjorinon**. Esto permite ordenar libremente las palabras; así, por ejemplo, las 5 oraciones que siguen, tienen un mismo significado; la terminación **n** muestra que en cada una de ellas es el gato (sujeto) el que da los golpes y la señora (objeto, complemento directo) la que los sufre: **la kato (ĝi) batas la sinjorinon (ŝin)**. **La sinjorinon batas la kato**. **La kato la sinjorinon batas**. **Batas la sinjorinon la kato**. **La sinjorinon la kato batas**.

Los sustantivos en plural, que expresan complemento directo, llevan la **n** después de la **j**. **Mi legas librojn**. Pronuncie **ojn** como **oin** en **boina**, conservando el acento en la sílaba anterior: **librojn**.

Los adjetivos que describen un complemento directo también toman la terminación **n**: **mi legas interesan libron** (**interesajn librojn**)—leo un libro interesante (unos libros interesantes).

Cuando se hace una pregunta refiriéndose al complemento directo

de una acción, la palabra interrogativa toma la terminación del acusativo: **Kion mi legas?** **Vi legas libron**. **Kiun vi amas?** **¿A quién ama Ud?** **Mi amas lin**.—Yo amo a él (lo amo).

5. **Sinjorino** generalmente designa a la señora casada. **Fraŭlino**—una joven (soltera). **Sinjoro** (S-ro)—Sr. **Sinjorino** (S-ino)—Sra. **Fraŭlino** (F-ino)—Sta.
6. **Jam ne**—ya no. **Li jam ne manĝas**—él ya no come.
7. La terminación—**is** indica que la acción ha tenido lugar en el pasado. **Si legas**—ella lee, **ŝi legis**—ella leyó o leía. **Mi havas**—yo tengo, **mi havis**—yo tuve o tenía. **Havas** sólo tiene el sentido de posesión contenido en el verbo tener.
8. Con la terminación—**u** se forman las órdenes (imperativo). **Vi iras**—tú vas. **Iru!**—¡ve! **Trinku, fratoj, trinku**—bebed, hermanos, bebed. **Ne dancu**—no bailes.
9. **Bonan nokton**—buenas noches. Se usa el acusativo porque la frase completa (sobrentendida, pero no expresada) sería: **Mi deziras al vi bonan nokton**—le deseo a Ud. buenas noches.

## Traduzca al Esperanto :

El débil señor estaba sentado y leía. Pero la fuerte esposa vino y dijo: ve y cocina. El fué y cocinó. Pero él era un mal cocinero. La señora vino y el débil esposo salió corriendo (corrió afuera) (for). Adamson estaba sentado en el banco. También una fuerte señorita estaba sentada en el banco. El gato negro miraba la mariposa, que estaba asentada sobre la señorita. El gato negro golpea a la señorita. La mariposa salió volando. La fuerte señorita miró a Adamson y lo golpeó.

## Kvina (5-a) Leciono



**Pura—  
malpura.**

Kia estas la infano? Kia estas la papero? Ĉu vi jam estas pura? Ĉu la ĉambro estis pura? Ĉu ĝi estas jam pura?




**Sana —  
malsana.**

Ĉu vi estas sana? Ĉu la sinjoro estas sana? Ĉu vi estis malsana?



**Li faras ŝuon  
(ŝuo)**

Kion li faras? (Li faras ŝuon.) Ĉu vi faras ŝuon? Kion vi faras? (Mi lernas Esperanton.) Kion faras la instruisto? Kion faras la kato? Kion faras la hundo?



La vidvo ne estas, sed estis edzo. La edzino kuŝas en la tombo. Ŝi mortis.

Ĉu la sinjoro havas edzinon? (Ne, sed li havis edzinon.) Kie estas la edzino (En la tombo.) Ĉu la sinjoro estas edzo? (Ne, li estis edzo, sed la edzino mortis.) Ĉu la sinjoro havas floron? Kiu floro ĝi estas? (Ĝi estas kaktio.) Ĉu vi ŝatas kaktiojn? Kiu estas vidvo?




Kion faras la vidvo? Kion faras la edzino? (Ŝi rigardas la kaktion.) Ĉu ŝi ŝatas la kaktion? Kia ŝi estas? Kie la kaktio estas? Ĉu la edzino estas juna? Ĉu ŝi estas bela?



**Ŝi prenas la kaktion.**

Kion ŝi faras? Kiu prenas la kakton?



Si ĵetas la kakton.

Kaj nun? (Nun ŝi ĵetas la kakton.) Ĉu ŝi ŝatas la kakton? Kion ŝi ĵetas?

Ĉu vi ŝatas ĉokoladon? Ĉu vi ŝatas manĝi ĉokoladon? Ĉu vi ŝatas trinki kafon? Ĉu vi ŝatas paroli Esperanton? Ĉu vi ŝatas rigardi longajn filmojn?

Ĉu vi komprenas? — mi demandas.

Jes, mi komprenas! — vi respondas.

Respondu! Kiu demandas? Kiu respondas? Ĉu la instruisto respondas? Ĉu vi ŝatas demandi?



La sinjoro iras sola.

Li iras kun la sinjorino.



Li skribas per la krajono.

Ĉu vi iras kun la fraŭlino? Ĉu vi lernas kun sinjoroj? Kun kiu vi manĝas? Ĉu vi skribas kun krajono? (Ne, sed per krajono.) Ĉu vi ŝatas skribi per maŝino? Per kia maŝino vi ŝatas skribi? Per kio vi skribas?

La nazo de la alkoholisto estas ruĝa.



Kia estas la nazo de la alkoholisto? Ĉu vi havas ruĝan nazon? Kia estas la pordo de la ĉambro? Kia estas la muro de la ĉambro? Kia estas la nazo de la elefanto?

Kia estas la elefanto? (Griza.) Kia estas la koloro de la elefanto? Kia estas la koloro de la ĉokolado? Kia estas la koloro de la domo, kie vi loĝas? Kia estas la koloro de la ĉielo? Kia estas la koloro de la kanario? Kia estas la planko de la ĉambro?

La k.p.o. La kapo pensas. La kolo (sub la kapo.)



Kia estas la kapo de la elefanto? Kia estas la kapo de la kato? Ĉu la hundo havas inteligentan kapon? Kio estas sub la kapo? Kia estas la kolo de la ĝirafino? Ĉu vi havas dikan kolon?

La nazo flaras. La okuloj vidas. La oreloj aŭdas muzikon.



Ĉu vi amas per la kapo? Ĉu vi pensas per la nazo? Per kio vi pensas? Ĉu vi ŝatas pensi? Kia estas la kapo de la krokodilo?

Ĉu vi havas nur unu okulon? Kiaj estas viaj okuloj? Ĉu viaj

okuloj estas fortaj? Kia estas la koloro de viaj okuloj? Kiajn okulojn vi ŝatas? Kiaj estas la okuloj ĉe la kato? Kion oni faras per la okuloj? Per kio oni vidas? Per kio oni pensas? Ĉu oni vidas per la nazo? Kion oni faras per la nazo? Ĉu oni flaras per la okuloj? Per kio oni flaras? Ĉu oni rigardas la koloron de la floroj per la nazo? Kion oni faras per la nazo?

Oni flaras la *odoron* de la floro per la nazo.

Ĉu la floroj havas bonan odoron? Kia estas la odoro de la benzino? Kia estas la odoro de la rozo?

Ĉu vi havas nur unu orejon? Kion vi faras per la oreloj? Ĉu vi nun aŭdas muzikon? Ĉu vi ŝatas aŭdi muzikon? Ĉu vi ŝatas aŭdi Esperanton? Ĉu vi aŭdas per la nazo? Per kio vi aŭdas?

Ĉu vi havas radioaparaton? (Ankaŭ en mia ĉambro staras tia aparato; en la *programo* nun estas muziko, mi aŭdas ĝin, sed mi parolas kun sinjoro kaj mi ne *aŭskultas* ĝin.)

Ĉu vi ŝatas aŭskulti la muzikon de Beethoven? Kia estas la muziko de Lohengrin? Ĉu vi ŝatas aŭskulti gramofonmuzikon? Kion vi ŝatas aŭskulti?



*Parto de la  
flugmaŝino.*



*Tuta flug-  
maŝino.*




*Partoj de la  
flugmaŝino.*

Ĉu vi havas tutan domon? En kiu parto de la loĝejo oni kuiras?

Ĉu la flugmaŝino havas partojn? Kiun parton de la radio-programo vi ŝatas? Ĉu vi ŝatas aŭskulti tutan operon, aŭ nur partojn?

*Li rigar-  
das lin.*

*Li rigar-  
das sin  
en la  
spegulo.*



Kion li faras? Kiu rigardas lin? Ĉu vi rigardas la libron? Kion vi rigardas? Ĉu vi ŝatas rigardi bonajn filmojn?

Ĉu la sinjoro rigardas sin? Kiu rigardas sin? Ĉu vi rigardas vin en la *spegulo*? Ĉu la sinjorinoj ŝatas la spegulon? Ĉu ili rigardas sin en la spegulo? Kiun rigardas la sinjorinoj en la spegulo? Ĉu vi havas spegulon? Kia estas la spegulo?



*Li kombas sin per  
la kombilo.*

Ĉu li rigardas sin? Kiu kombas sin? Ĉu li kombas sin per la kraĵono? Ĉu vi havas kombilon? Ĉu vi havas nigran kombilon? Kia estas la kombilo? Kion oni faras per la kombilo?

*Tranĉilo Tondilo  
(Tranĉi, tondi).*



Kion oni faras per la tondilo? Ĉu vi havas bonan tondilon? Per kio oni tondas? Ĉu vi tondas libron per la tondilo?

Kion oni faras per la tranĉilo? Per kio oni tranĉas? Ĉu vi havas

longan tranĉilon? Kian tranĉilon vi havas?

Ĉu la kanario flugas? Ĉu ĝi flugas per la tranĉilo? Per kio la kanario flugas? (Per *flugiloj*.) Ĉu vi havas flugilojn? Kion faras la flugmaŝino? Per kio flugas la flugmaŝino? Ĉu ĝi havas flugilojn? Ĉu la flugmaŝino havas benzinmotoron? Ĉu la kanario havas benzinmotoron?

(La kanario ne havas benzinmotoron, tamen ĝi flugas.)



Oni ŝlosas per la ŝlosilo.

Kion oni faras per la ŝlosilo? Ĉu vi havas multajn ŝlosilojn? Ĉu la pordo havas ŝlosilon? Ĉu oni tondas per la ŝlosilo? Per kio oni tondas, ŝlosas, kombas, flugas? Kia estas la ŝlosilo? Ĉu la ŝlosilo estas objekto?

Ĉu vi komprenas: kombilo, tranĉilo, flugilo, etc.?

Mia nomo estas:

Dr. Francisko Szilágyi

Kio estas via nomo? Ĉu via nomo estas Benito Mussolini? Ĉu via lando havas reĝon? Kio estas *lia* nomo?



La reĝo havas kronon.

Ĉu Nederlando havas reĝinon? Kio estas *ŝia* nomo? Ĉu via krajono

estas bona? Ĉu vi havas hundon? Kio estas *ĝia* nomo? Ĉu nia ĉambro estas granda? Ĉu nia libro estas dika?

Ĉu vi ŝatas la hispanojn? Ĉu ilia lando estas granda? Kia estas ilia lando? Kia estas via kombilo?



Dentoj, lipoj (du), lango (unu, longa).

Kion oni faras per la buŝo? Ĉu la buŝo havas partojn? Kion oni faras per la lango? Ĉu la lango de la sinjorino estas longa? Kion oni faras per la lipoj? Ĉu la lipoj de la modernaj sinjorinoj estas ruĝaj? Ĉu viaj dentoj estas sanaj? Ĉu ili estas fortaj? Kiaj estas la dentoj de la krokodilo? Ĉu vi havas nur unu denton?

6—ses	40—kvardek
7—sep	50—kvindek
8—ok	60—sesdek
9—naŭ	70—sepdek
10—dek	80—okdek
11—dek unu	90—naŭdek
12—dek du	100—cent
13—dek tri	200—ducent
— — —	300—tricent
20—dudek	900—naŭcent
21—dudek unu	1,000—mil
30—tridek	1,000,000—miliono
1935—mil naŭcent tridek kvin	

Ĉu vi havas nur ses dentojn? Ĉu en la ĉambro estas sep seĝoj? Ĉu vi havas ok Esperantajn librojn? Ĉu en la libro estas naŭ lecionoj?

Ĉu vi havas unu haron? Ĉu Adamson havas unu haron? Kiu havas multajn harojn? Kia estas la koloro de viaj haroj? Ĉu vi havas blondajn harojn? Kie estas la haroj? Kiajn harojn havas la poetoj? Kiu

tondas viajn harojn? (*La barbiro.*)  
Per kio oni tondas la harojn? Ĉu  
vi ŝatas la ruĝajn harojn?



### Lipharoj.

Ĉu vi havas harojn sur viaj lipoj?  
Ĉu vi havas longajn lipharojn? Kiaj  
estas la lipharoj de la homo sur la  
bildo? Ĉu vi ŝatas la lipharojn?

Ĉu vi havas barbon? Kie estas  
la barbo de la modernaj sinjoroj?  
(Ĉe la barbiro.) Kion faras la bar-

La barbiro  
razas per  
la razilo.



biro? Per kio li razas? Ĉu li razas  
per la kombilo? Ĉu vi havas razilon?  
Ĉu vi mem razas vin? Ĉu multaj  
sinjoroj razas sin? Kia estas via  
razilo? Ĉu ĝi estas akra? Ĉu oni  
razas sin per malakra razilo? Ĉu  
la sinjorino havas akran langon?

Ĉu vi nun lernis multajn vortojn  
Ĝis revido, do! Adiaŭ!

### Conteste en esperanto:

- 1.- Ĉu vi razas vin mem per via razilo?
- 2.- Ĉu vi tondas la harojn de viaj amikoj?
- 3.- Kiun profesion vi havas (kio estas via  
profesio)?

## Notas

1. **Faras**—hace. **Kion vi faras?** ¿Qué hace Ud.?
2. -i es la terminación del infinitivo: **dormi**—dormir, **mangi**—comer, **esti**—ser, estar, etc.
3. **Kun**—con (en compañía de), **per**—con (por medio de).
4. La posesión se señala con la preposición **de**—de. **La nazo de la alkoholisto**—la nariz del (de el) alcoholista.
5. **Oni**—se (la gente en general). **Oni diras**—se dice.
6. **Sin**—se (a sí mismo). Éste pronombre es llamado **reflexivo**, y se lo usa cuando el objeto de una acción es el mismo sujeto. Sólo se lo usa en la tercera persona, es decir, cosas o personas de las cuales hablamos. Cuando el sujeto es **mi**, **ni** (primera persona) o **vi** (segunda persona), el reflexivo es expresado por **min**, **nin**, **vin**—me, nos, te (os).  
**Li (ŝi, ĝi, oni, ili, Adamson) rigardas sin en la spegulo.**  
**Mi rigardas min, vi rigardas vin, ni rigardas nin.**
7. El sufijo—**ilo** denota el instrumento destinado a: **tranĉi**—cortar, **tranĉilo**—cuchillo (trancha), **tondi**—cortar con tijeras (tonsurar), **tondilo**—tijeras, **flugilo**—ala.
8. **Mi**—yo, **mia**—mi, mio, mía; **via**—tu, su (de usted), vuestro, vuestra; **lia**—su (de él); **ŝia**—su (de ella); **ĝia**—su (de ello): **nia**—nuestro, nuestra; **ilia**—su (de ellos, de ellas). Estos son los adjetivos posesivos.
9. **Vidi**—ver, **rigardi**—mirar, **aŭdi**—oir, **aŭskulti**—escuchar.
10. **Dek du** (dos palabras) =  $10 + 2 = 12$ ; **dudek** (una palabra) =  $2 \times 10 = 20$ ; **dudek du** =  $2 \times 10 + 2 = 22$ .
11. **Haro**—un pelo, **haroj**—pelos, el pelo (colectivo), **lipharoj**—bigote(s)
12. **Mem**—mismo, se lo usa para subrayar la identidad de una persona o cosa. **Mi mem iros**—Yo mismo iré. **Ni vidis la reĝon mem**—Nosotros vimos al rey mismo (al rey en persona). No confundir con el reflexivo **sin**: **Li razas sin**—él se afeita; **li mem razas sin**—él mismo se afeita.
13. **Ĉe**—en ese lugar, en lo de, en casa de, cabe.
14. **Do**—pues, y bien, por lo tanto. **Bonan nokton, do!** Buenas noches, pues!

## Traduzca al Esperanto :

Se vió un viudo que estaba en el cementerio. La fea y vieja señora tomó el cacto y lo arrojó. Mi peine es corto. ¿Ha cerrado con llave la puerta del maestro? Me gusta mucho el pelo de la señorita.

Su color es rubio. La lengua de la señora es larga. Ella habla mucho con ella (con la lengua). ¿Ha visto Ud. el papel sucio? ¿Corte el papel! ¿Se afeita Ud. mismo? El mismo se afeita. ¿Quién le (a Ud.) corta el pelo? Se tienen (la gente tiene) treinta y dos dientes.

## T r a d u z c a :

- 1.- Malŝati, malamo, malŝlosi, kuracilo, kamaradino, kamelino, banejo.



## Sesa (6-a) Leciono



### Koro.

Ĉu vi amas per la kapo? Per kio vi amas? Kian koron vi havas? Kie estas la koro? (En la *brusto*.) Ĉu vi havas fortan bruston? Ĉu la atletoj havas fortan bruston? Kio estas en la brusto?



### Pulmoj.

### Stomako.

Kion oni faras per la pulmoj? (Oni *spiras* per la pulmoj.) Kiaj estas viaj pulmoj? Kiaj estas la pulmoj de la atletoj? Kion faras la pulmoj? (La pulmo *enspiras* kaj *elspiras*.)

Kion faras la *stomako*? Ĝi *digestas*. Kio *digestas*? Ĉu la pulmo *digestas*? Kion oni *enspiras*? (*Aeron*.) Ĉu en la ĉambro la aero estas bona? Kia estas la aero? Ĉu la aero estas varma?



### Piedoj.

Ĉu Chaplin havas belajn piedojn? Kiaj estas liaj piedoj? Ĉu viaj piedoj estas sanaj? Kiaj estas la piedoj de la elefanto? Kion vi havas sur la piedoj? Kie estas la ŝuoj? Kian

koloron havas viaj ŝuoj? Kion oni faras per la piedoj? (Oni iras kaj venas = *marŝas*.)



### La mano. La fingro *montras*.

Ĉu vi havas unu *manon*? Kion oni faras per la manoj? Ĉu la elefanto havas manojn? Ĉu ĝi havas du piedojn? Ĉu oni prenas per la piedoj?

Sur la mano estas *fingroj*. Ĉu ankaŭ sur la piedoj estas fingroj? (*Piedfingroj*.) Kio estas sur la fingroj? (*Ungoj*.) Ĉu vi tondis viajn ungojn? Ĉu la kato havas fortajn ungojn? Kiaj estas ĝiaj ungoj?

Kion vi faras per la fingro? (Mi *montras*.)



La ŝtrumpoj de Adamson estas malbonaj. Ili havas truojn.

Kion faras Adamson? (Li *ŝtopas* ŝtrumpojn.) Kio estas en la mano

de Adamson? (*Strumpo*). Kia estas la ŝtrumpo? Kion havas la malbonaj ŝtrumpoj? (Ili havas grandajn truojn.) Ĉu Adamson ŝatas la malbonajn ŝtrumpojn?

Adamson ne ŝatas ŝtopi la ŝtrumpojn.



**Adamson surmetas la palton.**

Kion faras Adamson? Ĉu li surmetas la ŝuojn? Kion li surmetas? Ĉu vi havas helan palton? Kia estas la koloro de via palto? Ĉu vi havas nur unu palton?



**Antaŭ la pastro.**

Kie staras Adamson?

Adamson staras *antaŭ* la pastro. Ĉu li staras antaŭ la spegulo?

Ĉu li staras sola antaŭ la pastro? Ĉu Adamson estas edzo? Kia estas la edzino de Adamson? Ĉu ŝi estas forta? Kia estas Adamson? Ĉu Adamson ŝatas ŝtopi la ŝtrumpojn? Kie ili staras? *Kial* staras Adamson antaŭ la pastro?

*Car* li ne ŝatas ŝtopi la ŝtrumpojn.

*Kial* vi ŝatas Esperanton? (*Car* ĝi estas interesa kaj moderna lingvo.)



**La malfeliĉo (katastrofo) de Adamson.**

Kial Adamson staris antaŭ la pastro? Ĉu Adamson ŝtopas siajn ŝtrumpojn? Ĉu Adamson estas feliĉa edzo? Kial li ne estas feliĉa edzo? Ĉu lia edzino estas diktatoro? Kial Adamson ŝtopas ŝiajn ŝtrumpojn?

(*Car* li estas malforta, malgranda; ĉar la edzino estas forta kaj granda; ĉar ŝi diras:

“Adamson, ŝtopu miajn ŝtrumpojn,” — kaj Adamson *devas* ŝtopi la ŝtrumpojn de sia edzino.)

Ĉu oni devas manĝi? Ĉu oni devas enspiri aeron? Ĉu oni devas havi monon? Ĉu vi devas legi? Ĉu oni devas havi loĝejon?

Kie?



Mia  
aŭtomobilo



ĉi tie

estas nenie

Kie estas la libro? Ĉu la kraĵono estas ĉi tie? Kie estas la granda domo? Ĉu vi vidis Parizon? Ĉu vi loĝas tie? Kie vi loĝas?


La instruisto ne havas aŭtomobilon.

Kie estas lia aŭtomobilo? (Nenie) Kie estas via granda domo? Kie estas ruĝaj elefantoj? Kie estas bluj hundoj? Ĉu esperantistoj estas nenie?

(Esperantistoj estas en Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko kaj Aŭstralio. Esperantistoj estas ĉie.)

Ĉu aero estas ĉie? Kiuj estas ĉie? Ĉu bestoj estas ĉie? Ĉu arboj estas ĉie?

Mi ne vidas mian kraĵonon. Ĝi estas ie, sur la tablo. Ne, ĝi ne estas tie. Ĉu ĝi ne estas sur la benko? Sed ie ĝi devas esti. Ĉu vi ne vidas ĝin ie?



1. Chaplin.
2. Sama sinjoro.
3. Alia sinjoro.

Mi vivas en Svedlando. Ĉu vi vivas en la sama lando? Ĉu la japanoj parolas la svedan lingvon? Ĉu vi parolas la japanan lingvon? Ĉu vi kaj la japanoj ne parolas la


saman lingvon? Ĉu vi parolas aliajn lingvojn? Ĉu multaj japanoj parolas Esperanton? (Jes.) Ĉu oni parolas Esperanton en multaj landoj? Ĉu vi jam estis en aliaj landoj?

Ili ne kisas  
sed kisas.



Ĉu ili kisas? (Ne, sed ili kisas.)  
Ĉu vi estas perfekta esperantisto?  
(Sed vi estos, ĉu ne?)

Dika — maldika.



Ĉu vi parolas Esperanton? Ĉu vi legas dikajn librojn en Esperanto? Ĉu vi legos dikajn librojn en Esperanto? Ĉu vi skribas en Esperanto? Ĉu vi skribos? Ĉu vi parolis Esperanton? Ĉu vi havas multajn Esperanto-librojn? Ĉu vi havos multajn librojn? Ĉu vi legos ilin? Ĉu vi manĝos nun?

Mi manĝas — mi manĝis — mi manĝos.

Varmega (35°C)




Ĉu 23 gradoj estas varma vetero? (Kaj 35 gradoj estas tre varma vetero.)  
Ĉu vi ŝatas la varmegan veteron?  
Ĉu vi trinkas varmegan akvon?

Ĉu London estas granda? Ĝi estas tre-tre granda. Ĝi estas grandega. Kio estas London? Ĝi

estas urbo. Ĉu vi loĝas en urbo?  
(Jes . . . Ne, mi loĝas en vilaĝo.)

La urbo estas granda, la vilaĝo  
estas malgranda.



Pordo—Pordego.

Ĉu la ĉambro havas pordon? Ĉu  
la domo havas pordon?

La domo havas *pordegon* (grandan  
pordon). Kia estas la pordego de  
la domo, kie vi loĝas?

Ĉu London estas urbeĝo? Ĉu vi  
loĝas en urbeĝo?

Ĉu la elefanto havas nazon? (Ne,  
nazegon.)

Ĉu la sinjoro ridas? (Ne, li ne  
nur ridas, sed li ridegas.)

Ĉu vi komprenas la vortojn varmega,  
grandega, belega, bonega (vi estas  
bonega lernanto), pordego, nazego,  
urbeĝo, ĉambreĝo (tre granda ĉambro,  
kie estas multaj homoj), rideĝi? (Ride-  
go = forta rido.)



Domego — domo — dometo.

Ĉu la domo estas granda?

Unu domo el la tri estas tre mal-  
granda. Ĝi estas *dometo*. (Tre mal-  
granda domo.) Alia estas *domego*  
(granda domo).

Ĉu vi havas grandan ĉambron,  
*aŭ* nur ĉambreton? (ĉambreto =  
malgranda ĉambro.)

Mi ne vivas en urbeĝo, sed nur  
en malgranda urbo. Sed la urbeĝo  
estas tre bela. Mi promenis sur la  
strato de la urbeĝo kaj venis bela  
fraŭlino. Ŝi ne rideĝis, ne ridis,  
nur ridetis. La aero estis varmeta.

Ĉu vi komprenas: varmeta (varma,  
sed ne tre) beleta, malvarmeta, (en  
oktobro la aero estas malvarmeta),  
urbeĝo, libreto, ĉambreto, rideti?



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

## Notas

1. **Surmeti** — sobreponer, vestirse (ponerse encima). Palabras compuestas similares a ésta, formadas por la unión de preposiciones (**sur**, **al en**, **el**, **sub**, etc.) a un verbo, son muy comunes en Esperanto: **enspiri** — inspirar, inhalar; **elspiri** — expirar, exhalar.
2. **Antaŭ** — ante, delante.
3. **Kial** — por qué, **ĉar** — porque (respuesta). Nótese que todas las palabras interrogativas, excepto **ĉu**, empiezan con **ki**.
4. **Sia** — su, es el adjetivo posesivo usado en oraciones reflexivas en lugar de **lia**, **ŝia**, **ĝia**, **onia**, **ilia**, cuando la cosa en cuestión pertenece a la persona que ejecuta la acción. A igual que **sin**, **sia** se lo usa únicamente para la tercera persona. **Adamson ŝtopas siajn ŝtrumpojn** — Adamson remienda (tapa) sus (propias) medias. **Adamson iras al la barbiro; la barbiro tondas liajn harojn** — el barbero corta sus pelos (los de Adamson).
6. **Devas** — debe, está obligado. **Devo** — (el) deber.
7. **Kie** — donde, **tie** — allí, **ĉi tie** (o **tie ĉi**) aquí, acá, **nenie** — en ninguna parte, **ĉie** — en todas partes, **ie** — en alguna parte.
8. **Anglujo (Anglolando)** — Inglaterra, **anglo** — un inglés, **angla** — inglés, **Japanujo (Japanlando)**, **japano**, **japana**.
9. Los verbos que expresan el tiempo futuro reciben la terminación **-os**. **Mi estos** — yo seré o estaré, **mi skribos** — yo escribiré, **vi skribos** — tú escribirás.
10. Con el sufijo **-eg** se forma el aumentativo: **pordo** — puerta, **pordego** — portón, **varma** — caliente, **varmega** — ardiente, **granda** — grande, **grandega** — grandísimo, inmenso, **ridi** — reír, **ridegi** — reír a carcajadas.
11. El sufijo **-et** forma los diminutivos: **Domo** — casa, **dometo** — casita, **varmeta** — tibio, **malvarmeta** — fresco, **rideti** — sonreír.
12. **Aŭ** — o, u. **Ĉu ne?** — ¿no es así? **Alia** — otro, otra, **la alia** — el otro, la otra.

## Traduzca al Esperanto:

Sólo las personas que respiran pueden vivir. Yo tengo un pecho fuerte y mis pulmones son sanos. Adamson vió unos agujeros enormes en sus calcetines. Vistió su gabán y fué a lo del cura, porque quería ser esposo. Pero la esposa era muy fuerte y le dijo a Adamson: "Ve y remienda mis medias." Y Adamson debió ir y remendar sus (de ella) medias, porque ella era muy fuerte, pero él era un hombre débil.

## Conteste en Esperanto:

- 1.- Ĉu Adamson flikas la ŝtrumpojn de via edzino?
- 2.- Kie vi loĝas?
- 3.- Per kio oni devas enspiri la aeron?
- 4.- Kial oni devas lerni Esperanton?

## Sepa (7-a) Leciono

Bonan tagon! Ĉu vi estas sana?



A-Kiel vi fartas, sinjoro?

B-Mi dankas, bone.

Jes, mi estas sana. Kaj kiel vi fartas?


Mi dankas, mi fartas bone.

Kiel? — bone.




Kiel li parolas? Laŭte.

Ĉu la sinjoro parolas? Ĉu la sinjoro parolas forte? Li parolas laŭte. Ĉu vi lernas laŭte? Kiel vi respondas? Ĉu vi respondas bone? Ĉu la flugmaŝino flugas malalte? Kiel vi respondas?



Adamson volas telefoni. La laboristo laboras.

Kion faras Adamson? Ĉu li staras en la telefonejo? Kie li staras? Ĉu Adamson telefonas? Kiu telefonas? Ĉu vi vidas homon sur la bildo (Li estas laboristo.) Kion li faras (Li laboras.) Per kio li laboras? (Per la laborilo.) Kie estas via laborejo?



Adamson staras, staras . . . Li atendas.

Kion faras Adamson? Kiu atendas? Kie li atendas?


Kial li atendas? (Ĉar li volas telefoni.)

Kiu volas telefoni? Kion volas Adamson? Ĉu vi ŝatas manĝi ĉokoladon? Ĉu vi ŝatas legi historiajn romanojn? Ĉu vi volas respondi bone?

Ĉu Adamson volas paroli? Ĉu Adamson parolas? Kial li ne parolas? (Li ne povas paroli, ĉar en la telefonejo staras alia homo.)


Ĉu vi povas kompreni Esperanton? Kial vi povas bone kompreni Esperanton? (Ĉar Esperanto estas tre facila kaj vi estas bona lernanto.)

Kion faras Adamson ? Ĉu Adamson rigardas la aŭtomobilon ?



Vespero. (Steloj sur la ĉielo.) La laboristo *finas* la laboron. Adamson rigardas la *horloĝon*.

Kio estas sur la ĉielo ? Ĉu estas ankoraŭ tago ? (Ne, sed vespero.) Ĉu Adamson atendis multe ? Kiel Adamson atendas multe ? (Car Adamson estas tre *pacienca* homo.) Kia estas la pacienco de Adamson ? Ĉu Adamson atendas paciencie ? Kiel Adamson atendas ? Kiel vi lernas Esperanton ?



La laboristo *malfermas* la telefonejon. Tie estas liaj *botoj*.

Kion faras la laboristo ?

La laboristo jam ne laboras, li volas iri, li *finis* la laboron.

Kion faras la laboristo ?

Ĉu li fermis la pordon de la telefonejo ? Kion li malfermas ? Kiu malfermas la telefonejon ? Kio estas en la telefonejo ?

(En la telefonejo estis la altaj ŝuoj — *botoj* — de la laboristo.)

Kion faras Adamson ? (Adamson falas *pro* la miro.) Ĉu Adamson miras ? Kiu miras ?

Ĉu vi vidas min ? Ĉu vi vidas la bildojn ? Ĉu vi vidas la objektojn en la ĉambro ? Ĉu vi vidas en la vespero ?

En la vespero — *vespere* — *dum* la vespero.

Ĉu vi vidas dum la nokto ?

Ĉu la instruisto havas aŭtomobilon ? (Ne.) Ĉu vi vidas la aŭtomobilon de la instruisto ?

La aŭtomobilo de la instruisto ne estas *videbla*.

Ĉu la aŭtomobilo de la instruisto estas *videbla* ? Ĉu la koro estas *videbla* ? Ĉu vi pensas *videble* ? Ĉu la pensoj de la homo estas *videblaj* ?


Ĉu la ĉokolado estas *manĝebla* ? Ĉu la elefanto estas *manĝebla* ? Ĉu la bona kafeo estas *trinkebla* ? Ĉu la vitriolo estas *trinkebla* ?

Ĉu vi komprenas min ? Ĉu Esperanto estas *komprenebla* lingvo ?

Ĉu vi respondas kompreneble? Ĉu vi parolas Esperanton kompreneble? Kiel vi lernas Esperanton? (Facile.)

Ĉu la muziko de la radioaparato estas aŭdebla? Ĉu vi parolas laŭte kaj aŭdeble? Kiel vi parolas?

Ĉu Stockholm estas granda urbo? Ĉu ankaŭ Wien estas granda urbo?



Kio estas pli granda, la elefanto aŭ la muso? Kiu estas pli riĉa: vi aŭ Rockefeller? Kio estas pli bona, la ĉokolado aŭ la ricino? Kio estas pli alta: la domo aŭ la seĝo?

(La domo estas pli alta ol la seĝo.) Ĉu vi estas pli riĉa ol Rockefeller? (Ne, sed malpli riĉa.) Ĉu la lipoj de la modernaj sinjorinoj estas pli ruĝaj ol la lipoj de la malmodernaj sinjorinoj? Ĉu la poetoj havas pli longajn harojn ol la bankdirektoroj? Ĉu Esperanto estas pli facila ol la franca lingvo? Kia lingvo estas Esperanto? (Esperanto estas la plej facila lingvo.) London estas la plej granda urbo. Kiu estas la plej granda besto? Kiu estas la plej moderna lingvo? Kiu estas la plej malfacila lingvo? Kiu estas la plej bona sporto?

Nun ni legos *pri* la jaro: Jaro estas longa tempo: 365 tagoj. Sed estas jaro, kiu havas 366 tagojn. Tiu jaro havas la nomon: super-jaro.

En la jaro estas 12 monatoj. La unua monato estas januaro, la dua monato estas februaro, la tria monato estas marto, poste estas aprilo, majo, junio, julio, aŭgusto, septembro, la deka monato estas oktobro, la dek-unua monato estas novembro kaj la lasta monato de la jaro estas decembro. En la monato estas kvar semajnoj. La semajno havas 7 tagojn. La tagoj de la semajno estas lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato kaj dimanĉo. Dimanĉo estas la ruĝa tago en la kalendaro. Adamson atendis dum longa tempo kaj li rigardis la horloĝon. Sur la horloĝo estas videblaj la horoj. Sur la horloĝo estas 12 horoj, sed la tago havas 24 horojn. Ankaŭ la horoj havas partojn. En la horo estas 60 minutoj kaj la plej malgranda parto de la tempo havas la nomon sekundo.

Jaro, monato, horo ktp. = tempo.

Kiu monato estas la unua? Kiu tago estas la dua tago de la semajno? Kiu estas la lasta tago de la semajno? Kiu estas la plej bona tago de la semajno? Kiu estas la plej mallonga monato? Ĉu vi ŝatas la mallongajn monatojn? Kial? Ĉu nun estas superjaro? (Ne, ordinara jaro.)

Kion faras la fingro? Ĝi montras. Ĉu la horloĝo montras? Kion ĝi montras? (La tempon.)

La horloĝo havas montrilojn. La granda montrilo montras la minutojn kaj la malgranda montrilo montras la horojn.

Kion faras la montrilo? Kion montras la malgranda montrilo? Kion montras la granda montrilo? Ĉu Adamson atendis longtempe? Ĉu vi ŝatas atendi longtempe?



## Notas

1. **Kiel**—como, de que modo. **Kiel vi fartas?**—¿Cómo está Ud. (de salud)? ¿Cómo le va? **Farti**—estar, encontrarse de salud.
2. Los **adverbios** nos indican la manera u otras circunstancias (tiempo, lugar, etc.) en que una acción se desarrolla; estos se forman en Esperanto por medio de la terminación **-e**: **rapida**—rápido-a, **rapide**—rápidamente, **bona**—bueno-a, **bone**—bien (bien hecho, dicho).
3. **Voli**—querer, desear, **povi**—poder, ser capaz.
4. **Ankorau**—aún, todavía, **ankaŭ**—también.
5. **Pacienco**—paciencia, **pacienca**—paciente, pacífico, **pacience**—pacientemente.
6. **Pro**—a causa de, por, debido a. **Li mortis pro timo**—él murió de (a causa del) miedo.
7. **Dum**—durante, mientras. **Vespere**—al anochecer (en las horas vespertinas), (adverbio de tiempo).
8. El sufijo **-ebla** indica posibilidad. **Videbla**—visible, **legebla**—legible.
9. **Pli . . . ol**—más . . . que, **pli granda**—más grande, **plej**—el más, la más, **la plej aŭdebla**—el la, lo más audible, el, la, lo que mejor

se oye. **plej granda**—el, la, lo más grande.

10. **Pri**—acerca de, referente a.
11. Los números ordinales se forman añadiendo la terminación del adjetivo **-a** a los números elementales. **Unua**—primero-a, **dua**—segundo-a, **dek-dua**—décimosegundo-a, etc. (Note el guión).
12. **Montri**—mostrar, señalar, **montrilo**, señalador, manecilla (de un reloj).
13. **Superjaro**—año bisiesto (literalmente: "superaño").
14. **Longtempe**—durante largo tiempo.

## Traduzca al Esperanto:

(Le desco a Ud.) buenos días. ¿Cómo están Uds, señores? Gracias, me encuentro bien. Pero el jueves estuve en cama porque estaba enfermo. Ahora ya estoy mejor. ¿Ha mirado Ud. el reloj? ¿Qué día es mejor, domingo o lunes? ¿Puede Ud. dormir más tiempo los domingos? La luna (**luno**) ahora no está visible en el cielo, pero después de algunos minutos podremos verla. Hace dos años tuvimos él más largo invierno (**vintro**). A causa del gran frío no pude salir de la casa. ¿Ha oído Ud. que el viernes escucharemos bella música? Nada oí acerca de ello.

## T a r e a :

Trate de formar, con los afijos que conoce, la mayor variedad de palabras que pueda.

## Oka (8-a) Leciono

Bonan tagon! Kiel vi fartas?

Nun la aero estas varma. La nuna (nun-a) tago estas tre bela.

Nuna tago — *hodiaŭ*.

Kia tago estas hodiaŭ? Kia estas la aero hodiaŭ? Ĉu hodiaŭ la ĉielo estas blua? Kia *vetero* estas hodiaŭ?


Kia estas la vetero hodiaŭ? Ĉu vi volas lerni multe hodiaŭ? Ĉu vi laboros ankoraŭ multe hodiaŭ? Ĉu vi laboris multe antaŭ unu tago?

Antaŭ unu tago — *hieraaŭ*.

Ĉu vi laboris hieraaŭ? Kiu tago estis hieraaŭ? Kia vetero estis hieraaŭ?

Kia vetero estis antaŭhieraaŭ? Ĉu vi lernis Esperanton antaŭhieraaŭ? Ĉu antaŭhieraaŭ estis jaŭdo?

Post unu tago — *morgaŭ*.



La *luno*  
brilas.  
La arbo  
havas  
nigran  
ombron.

Ĉu mi vidos vin morgaŭ? Kion vi faros morgaŭ? Ĉu vi lernos Esperanton morgaŭ? Ĉu morgaŭ estas vendredo? Kion vi faros post-morgaŭ? Ĉu postmorgaŭ estos lundo? Kiu tago estos postmorgaŭ? Ĉu la suno estas sur la ĉielo? Kion faras la suno? (*Ĝi brilas.*)

Kio brilas dum la nokto? La *luno* kaj la steloj.

Li *donas*  
aŭto-  
mobilon  
al ŝi.



Ŝi *ricevas*  
ĝin de li.


Ĉu la sinjoro kisas la fraŭlinon? (Ne, li *donas* al la fraŭlino aŭtomobilon.) Kiu donas aŭtomobilon? Al kiu li donas ĝin? Kion li donas al la fraŭlino? Kion faras la fraŭlino?

Ŝi *ricevas* aŭtomobilon de la sinjoro. Kiu ricevas aŭtomobilon? Kion ŝi ricevas? De kiu ŝi ricevas aŭtomobilon? Ĉu vi ricevas multan monon sabate? Ĉu oni donas al vi monon sabate, aŭ dum la unua tago de la monato? (= *la unuan de la monato.*)

Ĉu vi ŝatas skribi *leteron*? Al kiu vi ŝatas skribi? Ĉu vi ricevis leteron de via *amiko*? De kiu vi atendas leteron? Kiu skribis al vi hieraaŭ? (Neniu?)

Ĉevalo. Azeno.

Bovo.



Ansero. Koko. Kokidoj. Porko

Ĉu vi ŝatas la bestojn? Ĉu vi ŝatas la dombestojn? Kie estas la dombestoj? (*Ĉirkaŭ la domo.*) Ĉu la koko havas flugilojn? (Koko — kokadudldu!) Ĉu la koko havas edzinojn? Ĉu la koko havas haremon?

La edzino de la koko estas la kokino.

Ĉu en la familio de la koko estas malgrandaj kokoj kaj kokinoj? Kio estas ilia nomo?

La juna, malgranda koko estas kokido.


Ĉu la malgranda kato estas ido? (Jes, ĝi estas ido, sed ne ido de koko, sed ido de kato, *do* ĝi ne estas kokido, sed katido.)

Ĉirkaŭ la domo estas malpura kaj *dika* besto, ĝi estas la porko. Ĉu vi ŝatas manĝi porkon? Ĉu vi ŝatas la porkidon? Kia besto estas la ĉevalo? Ĉu la ĉevalido estas bela? Ĉu la ĉevalo havas du piedojn? Ĉu vi ŝatas la anseron? Ĉu la anseridoj estas malpli grandaj, ol la kokidoj?

El kio venas la kokidoj? (Ili venas el *ovo*.)

Ĉu vi ŝatas la ovon? Ĉu vi manĝas ofte (ofte = lunde, marde, jaŭde ktp.) ovon? Ĉu vi malofte manĝas kokidon? Kial vi manĝas malofte kokidon? (Malofte = unu kokido en 3 monatoj.)

Ĉu la bovino donas kafon? (Ne, sed ĝi donas al ni la bonan, blankan *lakton*.) Ĉu vi ŝatas la lakton? Ĉu la lakto estas pli bona, ol la vitriolo? Ĉu la vitriolo estas trinkebla? Ĉu la bovido estas bela besto?



La ĉapelo de Adamson flugas :  
La vento blovas.

Kia estas la vetero sur la bildo? Kion faras la ĉapelo de Adamson? Kial ĝi flugas?

Ĉu vi ŝatas la ventan veteron? Kion faras la vento? Ĉu vi ŝatas la grandan venton? Ĉu vi ŝatas la ventegon? Kion faras la hundo de Adamson? Kio estas la palto, ĉapelo? (Ili estas *vestoj*.) Kia estas via vesto? Kian koloron havas via palto? Kia estas la ĉapelo de Adamson? Kia estas via ĉapelo?



Kion faras la hundo? Kia ĝi estas? Kion faras Adamson? Post kio kuras la hundo?



Viro-- virino.  
Knabo  
—knabino.

Ĉu la homoj estas *egalaj*?

La homoj estas *viraj* kaj *virinoj*. Ĉu vi estis infano? Ĉu la infanoj estas *viroj* kaj *virinoj*? (Ne, sed ili estas *knaboj* kaj *knabinoj*.) Ĉu vi estas knabo? Ĉu Adamson estas knabo?



La hundo kun la virina ĉapelo.

Kio estas en la buŝo de la hundo? Kion faras la hundo?

Ĉu tio estas la ĉapelo de Adamson? Ĉu la hundo *portas* al Adamson viran ĉapelon? Kian ĉapelon ricevas Adamson?



Kio estas sur la kapo de Adamson?

Kia ĉapelo estas sur la kapo de Adamson? Kio iras apud Adamson?



Ŝi *ruĝigas* la lipojn.

Kion faras la fraŭlino? Ŝi *ruĝigas* siajn lipojn. (Ŝi faras la lipojn ruĝaj.) Ĉu la modernaj sinjorinoj ŝatas *beligi* sin? Per kio ili *beligas* sin? (Per *beligiloj*, ruĝigilo.)

Ĉu vi ŝatas *ridi*? Ĉu la rido faras la homon *juna*? Ĉu la rido *junigas* la homojn? Ĉu la sportoj *fortigas* la korpon? Ĉu la lakto estas *saniga*? Kia estas la lakto? Kion faras la modernaj sinjorinoj? Kion faras la rido?



La *virino sen manoj*. *Sen manoj oni ne povas labori*.

Ĉu oni povas *pensi sen kapo*? Ĉu oni povas *ami sen kapo*? (Jes, oni povas *ami nur sen kapo*.) Ĉu oni povas *vidi sen okuloj*? Ĉu vi povas *skribi sen mano*? Ĉu oni povas *vivi sen aero*? Kiu ne povas *vidi*? (La *blinda* homo ne povas *vidi*.)

**Historio.**

En urbo vivis sinjoro. Tiu sinjoro tre amis fraŭlinon. Tiu fraŭlino estis tre bela, bona, simpatia, riĉa, eleganta, ŝi havis nur solan malbonon, ŝi ne povis paroli. Ŝi ne povis paroli, ĉar ŝi estis *muta*.



Blinda. Surda.



Muta.

Ĉu la mutaj homoj povas paroli? Kia estis la bela fraŭlino? Kiu amis ŝin?

Ankaŭ la fraŭlino amis la sinjoron, kaj ili iris al la pastro, kaj ili estis edzo kaj edzino. La sinjoro tre amis la sinjorinon, kaj li estis tre malgaja, ĉar ŝi ne povis paroli kun li.



Gaja—malgaja

Kial ŝi ne povis paroli kun li? Kial estis malgaja la edzo?

La edzo legis en la *gazeto*, ke en la urbo estas *nova* doktoro. La doktoro — kuracisto — povas *kuraci* la plej grandajn malsanojn. Tion li legis en la gazeto, kaj li en la sama momento kuris *al* la doktoro kaj diris:

— Doktoro, mi havas edzinon, kiu ne povas paroli, ŝi estas muta. Ĉu vi povas kuraci (san-igi) ŝin?

— Jes, — diris la doktoro — mi operacios vian edzinon, kaj ŝi parolos.

La edzo estis tre feliĉa. Kaj *vere* la kuracisto per la operacio paroligis la edzinon. Sed nun venas la melankolia parto de la historio. La edzino parolis, parolis, parolis, dum la *tuta* tago kaj dum la *tuta* nokto. La malfeliĉa edzo ne povis labori, li ne povis dormi, ĉar la edzino parolis dum la tago kaj dum la nokto.

Kion legis la edzo? Kia estis la doktoro? Kion faras la edzo? Kion faras la kuracisto? Kion faris la edzino? Ĉu la edzo estis feliĉa? Kial ne? Kion li ne povis fari? Ĉu la nova kuracisto paroligis ŝin?

La edzo iris nun al la doktoro. (La edzo iris *denove* al la doktoro.) Li diris:

— Doktoro, mi estas tre malfeliĉa! Vi malfeliĉigis min. Mia edzino parolas dum la tago kaj dum la nokto, mi ne povas manĝi, labori, dormi. . . . Mi petas vin, doktoro, faru novan operacion, *ke* mia edzino denove estu muta. Doktoro, mi petas vin, mutigu mian edzinon.

La kuracisto diris: — Sinjoro, mi absolute ne povas mutigi vian edzinon.

La edzo petegis: — Doktoro, mi estas malfeliĉega. . . . Mi mortos. . . .

La doktoro havis molan koron (la ŝtono estas tre malmola, sed la koro de la doktoro estis mola).

— Ne, vere mi ne povas mutigi vian edzinon, sed mi povas fari operacion sur vi, vi ne aŭdos, vi estos surda, mi surdigos vin. Ĉu bone?

— Tre bone — respondis la edzo, kaj la kuracisto operaciis lin; kaj li estis tre feliĉa, ĉar li ne aŭdis la edzinon.

Kial estis feliĉa la edzino? Ĉu la doktoro estis feliĉa? (Jes, ĉar li ricevis du *honorariojn*.)

Kia estas via koro? Ĉu la koro estas videbla? Ĉu la dua operacio feliĉigis la sinjoron?

Gis revido! Mi deziras al vi bonan nokton, belan sonĝon (bildo) dum la (dormo) kaj belan edzinon (bonan edzon)!

## Notas

1. **Hodiaŭ**— hoy, **hierau**— ayer, **morgaŭ**—mañana. **Morgaŭ mane**—mañana por la mañana. **Antaŭhierau**—anteayer. **Postmorgaŭ**—pasado mañana.
2. **La unuan (tagon) de la monato**—el primero del mes; el acusativo es usado para señalar la parte del tiempo donde algo tiene lugar. **Sabato estas bona tago, ĉar sabaton mi ricevas monon.** La fecha en una carta se escribe así: **(La) 2-an de decembro, 1948.**
3. **Nenie**—en ninguna parte, **nenio**—nada (compare **nio**), **neniu**—nadie, ninguno-a, ningún (compare **niu**), **neniel**—de ningún modo, de ninguna manera (compare **kiel**), etc.
4. El sufijo **-ido** indica el descendiente: **koko**—gallo, **kokino**—gallina, **kokido**—pollo, **izraelido**—israelita (descendiente de Israel).
5. **Vesto**—vestido, traje, prenda de vestir, **vestoj**—ropas. (No confunda **vesto** con **besto**; distinga la **v** de la **b**).
6. **Viro**—hombre, varón adulto; no confundir con **homo**—ser humano en general; **vira**—vtril, varonil, **virino**—mujer.
7. El sufijo **-ig** forma verbos que expresan: hacer, volver, causar. **Sanigi**—(volver sano) sanar, **ruĝigi**

—enrojecer (los labios), **mortigi**—(causar la muerte) matar.

8. **Simpatia**—simpático-a.
9. **Kuraci**—curar, tratar un enfermo. **Kuracisto**—médico.
10. **Denove**—nuevamente, de nuevo.

## Traduzca la Esperanto:

Hoy (yo) no tengo tiempo y no puedo ir con Ud. ¿No vendrá Ud. conmigo mañana? ¿Tendrá Ud. mañana más tiempo que él que tuvo ayer? Ayer el tiempo era muy bello, pero el viento soplaba fuertemente. No lo he visto a Ud. en parte alguna, y nadie lo vió a Ud. Un señor estaba sentado a la mesa. Él amaba a una señorita, pero ella no lo amaba. Él era muy infeliz (-eg). En su mano había un revólver (revolvero). Él quería matarse. Sobre la mesa estaba el retrato de la señorita. El señor miró el retrato y tuvo buena idea (**ideo**). El no se mató, sino que (**sed**) con el revólver disparó al retrato de la señorita. El era en verdad más inteligente de lo que yo pensé primeramente. El amor vuelve ciegos a los hombres. Al gatito (cachorro de gato) le gusta mucho jugar. La vaca da leche al ternero. A mi me gusta mucho comer carne. Este café en verdad no es bebible. Yo no bebo café sin azúcar.


## T a r e a :

Conteste en Esperanto las preguntas del párrafo "Si ruĝigas siajn lipojn" de esta lección.

## Naŭa (9-a) Leciono



Li metas la kakton sur la tombon.



La kaktto estas sur la tombo.

Kie estas la kaktto? Kion faras la vidvo? (Li metas la kakton sur la tombon.)

Kie . . . sur la tombo.

Kien . . . sur la tombon.

Cu vi estas en via loĝejo? Cu vi estas hejme?

Iru en la ĉambro! Kion vi faras? Kie vi iras?

Iru en la ĉambro! Kion vi faras? Kien vi iras?

Cu la libro estas sub la tablo? Metu ĝin sub la tablon! Kien vi metis la libron?

Sur la tablo — sur la tablon.

Sub la tablo — sub la tablon.



Adamson ne volas salti en la akvon.

Kion faras Adamson? Kie li estas? (Sur la saltejo. En la lernejo oni lernas, de la saltejo oni saltas.) Kien oni saltas de la saltejo? Cu Adamson havas kuraĝon salti en la akvon? Kial li ne havas kuraĝon? Kia estas la vetero?



Adamson tremas pro la malvarmo.

Kion faras Adamson? Li tremas pro la malvarmo. Cu li volas salti?



**La kuraĝa sportisto. Adamson timas kaj krias (parolas laŭte).**

Ĉu la forta sinjoro volas salti? Ĉu li estas pli *kuraĝa* ol Adamson? Kia estas la sinjoro? Kion faras Adamson? Adamson *timas* (li estas malkuraĝa) kaj *krias* laŭte.

Kiu kuras sur la saltejon? Kiu krias? Kiu timas?



**Vagonaro.**

Kion vi vidas sur la bildo? (Unu lokomotivon kaj multajn vagonojn.)

Per unu vorto: tio estas vagonaro.

Ĉu vi ŝatas sidi en la vagonaro? Kion oni faras en la vagonaro? (Oni vojaĝas.) Ĉu vi ŝatas vojaĝi? Kien vi deziras vojaĝi?

Ĉu vi vidas el la vagonaro multajn arbojn? Tre multaj arboj estas arbaro.

Ĉu vi ŝatas iri en la arbaro? Ĉu vi ŝatas iri en la arbaro sola? Ĉu vi ŝatas iri kun fraŭlino? Ĉu vi ŝatas la arbarajn bestojn? Ĉu en la arbaro estas multaj bestoj?

Ĉu vi havas libron en kiu estas multaj esperantaj kaj nacilingvaj vortoj? Kio estas ĝi? (Ĝi estas vortaro.)

Ĉu vi havas vortaron? Kia estas via vortaro?

La homoj, kiuj loĝas en Eŭropo, Azio, Afriko ktp. (= kaj tiel plu) estas homaro.

Ĉu Esperanto estas la lingvo de la tuta homaro? Kio estas Esperanto?

Vagonaro, arbaro, vortaro, homaro.

Aro = multaj egalaj (laboristaro, libraro) per unu vorto.



Se mi estus riĉa...

Kion vi farus, se vi estus riĉa? Ĉu vi vojaĝus al Parizo? Kion vi farus en Parizo? Ĉu vi rigardus la muzeojn? Ĉu vi irus en la teatrojn? Kien vi vojaĝus el Parizo? Ĉu vi donus monon al la esperantistaro? Ĉu vi havus flugmaŝinon? Al kiu vi donus monon? Kion vi farus, se vi estus ministro? Kion vi farus, se vi estus perfekta esperantisto? Ĉu vi skribus leteron al alia lando? (Ĉu vi skribus al eksterlando?) Ĉu vi respondus en longa letero, se oni skribus al vi belan leteron?

**Jen la formoj de la verbo:**

Mi laboras, mi laboris, mi laboros, mi laborus.

Laboru, labori.

Sinjoro kaj sinjorino estas ĝesinjoroj. Edzo kaj edzino estas ĝedzoj.

Lernanto kaj lernantino estas ĝelernantoj.



*Ge* = vira kaj virina personoj per unu vorto.

Se fraŭlino kaj fraŭlo amas *unu la alian*, — nu kion faras la fraŭlo?

Li iras kun la fraŭlino en la arbaro, ne dum la tago, sed dum la vespero. La luno tre bele brilas.

Poste ili estas gefianĉoj.



Fianĉo + fianĉino  
= gefianĉoj.



Patro, filo. La filo  
similas la patron.

Ĉu la patro havas tri harojn kaj grandajn orelojn? Ĉu ankaŭ la filo

havas harojn? Kiu similas al la patro? Ĉu vi similas al via patro?

La patro kaj la patrino estas gepatroj.

En la familio: knabo — filo, knabino — filino.

Ĉu viaj gepatroj havas gefilojn? Kie vivas viaj gepatroj? Ĉu vi havas filinon?



Inter Eŭropo kaj Ameriko estas granda maro (oceano)

Kion faras la feliĉaj gefianĉoj? Ĉu ili ŝatas esti *inter* multa homoj? Ĉu vi estas fianĉo?

## Notas

1. **Sur la tomo**—sobre la tumba, **sur la tombon**—(en dirección a) sobre la tumba. **Kie**—donde (en que lugar) **Kien**—adonde (a que lugar). **Kien vi iras?** Mi iras hejmen (a casa). **Kie vi estas?** Mi estas hejme (en casa). Este uso de la **n** se llama acusativo de dirección. Hemos visto que una preposición (en, sur, etc.) es comunmente seguida por la forma simple a nominativa de un nombre o pronombre. Pero, cuando en lugar de significar en una cierta posición, se quiere señalar movimiento de traslación a, hacia una cierta posición, el nombre o pronombre toma el acusativo de dirección. **Kie vi estas?** Mi estas en la ĉambro. **Kien vi iras?** Mi iras en la ĉambro (hacia dentro de la pieza). **La hundo kuras en la ĝardeno**—el perro corre en el jardín (o por el jardín, estando ya adentro), **la hundo kuras en la ĝardenon** (en el jardín, desde afuera) la ĝlaso estas sur la tablo. Mi metas la ĝlason sur la tablon. El acusativo de dirección no se lo usará, por superfluo, después de preposiciones que, como **al** y **ĝis**, indiquen dirección.
2. El sufijo **-ar** señala una colección, conjunto o serie de cosas similares: **arbo**—árbol, **arbaro**—bosque, **vagono**—vagón, **vagonaro**—tren, **homo**—hombre, **homaro**—humanidad, **vorto**—palabra, **vortaro**—vocabulario, diccionario.
3. **Nacilingva**—en nacia lingvo (angla, japana).

4. **Plu**—más (algo más) **kaj tiel plu** (ktp) etcétera (y así lo demás).
5. El verbo terminado en **-us** expresa condición o suposición, y se llama **modo condicional**. **Kion vi farus se vi estus riĉa?** ¿Que haría Ud. si fuera rico?
6. **Si** se traduce por **se** sólo cuando éste introduce a una condición o suposición. Cuando exprese duda se usa **ĉu**: **Pregŭntele si es rico**—Demandu al li, **ĉu li estas riĉa**.
7. **Eksterlando**—país extranjero. **Eksterlanden**—en el (al) extranjero.
8. **Jen**—he aquí.
9. El prefijo **ge-** indica reunión de los dos sexos: **Gesinjoroj**—señores y señoras, **Gesinjoroj Adamson**—el señor y la señora A., **gepatroj**—padre(s) y madre(s), **gefratoj**—hermano(s) y hermana(s).
10. **Unu la alian**—el uno al otro.
11. **Inter**—entre.

### Traduzca al Esperanto :

Los novios son muy felices, pero los esposos frecuentemente son infelices. Los niños del señor se amaban el uno al otro. Adamson estaba de pie sobre el trampolín (saltejo ó saltotabulo). A él no le gustaba el agua fría, y pensaba que después de todo (tamen) no se bañaría. Pero el valiente deportista vino y corrió al trampolín. Adamson se asustó mucho, gritó, pero sin resultado, porque se cayó al agua. Yo pasé largo tiempo en el bosque. ¿Vendrá Ud. mañana conmigo al (en el) bosque? Si fuésemos al teatro ¿qué veríamos?

### T a r e a :

Conteste en Esperanto las preguntas de esta lección bajo título " Se mi estus riĉa."

## Deka (10-a) Leciono

Kiel vi fartas hodiaŭ? Ĉu vi laboris hieraŭ? Kiel vi venis hejmen (kien — hejmen) hieraŭ? Ĉu piede aŭ per aŭtomobilo? Aŭ eble per tramo (= elektra vagono)?



**Si beligas sin. La ruĝeco de la lipoj ne estas natura.**

Kion faras la fraŭlino? Ŝi ruĝigas siajn lipojn.

Ĉu vi ŝatas la naturon? Ĉu la ruĝeco de la fraŭlino estas natura? Ĉu vi ŝatas la nature belan virinon? Ĉu ŝi havas naturan belecon? Ĉu Esperanto estas facila lingvo? Ĉu la facileco de Esperanto faciligas vian laboron? Ĉu la kato kaj hundo vivas en bona amikeco?

**Eco — boneco, beleco, juneco, ruĝeco, amikeco, kaj tiel plu.**



**La parolemaj sinjorinoj.**

Kion faras la du sinjorinoj? Ĉu ili ŝatas paroli? Ĉu ili ŝatas paroli pri la homoj? Ĉu ili estas junaj? Ĉu ili tre ŝatas paroli?

Ĉu la malgrandaj infano tre ŝatas plori? Ĉu la katido tre ŝatas ludi? Ĉu la hundo ŝatas boji?

La sinjorinoj havas grandan humoron paroli, ili estas parolemaj.

La malgranda infano havas grandan humoron plori, ĝi estas plorema, la katido ŝatas ludi, ĝi estas ludema, la hundoj estas bojemaj.

**Emo — havi humoron, ŝaton por io.**

Kiaj estas la du sinjorinoj? Ĉu vi havas paroleman karakteron? Ĉu vi estas nun dormema?



**Adamson kun la aŭtosignalilo.**

Kiu venas? Kio estas en la mano de Adamson? (Ĝi estas aŭtotrumpeto aŭ signalilo.) Kion faras li per la signalilo? (Li signalas.)

Kion faras la parolemaj sinjorinoj? (Iliaj koroj forte batas, ili timas.)

Kion faris Adamson? (Li timigis la parolemajn sinjorinojn.) Kiu timigis ilin? Per kio li timigis ilin? Kiu estas timemaj? Ĉu la infanoj ofte estas timemaj? Kiel Adamson timigis la parolemajn virinojn?



### La rigardema vilaĝano.


Kion faras la viro? Ĉu li ŝatas rigardi? Kia li estas? Ĉu vi estas rigardema? Ĉu vi loĝas en urbo? Ĉu Stockholm estas urbo? Ĉu vi pensas, ke tiu viro loĝas en urbo?

Vi estas urbano, sed li loĝas en vilaĝo, li estas vilaĝano.

Ĉu la vilaĝano ŝatas stari antaŭ la montra fenestro? Ĉu vi estas vilaĝano? Ĉu vi ŝatas esti en klubo? Ĉu vi estas klubano? Ĉu vi estas ano de Esperanto-klubo? Ĉu vi estos ano de Esperanto-klubo? Kiu estas akademiano? (Li estas ano de la akademio.)

### Akademiano, urbano, vilaĝano, klubano.

Ĉu vi komprenas kion signifas ano?



Kiu venas? Kion faras Adamson? Kion faras la vilaĝano? Kial saltis la vilaĝano el la botoj? Ĉu la vilaĝano estas timema en la urbo? Ĉu li timas la aŭtomobilojn?

### Anekdoto:

Oni parolas pri la maliuneco. Sinjoro diras — Mia avino mortis en sia 96-a jaro (avino estas la patrino de la patro aŭ patrino).

La alia diras: — Mia onklo (la frato de la patro aŭ patrino) mortis en sia 103-a jaro.

La tria sinjoro diras: — Tio estas nenio. Mi havas onklon. Li absolute ne mortis. Li ankoraŭ vivas.

Ĉu via avo vivas? Ĉu viaj geavoj vivis en la sama urbo, kiel vi? Kie vivas viaj gepatroj? Ĉu vi havas geonklojn ĉi tie? Ĉu vi havas onklon en Ameriko? Ĉu li estas riĉa?

Vi diras al la frato de via patro aŭ patrino: Onklo.

Kaj li diras pri vi: Jen mia nevo (nevino).

Vi estas nevo de via onklo kaj nepo (nepino) de via avo. Ĉu via avo havas multajn genepojn?

Se viaj gepatroj havas aliajn gefilojn, ili estas viaj fratoj aŭ fratinoj (gefratoj). La gefiloj de via onklo estas viaj *kuzoj* aŭ kuzinoj (gekuzoj).

Ĉu vi havas belan kuzinon? Ĉu vi havas multajn gefratojn? Kie estas via fratino? Kia ŝi estas? Ĉu vi havas pli junajn fratojn ol vi? Kio estas via frato? Ĉu vi havas nevon?



La malgranda bofilo kun la energia bopatrino.

Ĉu la edzo havas nur unu familion? (Ne, li havas du familiojn, sian familion kaj la familion de la edzino. Li havas patron kaj bopatron, patrinon kaj bopatrinojn, fratojn kaj bofratojn, fratinojn kaj bofratinojn. La bopatro kaj bopatrino — bogepatroj — havas bofilon aŭ bofilinon.)


Ĉu vi havas bogepatrojn? Ĉu vi havas simpatian bopatrinojn? Ĉu la bopatrinoj estas simpatiaj en la anekdotoj? Kion faras la bopatrino sur

la bildo? Kia estas via bopatrino? Ĉu vi havas bopatron? Ĉu li vivas?

### Anekdotoj:

Ĉu vi volas, ke mi rakontu al vi bopatrino-anekdoton?

Nu jen: La samaj tri sinjoroj parolas:



Li klinas sin.

La unua: — Mia onklo estas ministro. Oni *klinas* sin antaŭ li kaj diras: — Ho Ministra Moŝto . . . .

La dua: — Mia kuzo estas pli granda *persono*. Li estas *episkopo*. Ĉiu klinas sin antaŭ li ĝis la tero kaj diras: — Episkopa Moŝto, Episkopa Moŝto . . . .

La tria: — Nenio! Mi havas bopatrinojn; se ŝi venas, oni rigardas al la ĉielo kaj diras — mia Dio, ho mia Dio! kaj oni kuras!

Ĝis revido! Mi deziras al vi bonan bopatrinojn!

## Notas

1. **Piede**—a pie.
2. El sufijo **-ec** denota cualidad o condición: **-ez**, **-ad**, **-ancia**, **-idad**. **infaneco**—niñez, infancia, **amikeco**—amistad, **unueco**—unidad.
3. El sufijo **-em** denota propensión, inclinación, disposición: **mensogi**—mentir, **mensogema**—mentiroso, **ludema**—juguetón, **laborema**—trabajador, laborioso.
4. **Tim-igi** — atemorizar (causar temor).
5. El sufijo **-an** señala al habitante, al miembro, al partidario. **Amerikano**—un americano, **urbano**—un habitante de ciudad (urbe), **vilagano**—aldeano, **klubano**—miembro de un club, **kristano**—cristiano.
6. Los parientes femeninos se forman agregando el sufijo **-in** a la raíz del correspondiente masculino. **Patrino**—madre, **fratino**—hermana, **avino**—abuela, **onklino**—tía, etc.
7. El prefijo **bo-** señala el parentesco político.

8. La terminación **-u** es usada también para indicar órdenes indirectas y expresiones de deseos: **Ĉu vi volas, ke mi rakontu?** ¿Quiere Ud. que yo relate? **Ĉu mi telefonu al vi?**—¿Lo llamo a Ud. por teléfono? **Mi deziras, ke li venu**—Yo deseo que él venga.
10. **Moŝto** forma títulos honoríficos. **Ministra Moŝto**—Su Excelencia, **Episkopa Moŝto**—Su Señoría Ilustrísima, **Lia Reĝa Moŝto**—Su Majestad.

### Traduzca al Esperanto :

El aldeano, que era una persona muy curiosa (scivola—que quiere saber), estaba parado ante la vidriera (montrufenestro) del negocio y la miraba. Pero detrás venía Adamson con la gran corneta de automóvil y sonó con ella. El aldeano se asustó mucho y saltó de (adentro de) sus botas. Se cuentan muchas anécdotas acerca de las suegras. Mi amigo vive en buena amistad con su suegra, en la misma aldea, hasta (eĉ) en la misma casa.

### T a r e a :

Forme todos los derivados que pueda de la raíz **PATR'**

Conteste en Esperanto las preguntas de párrafo "Ŝi beligas sin", primera columna de esta lección.

## Dek-unua (11-a) Leciono.

Ĉu vi ŝatas la muzikon? Ĉu vi ŝatas la muzikon de Beethoven? Ĉu vi ŝatas la *popolkanton*? (Kanto = parolo kun melodio.)

Mi aŭdis belan gramofondiskon en Esperanto. Ĝia *titolo* estas "En la *drinkejo*." (Drinkejo estas loko, kie oni trinkas multan vinon, bieron kaj brandon.)

Unu el la kantoj, kiun mi aŭdis, havas la jenan tekston:

*Unua strofo:*

*Tra la stratoj, tra la stratoj  
Marŝas, marŝas la soldatoj,  
Deksesjara, bruna junulino  
Iras ĉe l' regimentfino.*

Ĉu vi komprenas la vortojn? Soldato estas homo en uniformo.

Junulino estas juna fraŭlino. Junulo estas juna viro. Fortulo estas forta viro. Belulino estas bela virino.

La vortoparto *-ul-*, kiu estas en la fino de la vorto (sufikso) signifas la personigon de la adjektivo.

Ĉu vi estas fortulo? Ĉu en via urbo estas multaj belulinoj? Ĉu vi estas junulo? Ĉu via patro estas maljunulo? Kie iris la bruna junulino? Kie vi sidas?

Ĉu la popolkantoj estas belaj? (La popolkantoj *plaĉas* al mi.) Ĉu la belulinoj *plaĉas* al vi? Kio *plaĉas* al vi? Ĉu Esperanto *plaĉas* al vi? Kial ĝi *plaĉas* al vi? Ĉu via urbo *plaĉas* al vi? Kial ĝi *plaĉas* al vi? Kia ĝi estas?

Ĉu la edzoj estas feliĉaj? Ĉu estas ankaŭ malfeliĉaj edzoj? Kion ili faras? (Ili iras al la advokato, kaj li *helpas* al ili esti *eksedzoj*.)



**Eksedzo.**

Ĉu vi estas eksedzo? Kio estas eksministro? (Sinjoro, kiu jam ne estas ministro, sed nur estis.)

Ĉu vi estas soldato? Ĉu vi estas eksoldato? (Mi pensas, ke mi estos post ne longa tempo via eksinstruisto.)

**Malplena, preskaŭ plena, plena, plena.**



Kia estas la unua, dua, tria glaso?



**Trinkanta, manĝanta.**

Kion faras la sinjoro? Li manĝas? (Li estas manĝanta homo.) Kion faras la sinjorino? (Ŝi estas trinkanta.)

Ĉu vi manĝas nun? (Ne, mi legas.) Ĉu vi estas manĝanta homo? (Ne, sed leganta.)

Ĉu la sidanta hundo dormas ?  
 Ĉu la leporo venas al la dormanta  
 Adamson ? Ĉu Adamson vidis la  
 venantan leporon ?



### Manĝonta.

Ĉu Adamson estas en la resto-  
 racio ? Kie li estas ? Ĉu li manĝas ?  
 (Ne, li manĝos.) Ĉu Adamson estas  
 manĝanta ? (Ne, sed li estas manĝonta.)

La manĝanta homo manĝas, la  
 manĝonta homo manĝos.

Ĉu la fluganta birdo estas en la  
 aero ? Kie estas la fluganta birdo ?  
 Ĉu vi estas urbano ? Ĉu vi loĝas  
 en urbo ? Ĉu vi estas urba loĝanto ?  
 Kia loĝanto estas la urbano ? Ĉu la  
 trinkonta sinjoro havas plenan glason ?



### Manĝinta.

Ĉu Adamson manĝas ? Ĉu li estas  
 manĝanta ? Ĉu li manĝos ? Ĉu li  
 estas manĝonta ? Ĉu li manĝis ?  
 (Adamson estas manĝinta.)

Kion faras la kelnero ? Kia estas  
 la manĝinta Adamson ? (La man-  
 ĝinta Adamson estas pli dika, ol la  
 manĝonta Adamson, ĉu ne ?) Kie  
 estas la fluganta birdo ? Kie estas la  
 fluginta birdo ? Ĉu la glaso de la  
 trinkinta homo estas plena ? Kia  
 estas la glaso de la trinkinta homo ?

### Rakonto :

Kaj nun vi povos legi modernan  
 historion :

En la sama lando, kie vi vivas, estis  
 juna esperantisto. Li legis la esper-  
 antajn gazetojn, li estis do leganto de  
 la gazetoj. En la gazeto estis multaj  
 anoncoj kaj inter la anoncoj li vidis la  
 jenan :

Bela, juna, eleganta, simpatia ho-  
 tentota fraŭlino deziras korespondi  
 kun inteligenta sinjoro. Adreso: Fraŭ-  
 lino A. Mumin, Hotentotburg, Hoten-  
 totlando.

La juna esperantisto skribis mallon-  
 gan, sed belan leteron al la fraŭlino :





Amsterholm, la 1-an de aprilo, 1934.

Kara Fraŭlino, mi legis vian anoncon. Mi ankoraŭ ne vidis vin, sed tamen vi estas jam nun simpatia al mi. Mi estas juna fraŭlo, mi tre ŝatas korespondi kaj speciale mi ŝatas la hotentotan nacion. Mi petas Vin, respondu post tre mallonga tempo, respondu do baldaŭ al, Via

Karlo Amido.

Nu, kion li faris per la letero? Li metis ĝin en koverton, li prenis malgrandan paperon, *poŝtmarkon*, la poŝtmarkon li gluis sur la koverton. Sur la koverton li skribis la adreson de la fraŭlino.



Li sendas la leteron.

La juna esperantisto nun jetis la leteron en poŝtokeston kaj sendis ĝin al Hotentotburg. Post 2 semajnoj venis la respondo. Ĝi ne estis longa, sed tre simpatia.

Hotentotburg, la 15-an de aprilo, 1934.

Sinjoro, — ne, ne sinjoro, mi estas Esperantistino, vi estas Esperantisto, ni estas anoj de la sama ideo, vi estas do mia *Samideano*, — nu kara Samideano, mi legis vian belan leteron. Mi estos via korespondantino. Nun mi ne havas multan tempon, sed poste mi skribos multe. Sed mi sendas mian novan portreton. Multajn koraĵajn salutajn sendas al vi.

Via

A. Mumin.



La hotentota portreto, kiu tre plaĉas al li.

La korespondantino plaĉis al via samlandano. Li sendis novan leteron kaj venis nova interesa respondo. La sinjoro pensis, ke li amas la fraŭlinon. Li ne pensis, ke li jam amas la fraŭlinon, sed lia koro diris al li, ke li amas ŝin. Ĉu vi pensas, ke li estis jam amanta? Ne, li estis amonta.

La leteroj venis, la leteroj iris, kaj venis bela tago, kaj la sinjoro ricevis telegramon.



La sinjoro estis feliĉa, feliĉega. Li estis senpacienca, kaj li iris al la *stacidomo*. Lia koro batis forte. Li atendis en la stacidomo kun batanta koro. Li atendis en la atendejo de la stacidomo kaj jen, alvenis la vagonaro, kaj ĝi *haltis*.

La sinjoro vidis en la fenestro de la unua klaso belan, elegantan, junan fraŭlinon. Jes, estis ŝi. La sinjoro en la sama momento estis jam amanta.



La geamantoj  
kisas ne  
unufoje, ne  
dufoje, sed  
multfoje.

La sinjoro ridis, ankaŭ la fraŭlino ridis. La sinjoro estis amanta, kaj ankaŭ la fraŭlino estis amanta. Ili promenis multe, ne dum la tago, sed dum la vespero, ne sub la suno, sed sub la luno, kaj ili ne parolis pri la politiko, sed ili kisis. Kaj ili ne kisis unufoje, ne dufoje, ne trifoje, ne kvarfoje, ne dekfoje, sed multfoje; kaj poste ili iris al la pastro kaj ili estis edzo kaj edzino.



Kaj nun venas la melankolia parto de la historio. Post tri monatoj la sinjoro

jam ne estis amonta, ne amanta, li jam plu ne amis la sinjorinon, sed li estis aminta. Kien iris la aminta sinjoro? Al la advokato.



La aminta sinjoro.

*Nun bonvolu respondi al la demandoj.*

En kiu lando loĝis la sinjoro? Ĉu vi estas New-Yorka loĝanto? Ĉu vi estas leganto de la Esperantaj gazetoj? Ĉu la veninta fraŭlino plaĉis al la sinjoro? Kie li atendis ŝin? Ĉu ili parolis angle? Kiel ili parolis? Kie promenis la geamantoj? Ĉu ili kisis nur unufoje? Ĉu ili parolis pri la politiko? Kien ili iris? Kiu geedzigis ilin? Ĉu la sinjoro estis longtempe amanto? Kiel plaĉis al vi la historio?

Ĉu vi estas laca jam, ĉu vi lernis multe hodiaŭ? Vi ne plu lernu do! Ĝis revido! Belan songon mi deziras al vi pri hotentota fraŭlino aŭ sinjoro.

### T r a d u z c a :

- 1.- Cuando llegó el telegrama, le escribí a mi cuñado.
- 2.- Mientras escribía la carta, entró en la habitación Pedro, quien me dijo que (ke) su tío estaba por morir.

## Notas

1. **Popolo**—pueblo, conjunto de habitantes. **Popolkanto**—canción popular.
2. **Drinki**—beber bebidas alcohólicas con exceso, por vicio. No confundir con **trinki**—beber simplemente.
3. **Tra**—a través.
4. El sufijo **-ul** señala al individuo que posee la cualidad expresada por la raíz: **junulo**—un joven, **maljunulo**—un viejo, **drinkemulo**—un borracho, un bebedor, **belulino**—una belleza (una mujer bella) (comparar con **beleco**—la belleza, lo bello).
5. **l'**=**la**. En poesía **la** puede ser abreviado en **l'**, que se pronuncia agregando el sonido **l** a la vocal que lo precede. De **l'** se pronuncia así: **del**.
6. **Plaĉas al**—place a. **La kanto plaĉas al mi**—el canto me place, **mi ŝatas la kanton**—me gusta el canto. **La kanto plaĉas**—el canto place (por sus cualidades placenteras). **Mi ŝatas**—yo gusto de (por mi apreciación personal).
7. **Eks**—ex. **Eksedzo**—exesposo, divorciado.
8. **-anta**—haciendo algo. **homo kantanta**—hombre cantando, que canta. **-onta**—por hacer algo (en el futuro). **Infano mangonta**—un niño que comerá. **-inta**—que ha hecho algo. **Falinta folio**—hoja caída. Estos son los **participios activos**, y son tratados como adjetivos. **Mi vidis la falintajn foliojn**—Nota: **-as**, **-anta** (presente) **-is**, **-inta** (pasado), **-os**, **-onta** (futuro).
9. Cuando el participio tiene la terminación del sustantivo **-o**, significa persona que está ejecutando (**-anto**), ha ejecutado (**-into**) o ejecutará (**-onto**) una acción. **Leganto** (leganta homo) **lernanto** (ver pág. 13, Nota 2), **la venkinto**

—el vencedor (el que ha vencido). En la primera figura, pág. 46: **la saltonto kuras**.

10. **Fraŭlo**—hombre soltero, mozo, **fraŭlino**—señorita.
11. **Mi petas vin**—le ruego a Ud.
12. **Sam'ide'an'o**=**ano de sama ideo**—coidealista, correligionario. Esta expresión es usada corrientemente en el trato entre esperantistas. **Samlandano**—compatriota.
13. **Li pensis, ke li amos**—él pensó que amaría (que iba a amar). Cuando se refiere a lo que otras personas dicen o piensan, en Esperanto siempre se pone el verbo en el tiempo que hubiera sido usado en la voz directa. **Li diris: "Mi venos."** **Li diris, ke li venos**.
14. **Stacio**—estación, apeadero. **Stacido**—estación (edificio).
15. **-foje**—vez, **unufoje**—una vez, **dufoje**, **multfoje**. **Unufoj**—por primera vez.
16. **Bon'volu**—tenga Ud. la bondad, haga Ud. el favor, quiera Ud. bien. **Bonvolu respondi**=**respondu, mi petas vin**—le ruego contestar, haga Ud. el favor de contestar.
17. **Angle**—en inglés. **Parolu esperante**=**Parolu Esperanton**—Hable (en) Esperanto.

## Traduzca al Esperanto:

A la joven le gusta (use **plaĉi**) el canto, pero no le gustan los cantantes. Sobre un árbol caído está posado un pájaro cantando. El orador, que era un exministro, dijo que él no pudo comprender al que había hablado ("prehablante"). Los paseantes oyeron pájaros que cantaban (cantando) en el bosque. El que escribió esta carta es un hombre soltero. Le ruego que me envíe su retrato. Ella vió al anciano tres veces.

## Dek-dua (12-a) Leciono

Bonan tagon! Kiel vi fartas? Kie vi estis hieraŭ? Ĉu vi estis hodiaŭ jam en la urbo? Ĉu vi ofte rigardas filmojn? Kiu filmo plaĉis al vi? Kial ĝi plaĉis al vi?



*Kiam estis la milito?*

*Kiam — en kiu tempo?*

Mi estis hodiaŭ en la teatro. *Kiam* vi estis tie? *Kiam* vi parolis kun via amiko? *Kiam* vi lernas Esperanton? Ĉu vi lernas dum la tago kaj dum la nokto? Ĉu vi lernas *ĉiam*? *Kiam* vi estis en Afriko? (*Mi neniam estis tie.*)


*Kiam* vi laboras? Ĉu vi laboras de matene ĝis vespere? *Kiam* vi matenmanĝas? *Kiam* vi tagmanĝas? Ĉu vi manĝas unufoje dum la tago?

*Kiam* vi venos al mi? (*Mi venos al vi dum la semajno, sed mi ne scias precize, kiam. Mi venos al vi iam dum la semajno.*) Ĉu mi povas veni? (*Jes, bonvenon!* Vi povas veni lunde, marde, merkrede, ĵaŭde, vendrede, sabate, kiam ajn.) Sed mi povas veni nur en mia laborkostumo. (Vi povas veni kiel ajn!)




*Adamson lavas subvestojn.*

Kion faras Adamson? Kiu lavas? Kion li lavas? Ĉu Adamson lavas vin. *Kiam* vi lavas vin? Ĉu oni lavas sin ĉiutage? Per kio oni lavas sin? (Per akvo kaj *sapo.*) Ĉu vi havas banĉambron en via loĝejo? Ĉu vi lavas vin tie? Ĉu vi ofte banas vin?



*Li portas ilin al la flagstango.*

Kion faras Adamson? (*Li portas la vestojn.*) Kien li portas la vestojn? (*Li portas ilin al alta stango, kien oni metas flagojn.*)




**Anstataŭ flago la subvestoj estas sur la stango.**

Kion portas Adamson al la flagstango? Ĉu flago estas sur la flagostango? Kion vi vidas anstataŭ flago? Ĉu Adamson havas interesajn pensojn?

Ĉu vi trinkas teon anstataŭ kafe? Kion vi havas anstataŭ mono? (Mi havas fantazion.)

Ĉu vi skribas? Ĉu vi estas skribanta? Ĉu la letero estas skribanta? (Vi estas skribanta. La letero estas skribata.)



**Skribota, skribata,**

**skribita letero.**

Ĉu vi skribos? Ĉu la letero estas skribata? (La letero estas skribota.) Kia papero estas la skribota letero? (Pura papero.)

Ĉu la amota fraŭlino estis bela? Kie estas la skribata letero? Kie estas la skribita letero? (Ĝi estas en la koverto.)



Kion faras la sinjoro? (Li donas manĝi al la hundo.) Ĉu la hundo volas manĝi? Ĉu la sinjoro estas leganta? Ĉu la legata gazeto estas interesa?



**Kion faras la ligita hundo?**

Kion faras la hundo? (Ĝi tiras la seĝon el sub la fraŭlino.) Kial ĝi eltiras la seĝon? (Ĉar la fraŭlino ligis la hundon al la seĝo kaj la ligita hundo volas manĝi.)

Ĉu la gazeto estas legata? Kia estas la gazeto?

Ĉu la legita anonco plaĉis al la sinjoro? Ĉu la responditaj demandoj estis kompreneblaj? Ĉu Esperanto estas ŝatata de vi? Ĉu ĝi estas parolata de vi? Ĉu ĝi estos ĉiam parolata de vi? Ĉu Esperanto estas parolata en la tuta mondo? Ĉu la ruĝigitaj lipoj plaĉas al vi? Ĉu la aŭdita anekdoto estis ridiga? Ĉu vi deziras aŭdi anekdoton? Ĉu la anekdoto estas legota?



**Prahomo.**

Ĉu la sinjoro estas nuna homo? Kia homo li estas? Ĉu la prauloj

de la homoj estis bestoj? Kiu besto estas la prapatro de la homo? Ĉu vi aŭdis pri la Sud-Amerikaj praarbaroj? Ĉu vi estis tie?



**Dekstra mano.**

**Maldekstra (ĉe la koro.)**

### Anekdoto :

La malgranda Erik ne ŝatas la lernejon. Matene li diras al la gepatroj, ke li estas malsana. La gepatroj telefonas al la doktoro kaj kuŝigas la infanon. La doktoro respondas, ke li povas veni nur post la tagmanĝo. Sed tiam Erik jam ne volas esti en la lito. Tamen li devas resti.

La doktoro venas, sidas sur la liton de Erik kaj demandas :

— Nu Erik, ĉu vi estas malsana? Kie doloras al vi? Montru vian langon.

La lango estas normala. — Ĉu eble la kapo doloras al vi? — Ne. — Sed eble la stomako doloras al vi? — Ne. — Ĉu la dorso? — Ne. — Sed kio doloras al vi, demandas la kuracisto.

— Mia dekstra piedo — respondas Erik.

— Sed kio okazis al via piedo?

— Kio okazis? Nenio, nur ke vi sidas sur ĝi.

**Demandoj :** Ĉu vi komprenis la rakontitan anekdoton? Kiu estis malsana? Al kiu telefonis la gepatroj? Kiam venis la doktoro? Kion li faris? Kie li sidis? Kio doloris al Erik? Kial lia piedo doloris? Kiu

piedo doloris? Ĉu la maldekstra piedo doloris? Kiu sidis sur la piedo?

*Skribu kaj diru la anekdoton parkere (= sen libro.)*

Ĉu Erik havis patron kaj patrinojn? Ĉu li diris al ili: Patro, Patrino? (Ne, li diris al ili pli bele kaj infane: Paĉjo, Panjo.)

Aliaj nomoj kun la *intima formo*: Jozefo, Joĉjo, Johano, Johanĉjo, ktp.; Elizabeto, Elinjo, Heleno, Henjo.

*Sed ni ne uzas ofte tiujn intimajn formojn en Esperanto.*

Hodiaŭ ni lernos ankaŭ kalkuli en Esperanto.

Kvin plus ses = dek unu  
( $5+6=11$ )


Ses minus kvin = unu  
( $6-5=1$ )

Sesoble ses = 36.  
( $6 \times 6=36$ )

Duone ses = 3  
( $6 \div 2=3$ )

**Tuta cirklo.**

**Duono, kvarono.**



$\frac{1}{2}$  = duono,  $\frac{1}{3}$  = triono,  $\frac{1}{4}$  = kvarono,  $\frac{1}{5}$  = kvinono ktp.

$\frac{2}{3}$  = du trionoj,  $\frac{4}{5}$  = kvin okonoj ktp.

En la venonta leciono (la leciono, kiu venos, estas venonta leciono) ni kalkulos multe.

Sed nun ni finas la lecionon. La dek-dua leciono estas finita.

## Notas

1. **Kiam**—cuando, **tiam**—entonces, **ĉiam**—siempre, **neniam**—nunca, **iam**—alguna vez.
2. **Scii**—saber. Separe al pronunciar los dos sonidos **s-c** (ts); ejercítese con frases como ésta: mi ne scias, ligando el sonido **s** a la vocal anterior (ne-s-cias).
3. **Bonvenon**—saludo de bienvenida, ¡Bienvenido!
4. . . . **ajn**— . . . quiera, **kiu ajn**—cualquiera, quienquiera, **kiam ajn**—en cualquier momento, **kiel ajn**—de cualquier modo.
5. **Flagstango, flagostango**. Al formar la palabra compuesta, se suele colocar la terminación **o** entre dos elementos para facilitar su pronunciación. **Dormoĉambro (dormĉambro)**—dormitorio.
6. **-ata, -ita, -ota**. **Skribata**—que está siendo escrita, **skribita**—que está (ya) escrita, **skribota**—que será escrita. Estos son los **participios pasivos**, usados para calificar a las personas o cosas que están sufriendo (**-ata**), que han sufrido (**-ita**), o que habrán de sufrir (**-ota**), una acción, mientras el participio activo (ver lección anterior) señala al agente de una acción. **Nota:** Presente: **-as, -anta, -ata**, pasado: **-is, -inta, -ita**; futuro: **-os, -onta, -ota**. **Por** después de la forma pasiva es indicado por **de**. La letero estas skribita de mi. La carta fué escrita por mí.
7. El prefijo **pra-** indica lo primitivo, el parentesco alejado: **prapatro**—

tatarabuelo, antepasado, **praarbaro**—selva virgen, bosque primitivo.

8. **-ĉjo -njo**. Así como en español formamos mamita, mamá de madre y Juanillo o Juancito de Juan, en Esperanto los diminutivos familiares o cariñosos se pueden formar reemplazando la última parte del nombre por **-ĉjo** en el masculino y **-njo** en el femenino. **Paĉjo**—papá, papito, papacito, **Panjo**—mamá, mamita.
9. El sufijo **-obl** forma los múltiplos. **Duobla**—doble, **triobla**—triple, **multobligi**—multiplicar. **Trioble ses estas dek ok**—Tres veces seis son dieciocho. No confundir **-oble** (multiplicación) con **-foje** (repetición).
10. El sufijo **-on** forma las fracciones. **Duono**—un medio, **kvinono**—un quinto, **tri okonoj**—tres octavos. No confundir **okono** (fracción) con **oka**—octavo en un orden de sucesión. La división se expresa así: **duone ses estas tri**.

## Traduzca al Esperanto:

Nunca le dolió la cabeza durante toda su vida. El pagaba con bondad en lugar de dinero. Cinco veces doce son sesenta. Adamson lavó su ropa interior y luego la izó (hisis) sobre el asta de la bandera. El pie derecho del muchacho le dolía mucho, porque el doctor se sentó sobre él. Sea cualquiera quien venga, diga que no estoy en casa (hejme). La mitad del bosque cayó debido al ciclón (ciklono). La tercera parte de sesenta es veinte.

## Tarea:

Describe la historieta de Adamson de las páginas 41 y 42 empleando palabras propias.

## Dek-tria (13-a) Leciono.




Adamson kaj la malmola viando.

La telero flugas.

Kion faras Adamson? Ĉu li povas manĝi la anseron? (Ne, ĉar la ansero estas tre malmola. La viando de la ansero estas malmola.)

Ĉu vi ŝatas la malmolan viandon? Kiu ŝatas ĝin? (Mi pensas, ke neniu ŝatas ĝin.)

Kion faras la viando? Kio estas en la mano de Adamson? Kion faras la telero?



Adamson volas mueli la viandon.

Kion faras Adamson? (Li volas mueli la viandon.)

Kial li volas mueli ĝin? Per kio li muelas ĝin? (Per viandmuelilo.) Kia estas la muelita viando? Ĉu vi havas hejme viandmuelilon? Kie estas la muelata viando?

Ĉu Adamson estas forta? Kion li faras? (Li streĉas sian forton.)



La malmola viando rompas la muelilon.

Kio estas pli malmola, la viando aŭ la muelilo? Ĉu la muelota viando estas mola? Kiu streĉis sian forton? Kion faras la viando?



Adamson estas laca kaj malkontenta



Kion faras Adamson? Ĉu li estas laca? Ĉu la rompita muelilo povis mueli la malmolan viandon? Ĉu Adamson estas *kontenta*? Ĉu mi povas esti kontenta pri vi? Ĉu vi estas kontenta pri via instruisto? Ĉu la viando estas muelita? Ĉu ĝi estas muelebla? Kie estas la nemuelebla viando? Kian viandon vi ŝatas? Ĉu la tre malmola viando estas manĝebla? Kial vi ne ŝatas la malmolan viandon?



Kulero, forko.

Ĉu vi ŝatas la viandon? Ĉu vi manĝas la viandon per mano? (Per *forko* kaj tranĉilo.)

Ĉu oni manĝas la supon per forko? (Ne, sed per *kulero*.)

Ĉu la varmega supo estas manĝebla? Ĉu vi ŝatas manĝi en restoracio?

#### En restoracio.

Certe vi havas grandan fantazion. Nun ni iros en elegantan kaj esperantan restoracion kaj ni manĝos tie.

En la pordo staras la pordisto. Kion li faras? (Li *salutas* nin.) Kiel li salutas nin? (Esperante, kompreneble.) Kia estas la restoracio? Kio estas sur la tabloj?

Sur la tabloj estas objektoj. Sur la tablo estas blanka *tuko*, telero kaj mangiloj.

Kia estas la tablotuko? Kia estas la telero? Ĉu la telero estas el *porcelano*? Ĉu la mangiloj estas el porcelano? (Ne, sed el *argento*.) Ĉu la ringo estas el *argento*? (Ne, sed ĝi estas el *oro*.)

Sur la tablo estas ankaŭ aliaj objektoj. *Ekzemple* sukero en la sukeroĵo kaj io blanka — *salo* — en la salujo.

Ujo estas io, en kio la sukero, salo, mono ktp. estas.

Kie estas via mono? (En la monujo.) Kie estas la salo? Kie estas la sukero?

Sed ankaŭ ni diras: Svedujo, Anglujo, Hungarujo ktp.

Do, UJO signifas unue instrumenton, en kiu la objekto estas, due landonomon, kaj trie ĝi signifas — tre malofte — arbonomon. Ekz.: pomujo = pomarbo.

Cigaringo.



Cigarujo.

Kio estas en la buŝo de la sinjoro? Ĉu vi havas kraĵonigon? Kie estas via cigaredingo?

La cigaro estas tute en la cigarujo sed duone en la cigaringo.

Ĉu via stomako estas plena, kiam vi iras tagmanĝi? (Ne, vi estas *malsata*.)

Kia oni estas antaŭ la tagmanĝo? Ĉu vi havas bonan apetiton? Kion faras la kelnero? (Li donas al vi mangokarton.) Kio estas sur la mangokarto? (Sur la mangokarto estas la nomoj de la mangajoj kaj trinkaĵoj.)

## MANGOKARTO

### Supoj:

Buljono (viandosupo)  
Tomatsupo (ruĝa supo)  
Rizosupo  
Terpomsupo  
Fruktosupo  
Kokinsupo

### Viandoj:

Bovajo (Bovoviando)  
Bifsteke  
Porkajo  
Bovidajo  
Kokidajo

### Legomoj:

Terpomoj  
Brasiko  
Salato

### Fiŝoj:

Ezoko  
Soleo

### Dolĉaĵoj:

Ĉokolado-torto  
Frukto-supoj  
Desertoj  
Fruktoj

### Trinkaĵoj:

Vino  
Ĉampano  
Likvoro  
Brando  
Biero  
Mineralakvo  
Kafo  
Teo  
Lakto

Buterpano. Sandviĉoj. Bakajoj. Pano.



### Pagi.

Bonvolu diri, kion vi deziras manĝi kaj trinki. Vi ricevos ĉion de la kelnero. Kion vi devas fari, se vi jam manĝis? (Vi devas *pagi* = doni monon.) Ĉu vi donas trinkmonon al la kelnero? Kion diras la kelnero?

Ĉu vi ŝatas la trinkaĵojn? Ĉu la dolĉaĵoj estas bonaj? Ĉu la legomoj estas sanigaj manĝaĵoj? Kiun trinkaĵon vi ŝatas?

Ĉu vi komprenas la vortojn: manĝaĵo, trinkaĵo, dolĉaĵo?

Ĉu vi legis hodiaŭ la gazeton? Ĉu estas en ĝi multaj novaj sciigoj — novaĵoj? Ĉu la gazeto estas via ĉiutaga legajo? Ĉu la mangokarto estas bona legajo? Ĉu en la libro estas multaj legajoj?

Trinkaĵo signifas ion trinkatan, manĝaĵo signifas ion manĝatan, novaĵo ion novan k. t. p.

Kiam vi manĝis, vi demandas: *Kiom* kostas la tagmanĝo? *Kiom* kostas la poŝtkarto? *Kiom* kostas la ovo? *Kiom* kostas la Esperantogramatiko? (Ĝi kostas du kronojn.) *Kiom* faras 3+5, 10 plus 25, kvindek minus 13, sesoble 10, sepoble naŭ, duone 10? *Kiom* estas la dekono de cent, la triono de dekkvin, la kvarono de 20, tri kvaronoj de dudek?

Ĉu vi komprenas Esperanton? (Mi komprenas iom, sed mi povas paroli nur iomete.) *Iomete* = *tre malmulte*.

Ĉu vi ne volas iomete promeni? Ĉu vi skribis hodiaŭ iomete?



La hundoj  
disŝiras  
la pantal-  
lonon.

Kion faras la hundoj? Kion ili ŝiras? Kion ili faras per la pantalono? Kion ili disŝiras? Ĉu viaj libroj estas dise? Kio disigas Eŭropon de Ameriko? Ĉu la disŝirita pantalone estas bona?



Kioma horo estas? (Kvarono antaŭ la dek-dua.)

Ĉu vi havas horloĝon? Ĉu nun estas la dek-unua horo?

Kioma horo estas? (Unua, dek-unua, kvara horo.)

Kiam vi tagmanĝas? (Mi tagmanĝas je la kvara horo.)

Kioma horo estas sur la horloĝo? (Ekzemple: Kvara kaj duono =  $4\frac{1}{2}$  aŭ 4:30.)

Kaj nun? Kvina kaj tri kvaronoj.

Je kioma horo matene vi iras labori? Je kioma horo vi komencas la laboron? (Komenci = malfini.) Je kioma horo vi finas la laboron?

Ĉu vi komencis lerni Esperanton? Kiam vi komencis dormi hieraŭ? Kiam vi komencis korespondi Esperante? Je kioma horo vi komencis manĝi hodiaŭ vespere?



La simio imitas homon.

Ĉu vi similas al via patro? Kiu besto similas al la homó? (Ĝi estas

la simio.) Ĉu la simio ŝatas fari la samajn farojn, kiujn la homo? (La simio imitas.)

### La sezonoj.

52 semajnoj faras unu jaron. Kiom longa estas la jaro? En la jaro estas kvar periodoj, kvar sezonoj. Ekzemple en januaro estas *vintro*. Dum la vintro estas malvarma vetero. Mi ŝatas la vintrajn sportojn, sed por la malriĉuloj la vintro ne estas bona sezono, ĉar la ĉambro estas malvarma kaj oni devas manĝigi la grandan *meblon*, starantan en la ĉambro. La meblo estas *forno*, ĝi donas varmon, sed manĝas *lignon* (= mortinta arbo) kaj *karbon* (nigra ŝtono). Oni devas *hejti* dum la vintro per ligno kaj karbo. Sed post la vintro venas pli varma sezono, la *printempo*. Dum la printempo la floroj floras, la birdoj kantas kaj la gejunuloj amas. La arbaroj ricevas verdan veston, kaj ĉio estas gaja. Nur tio ne plaĉas al mi, ke longharaj poetoj faras malbonajn poemojn pri la printempo. Post la printempo venas tre varma, ofte varmega sezono, la *somero*. Dum la somero oni ŝatas iri en la akvon, naĝi en la akvo, oni ŝatas sidi en ŝipeto, tamen ĝi ne estas ŝipo, nur *similas* al la ŝipo, ĝi estas *boato* kaj oni remas en ĝi. (Ĉu oni remas per la tranĉiloj?) Post la somero venas la tre bela sezono, la *aŭtuno*. La aŭtuno havas belajn kolorojn. La aŭtuno flavigas, brunigas kaj ruĝigas la arbojn kaj arbetojn. Sed ofte akvo falas el la ĉielo dum la aŭtuno. Ni diras, ke ofte *pluvas* dum la aŭtuno. La pluvo venas el la ĉielo, el la *nuboj*, kaj faras *koton* sur la tero. Ankaŭ dum la vintro falas

blanka pluvo kaj ni diras: *neĝas*. La neĝo estas tre bela, blanka, kaj la sportistoj tre ŝatas ĝin. Dum la aŭtuno kaj vintro ofte ni ne povas vidi bone pro la *nebulo*. En la urbo la aŭtuno ne estas bela sezono.

**Demandoj :**

Kio estas la plej varma, plej malvarma, plej bela, plej longa sezono?

Kial vi ŝatas la vintron, printempon, aŭtunon, someron? Per kio oni hejtas dum la vintro? Kion faras la gejunuloj dum la printempo?

Ĉu vi remas dum la somero? Kie vi estis dum la lasta somero? Kien vi vojaĝos dum la venonta somero? Ĉu pluvis hodiaŭ? Ĉu vi ŝatas la neĝon? Kiam estis nebula vetero?

## Notas

1. **Saluti**—saludar.
2. **El—de** (de entre), (hecho) de.
3. **Io**—algo.
4. El sufijo **-uj** indica el continente o recipiente: **monujo**—billetera, bolso, **sukerujo**—azucarera. Se lo usa también para designar árboles o plantas: **pomujo** (**pomarbo**)—manzano. Por extensión **-ujo** es usado para designar nombres de países, según el nombre de sus pueblos: **franco**—un francés, **Francaujo** (**Franclando**)—Francia (ver pág. 35, Nota 8).
5. El sufijo **-ing** señala el objeto que contiene parcialmente a otro. **Cigaringo**—boquilla para cigarros, **ovingo**—huevera.
6. **Sata**—saciado, satisfecho (de alimentos), **malsata**—hambriento.
8. El sufijo **-aj** señala el objeto concreto, la substancia: **mangajo**—comida, víveres, **trinkajo**—bebida, brebaje, **legajo**—(material de lectura, **dolĉajo**—un dulce.
9. **Kiom**—cuanto, que cantidad, **iom** algo, alguna cantidad, **tiom**—tanto, tanta cantidad, **neniom**—nada, ninguna cantidad, **ĉiom**—todo, la cantidad total.
10. El prefijo **dis-** indica separación, dispersión: **disigi**—separar, **disĉiri**—arrancar, desgarrar, **disdoni**—distribuir.

11. **Iomete**—un poco, un chiquito.
12. La hora se expresa con la voz **horo** y un número ordinal (**dua, doka,** etc.): **Estas la kvaro horo**—son las cuatro (literalmente, es la cuarta hora). Se suele suprimir **horo** en el lenguaje corriente. **La sesa kaj kvarono**, o **kvarono post la sesa**—6.15, **la sesa kaj duono**, o **duono post la sesa**—6.30, **la sesa kaj tri kvaronoj**, o **kvarono antaŭ la sepa**—6.45. Para preguntar la hora añadimos la terminación **a a kiom**. **Kioma horo estas?** **Estas la oka** (horo).
13. La preposición **je** es usada en los casos donde ninguna preposición de sentido definido sea adecuada. **Je la unua horo**—a la una (hora). **Mi kredas je li**—creo en él. **Ni trinkas je via sano**—bebemos a su salud.

### Traduzca al Esperanto:

Mi anillo no es de oro, sino sólo de plata. Durante el otoño viajaré a Italia, porque el tiempo (vetero) brumoso no es bueno para mi salud. La más bella estación es la primavera, pero la última primavera fué fría. Por favor deme el salero! ¡No rompa el plato! ¿Lleva Ud. consigo su cartera? Si es así, haga el favor de pagar. La comida es buena, pero es muy cara. Yo ya hablo un poco Esperanto, mas espero que dentro de poco hablaré perfectamente.

### T a r e a :

Conteste en Esperanto las preguntas de la página 66, "Demandoj".

## Dek-kvara (14-a) Leciono

Eble la mallonga strofo de la hungara kanto "Tra la stratoj" estas ankoraŭ en via kapo, vi ankoraŭ ne forgesis tion. Nun ni povos lerni la duan strofon:

*Kapitan' sin alparolas :  
Junulin', vi kien volas ?  
Kial tion scii vi deziras ?  
La amaton mi postiras !*

Certe vi bone komprenas la vortojn kaj mi ne devas ilin klarigi al vi! Se vi deziras aŭdi la muzikon de la kanto aŭ vi deziras aŭdi alian esperantan diskon, vi povas peti katalogon pri ili.



Ĉu Adamson manĝis? (Ne, li estas manĝonta.) Ĉu la manĝonta homo estas sata? Kia estas la manĝonta homo? Ĉu Adamson estas dika antaŭ la tagmanĝo? Kia li estis? Kial li estas maldika? Kion faras la manĝonta Adamson? Kien li iras? Ĉu Adamson volas trinki? (Jes, Adamson volas trinki, li soifas.)



**Adamson dikiĝas dum la tagmanĝo.**

Kion faras la kelnero? Ĉu Adamson deziras manĝi multe? Ĉu vi soifas? Ĉu vi soifas akvon aŭ vinon?

Kion faras Adamson? Ĉu nun li estas pli dika? (Antaŭ la tagmanĝo Adamson estis maldika, nun li estas dika. Li dikiĝis dum la tagmanĝo.)

Dum la aŭtuno la arboj estas flavaj. (Dum la aŭtuno la arboj flaviĝas.)

Kiam oni diras al juna knabino, ke ŝi estas bela, la knabino ruĝiĝas.

Kio okazis al Adamson? Kiu dikiĝis? Kio flaviĝas dum la aŭtuno? Kial ruĝiĝas la junulinoj? Ĉu la situacio de la mondo malboniĝis dum la lastaj jaroj?

**La cikonio.  
La infano  
naskiĝas.**



Kiam la cikonio venis kun vi?  
Kiam vi naskiĝis? (La patrino naskas,  
la infano naskiĝas.)

Kiam naskiĝis via patro? Ĉu vi  
naskiĝis en tiu ĉi jarcento?

Sed nun ni parolu pri Esperanto:



L. L. Zamenhof.

La granda homo, kiu faris Esperanton, Zamenhof, naskiĝis en Pollando, en malgranda urbo, Bjalistok, en la mezo de la antaŭa jarcento.

En tiu urbo loĝis kvar diversaj (malegalaj) nacioj. La juna Zamenhof vidis la malamon inter la diverslingva loĝantaro. La koro — la animo — de la junulo soifis la komprenon. Ĉio pro la diverslingveco! — pensis la junulo. La homoj pafas unu

la alian, ili faras militon, ilia ruĝa sango fluas, ili malamas unu la alian, ĉar la homoj, la nacioj, ne komprenas unu la alian. Li volis fari mondlingvon, por tiri la homan familion al la sankta harmonio. Li ne estis riĉa, eĉ malriĉa, li laboris tre multe, ĝis li povis eldoni sian gramatikon. Kaj li estis kuracisto. Li devis havi multan animan doloron, suferi, sed fine li sukcesis. Li faris — verkis — la himnon de la esperantistaro. La Esperantistoj esperas, ke la venonta tempo estos pli bela, tial ili estas Esperantistoj kaj tial estis la nomo de la himno: *La Espero*. (Zamenhof eldonis sian libron sub la pseŭdonimo Doktoro Esperanto kaj tial la lingvo havas tiun nomon.) La unuaj strofoj de *La Espero* estas jenaj.

*En la mondon venis nova sento,  
Tra la mondo iras forta voko,  
Per flugiloj de facila vento  
Nun de loko flugu ĝi al loko.*

En la poemo (versoj) estas novaj vortoj. Kiam io doloras al vi, vi sentas doloron. La kapdoloro estas malbona sento. — Kiam vi volas, ke la infano venu al vi, vi vokas la infanon. Nun vi komprenas, kion signifas: tra la mondo iras forta voko. — *Loko*: la loko, kie oni dancas, estas la dancejo, la loko, kie oni lernas, estas la lernejo, la loko, kie oni telefonas, estas telefonejo. Loko = ejo.

*Ne al glavo sangon soifanta  
Ĝi la homan tiras familion,  
Al la mond' eterne militanta  
Ĝi promesas sanktan harmonion.*

*Glavo*: la soldato havas pafilon kaj glavon, la glavo ne pafas, sed tranĉas. *Eterne* signifas ne nur en tiu ĉi minuto, sed ĉiam ĝis la fino de la mondo. *Promesi* signifas diri, ke oni donos aŭ faros ion, al iu. Ekzemple mi promesas al vi, ke vi estos bona Esperantisto,

se vi ankoraŭ iomete lernos Esperanton. Kaj vi certe promesas al mi, ke vi estos bona Esperantisto.

La dua strofo ne estas malfacila: legu nun en prozo:

*Ĝi (la nova sento) ne tiras la homan familion al la glavo soifanta sangon (kiu soifas sangon), ĝi promesas al mondo, eterne militanta (kiu militas eterne), sanktan harmonion.*

En la fino de la lasta jarcento Esperanto rapide iris antaŭen kaj nur la mondmilito malhelpis ĝin. Tiam Esperanto suferis multe kaj dum la milito mortis Zamenhof en Varsovio. Li havis kormalsanon (malsanon de la koro), kaj li multe suferis, ĉar li vidis, ke la homoj ne komprenis lin. Zamenhof mortis, sed lia granda ideo vivas. La verda stelo, kiu estas simbolo de la espero, brilas kaj montras la vojon al la homa harmonio, al la *paco* (malmilito) de la homaro. La tekniko pli kaj pli fortiĝas, la kilometroj estas ĉiam pli kaj pli mallongaj, kaj ankaŭ la homaj animoj devas esti pli proksimaj.

Ju pli perfekta estos la tekniko, des pli fortiĝos nia afero.

### Demandoj:

Kie kaj kiam naskiĝis Zamenhof? Kion li vidis en sia naskurbo? Kia urbo estis Bjalistok? Kion simbolas la verda koloro? Ĉu la glavo estas simbolo de la Esperantismo? Kion promesas Esperanto al la homaro? Kiam mortis Zamenhof? Ĉu Esperanto fortiĝis dum la milito? Kaj post

la milito? Ĉu Esperanto havas longan estinton? (Estanto = nuna tempo, estinto = tempo, kiu estis.) Ĉu la estonto de Esperanto estas esperiga?

*Finu la frazojn:*

Ju pli ofte pluvas, ....  
Ju pli varma estas la ĉambro ....  
Ju pli multe oni parolas ....  
Ju malpli oni lernas ....



Bela ĉevalo.

Ĉevalaĉo.

Ĉu vi vidas la ĉevalojn? Ĉu ili estas egalaj? Kiu estas la pli bela? Ĉu la dekstra ĉevalo estas pli bela?

La tre malbela kaj malbona ĉevalo estas ĉevalaĉo.

Ĉu la malbela kaj malbona domo estas ĉevalaĉo? (Ne, sed domaĉo.)

Dum la tuta tago mi atendas la ŝuiston, ĉu vi ne vidis tiun *homaĉon*?

Ne, mi ne vidis lin, sed la *tajloro* estas ĉi tie. (La tajloro faras vestojn.)



Fihomo.

Rigardu la portreton de tiu homo en la gazeto. Li mortigis homon.



Li estas tre tre malbona homo. Li estas *fi*homo.

La sufikso *-aĉ-* kaj la prefikso *fi-* (antaŭ la vorto) estas malbeligaj afiksoj : *-aĉ-* malbeligas nur fizike, sed *fi-* malbeligas morale.

Ĉu vi bone komprenis min? Ĉu vi ne *miskomprenas* min? (Vi *miskomprenas* min, se mi diras al vi ekz. Ĉu vi havas pomon, kaj vi aŭdas : ĉu vi havas monon; tiam vi *miskomprenas* min. Nu espreble ne estas *miskompreno* inter ni !)

Gis revido !

## Notas

1. **Eble** como palabra separada significa posiblemente, quizá, tal vez.
2. **Peti**—pedir, rogar.
3. **Jarcento**—siglo, centuria.
4. **Verki**—escribir (una obra literaria), **verko**, una obra (literaria o artística), **verkisto**—escritor.
5. El sufijo **-ig** indica volverse, hacerse, cambiar de estado: **nigriĝi**—ennegrecerse, volverse negro, **varmiĝi**—calentarse, **naskiĝi**—nacer (en Esperanto el verbo **naski** es transitivo: **la katino naskis tri katidojn**—la gata tuvo (parió) tres gatitos). No confundir con **-ig** que denota causar, producir cambio en otra cosa o ser. Compare: **la fraŭlino ruĝiĝas**—se ruboriza (se vuelve roja), **la fraŭlino ruĝigas siajn lipojn**—hace rojos sus labios; **la suno maturigas la pomojn** (hace madurar, vuelve madura), **la pomo maturiĝas pro la suno** (se hace, se vuelve madura).
6. **Eldoni**—editar.
7. **Ju pli . . . des pli**—cuanto más . . . (tanto) más. **Ju pli granda, des pli bona**—cuanto más grande (tanto) mejor.
8. El sufijo **-aĉ** significa mala calidad: **domaĉo**—casucha, **popolaĉo**—pulacho, **aĉa**—malo, inferior.
9. El prefijo **fi-** indica baja calidad moral: **fidomo**—casa de mala fama, **fiĥomo**, **fiulo**—individuo de bajos instintos, canalla.
10. **Estanta**—presente (que es), **estinta**—pasado (que fue), **estonta**—futuro (que será). Formas alternativas son: **nuna**—presente, **pasinta**—pasado, **venonta**—futuro.
11. El prefijo **mis-** significa equivocado, errado. **Miskompreno**—malentendido.

## Traduzca la Esperanto:

Cuanto más se trabaja (tanto) mejor es el almuerzo. El doctor Zamenhof era uno de esos hombres que no piensan en sí mismos, sino solamente en el bien de la humanidad. Ayer me olvidé de hablar a ese sinvergüenza que no me pagó el dinero. Mi lapicero es de plata. En la mañana trabajé demasiado (tro), y no pude escribir una carta a mi cuñado, que espera de mí una contestación. Cuando yo nací era mejor tiempo. El aire se calienta durante el día y se enfría durante la noche.

## T a r e a :

Conteste en Esperanto las preguntas de la página 70, "Demandoj".

## Dek-kvina (15-a) Leciono



**La fraŭlino vendas, la sinjoro aĉetas.**

Kion faras la sinjoro? Kion faras la fraŭlino? (La sinjoro aĉetas, la fraŭlino vendas.)

Ĉu vi havas vendejon? Ĉu via patro havas vendejon? Ĉu li estas vendisto? Ĉu li estas librovendisto? Ĉu vi ofte aĉetas librojn? Ĉu vi aĉetas Esperantajn librojn? (Mi pensas, ke vi povos aĉeti kelkajn tre bonajn librojn.)

Ĉu vi scias, ke Esperanto havas tre bonan kaj grandan literaturon? En Esperanto aperis multaj romanoj, poemoj, noveloj, matematikaj, politikaj kaj aliaj sciencaj verkoj, kaj ni havas multajn bonajn gazetojn. Oni tre multe tradukis en Esperanton el la naciaj lingvoj. El la germana lingvo oni tradukis Faust de Goethe, el la angla verkojn de Dickens, el la franca multajn bonajn librojn ktp. Rigardu la liston de la libroj en la fino de la libro, kaj legu librojn kaj abonu gazetojn. Mi scias, ke vi tre ŝatos la Esperanto-literaturon. Kaj la Esperantaj libroj ne kostas multe.)

Ĉu vi ŝatas legi? Ĉu vi legas ofte? (Mi legadas ĉiuvespere.)

Ĉu vi legadas ĉiuvespere? Ĉu vi aŭdis pafon? Ĉu la pafado estas ofta en la revolucioj? Ĉu vi ofte iras en klubon? Ĉu vi aŭskultas ofte paroladojn? Ĉu vi ŝatas la politikajn paroladojn?

La sufikso *-ad-* signifas longan aŭ oftan faron.



**La vekhorloĝo vekas lin.**

**Li vekigiĝas.**

Ĉu vi ne povas dormi, se oni kantas en la ĉambro? Kion faras la kanto? (Ĝi vekas vin.) Ĉu vi havas vekhorloĝon? Ĉu vi ŝatas ĝin? Je kioma horo ĝi vekas vin? Kiam vi vekigiĝas? Ĉu vi vekigiĝis frue hodiaŭ?

Unu krono falis sub la ŝrankon, mi devas *movi* la ŝrankon. Ĉu la ŝranko *moviĝas*?

Ĉu la Esperanto-movado estas granda? Ĉu vi *partoprenas* (prenas parton) la kontraŭ-alkoholan movadon? En kiu movado vi partoprenas?




**Adamson, la poŝtistino kaj la malbela pakajo.**

Kio estas en la mano de Adamson? Kia estas la pakajo? Kia estas la poŝtistino? Ĉu al ŝi plaĉas la pakajo de Adamson? Kion Adamson volas fari?



La poŝtistino estas senpacienca. (Ŝi ne havas paciencon.)

Kion faras la poŝtistino? Ĉu ŝi havas paciencon? Kial ŝi kriis? Ĉu ŝi havas grandan buŝon? Kia estas ŝia buŝo? Ĉu ŝia buŝo estas malfermita? Kie estas la pakajo?



La ŝtopita buŝo ne povas krii.

Kion faris Adamson? Ĉu la ŝtopita buŝo povas paroli? Kial ŝi ne povas paroli?



Aminda fraŭlino.

Ĉu vi amas iun? Ĉu la junuloj ofte amas? Kial oni amas fraŭlinon? (Ĉar ŝi estas bela, bona, bone parolas Esperanton ktp., ĉar ŝi estas per unu vorto aminda.)

Ĉu vi vidis Parizon? Ĉu Parizo estas bela urbo? (Jes, ĝi estas vidinda urbo.) Ĉu en Parizo estas multaj vidindaĵoj? Ĉu vi povas diri al mi rigardindan filmon? Ĉu vi povas diri al mi nomon de leginda verkisto? Ĉu Esperanto estas ŝatinda lingvo? Ĉu Adamson estas ridinda homo? Ĉu vi estas gratulinda lernanto?

Dialogeto:

— Ĉu vi povus viziti min morgaŭ?

— Mi bedaŭras, morgaŭ mi ne havos tempon. Sed eble postmorgaŭ.

— Bedaŭrinde, postmorgaŭ mi ne povos esti hejme.



La hundo ankoraŭ sidas, sed la sinjoro ekiras jam.

Ĉu vi ŝatas vojaĝon? Kie estas la vagonaroj? (En la stacidomo.) Kion faras la ironta vagonaro? (Ĝi staras. Kiam la vagonaro komencas iri, ni diras: la vagonaro ekiras.)

Kiam vi komencas dormi, vi ekdormas. Kiam vi komencas paroli, vi ekparolas.

### La prefikso *ek-* signifas komencon.

Kiam vi ekiros? Je kioma horo vi ekdormis hieraŭ? Kiam Adamson venis kun la aŭtotrumpeto, kion faris la parolemaj sinjorinoj? (Ili ektimis.) Ĉu vi manĝos ion antaŭ la ekiro? Bonvolu ekstari! Nun bonvolu eksidi! Kion faris la ektiminta vilagano? Ĉu la fama doktoro povis ekparoligi la mutan sinjorinon? Ĉu li povis ekmutigi ŝin? Kion faris la fama doktoro? Ĉu la aŭtotrumpeto de Adamson estas ektiminda? Kie vi ekvidis vian amikon hieraŭ?

### Historio:



Statuo.

Kaj nun mi rakontas al vi historion: Antaŭ kelkaj jardekoj, kiam en Hungarlando Francisko Jozefo estis la reĝo, oni *festis* la naskotagon de la reĝo kun granda ceremonio. Ankaŭ la teatroj partoprenis en la festado kaj ili *aranĝis* specialan festo-vesperon. En malgranda hungara urbo la teatro-direktoro volis fari speciale belan vesperon, kaj tial li sendigis al si el la ĉefurbo Budapeŝt tre belan *gipso-statuon* de la reĝo. Li volis aranĝi tre bele la vesperon, kun multaj palmoj, grandaj reflektoroj, bela muziko kaj kantado, en kiu ankaŭ la rigardantaro devos parto-

preni. Sed dum la antaŭtagmezo de la festo okazis granda katastrofo. *Mallerta* homo (kiu havis malpraktikan manon) faligis la statuon, kaj ĝi rompiĝis je mil *pecoj*. La direktoro *preskaŭ* ploris. Li *koleris* kaj ne sciis, kion fari. Sed tiam li ekvidis help-aktoron, kiu tre similis al la reĝo. Kaj tiam oni per *farbo* blankigis la helpaktoron, kaj antaŭ lin oni metis palmojn kaj florojn, kaj li nun estis tre bona statuo. Kaj la direktoro diris al li, ke li ricevos duoblan *salajron* (mono por la laboro), sed se li ekmoviĝos, tiam li mortos, ĉar la direktoro mortigos lin. La helpaktoro diris:—Ne, mi ne ekmoviĝos. Do li promesis, ke li ne ekmoviĝos, kaj la direktoro estis trankvila. Kaj nun venis la komenco de la vespero. Sur la *scenejo* staris la statuo-aktoro kaj ĉirkaŭ li estis la floroj. Oni



Oni levas la kurtenon.

*levis* la kurtenon, la kurteno levigis kaj la statuo staris en la brilo de la reflektoroj. La *orkestro* ekmuzikis. La homoj ekstaris kaj ekkantis la himnon. Sed ili kantis nur dum kelkaj sekundoj. Poste ili ekridis, ridegis, ridadis. La malfeliĉa direktoro rigardis al la aktoro-statuo. Ĉu vi scias, kio okazis? Nu, tio okazis, ke ne nur la rigardantaro kantis la himnon, sed ankaŭ la statuo.

### Demandoj:

Kiam okazis la historio? Kie ĝi okazis? Kiu estis tiam la reĝo en

Hungarlando? Kiam estas via nasko-  
tago? Kiu estas la ĉefurbo de via  
lando? Kia estis la laboristo? Kion  
faris la statuo? Kiel oni statuigas  
la helpanton? Kion li devis promesi?  
Ĉu vi havas altan salajron? Kion  
faris la kurteno? Kion faris la orkestro,  
la rigardantaro? Kial oni ekridis?



Du tasoj  
da kafe.

Ĉu vi trinkas multan kafon? Ĉu  
vi trinkas nur unufoje, aŭ plurfoje

dum la tago? (Pluraj estas pli ol  
unu.) Ĉu vi trinkas nur unu *tasojn*  
*da kafe*? Ĉu vi manĝas unu kilo-  
gramon *da ĉokolado*? Kiom da pano  
vi manĝas? Kiom da akvo vi trinkas  
dum la tago?

*Da staras ĉe vortoj kiuj signifas  
kvanton.*

Kiom kostas la ovoj po du en  
via urbo? Ĉu oni vendas la pomojn  
po dekdu en via lando? Ĉu vi  
manĝas ĉiutage po unu fojo? Ĉu vi  
povas lerni ĉiutage po 50 vortoj?

Gis revido!

### T a r e a :

Conteste en Esperanto las preguntas de  
la página 75, "Demandoj".

## Notas

1. El sufijo **-ad** indica acción continuada: **pafo**—un disparo, un tiro, **paŝado**—un tiroteo, **pluvo**—lluvia, **pluvado**—lluvia continuada.
2. Ciertos verbos en español, como sanar, comenzar, terminar, tienen dos significados: El sol sanó la herida; la herida sanó con el sol. Pedro comienza el trabajo a las 8; el trabajo comienza a las 8. Ella termina la lección a medio día; la lección termina a medio día. En Esperanto usámos el sufijo **-ig** para el segundo significado, cuando la acción no recae sobre alguien o algo (verbo intransitivo).  
**La suno sanigis la vundon; la vundo sanigis pro la suno.**  
**Petro komencas la laboron je la 8a; la laboro komenciĝas je la 8a.**  
**Ŝi finas la lecionon je tagmezo; la leciono finiĝas je tagmezo.**  
Ver pág. 69: **La patrino naskas la infanon; la infano naskiĝas.**
3. **Partopreni**—tomar parte, participar.
4. El sufijo **-ind** señala lo que es digno de. **Vidinda**—digno de ser visto, **aminda**—que merece ser amado, amable. Compare: **mangebla**—comible, **mangiinda**—que merece comerse.
5. **Bedaŭri**—lamentar, sentir, **bedaŭrinde**—lamentablemente, infortunadamente.
6. El prefijo **ek-** indica lo subitáneo o el comienzo de una acción: **ekplori**—romper a llorar, **ekiri**—partir, comenzar a andar, **ekvidi**—apercibir.
7. **Li sendigis ĝin al si**—él se lo hizo enviar, él hizo que se lo enviaran (a sí mismo).

8. **Rimarku:** Ridi, ridegi, ekridi, ridinda, rideti, ridema, rido, rideto, ridego, ktp. (De este modo puede derivarse un gran número de palabras de una sola raíz). En este caso la raíz es **rid-**.
9. **Da** traduce a **de** después de una expresión de cantidad: **Kilogramo da pano**—un quilo de pan. **Li trinkas tason da kafo** (El no bebe la taza misma, sino la cantidad de café contenida en la taza). Cuando **kiom** (**iom**, etc.) va seguido de un nombre, se debe usar **da**. **Kiom da mono vi havas? Mi havas tri pesojn, multan monon, neniam da mono;** como **da** es una preposición no se usa acusativo después de ella.
10. **Pluraj**—varios-as.
11. **Ĉiutage**—todos los días, cada día, diariamente.
12. **Po**—a razón de: **li marŝas po 5 kilometroj ĉiuhore**, él marcha (a razón de) 5 kilómetros por hora. **Bonvolu fari la eblajn vortojn el la jenaj radikoj: (a) labor-, (b) varm-, (c) hav-**.

## Traduzca al Esperanto:

Durante el largo tiroteo la liebre huyó. El movimiento esperantista despierta interés en (ĉe) mucha gente inteligente en todo el mundo. ¿Quiera Ud. tomar parte en el movimiento? Desgraciadamente sólo tengo poco tiempo y por eso (a causa de eso) no puedo ir al club pero desde luego (kompreneble) tengo correspondencia en Esperanto. Al poco tiempo me dormí y soñé. Comí un quilo de pan porque estaba muy hambriento. El hambre es el mejor cocinero. Deme un litro de leche. ¿Desea Ud. un poco de leche? ¿Cuándo ocurrió la catástrofe? ¿Sabe Ud. cómo puedo ir a la calle principal (ĉefa)?

## Lasta Leciono

Mi pensas, ke vi jam nun komprenas bone Esperanton. Sed certe vi estus perfekta Esperantisto, se vi estus lerninta ĝin jam antaŭ tri jaroj.

Se vi estus lerninta Esperanton antaŭ tri jaroj, kia Esperantisto vi estus nun?

Ĉu vi vivus, se via patro ne estus naskiĝinta? Ĉu la situacio nun estus pli bona, se la mondmilito ne estus estinta? Kie ni vivus nun, se Evo ne estus manĝinta pomon?



Li ekbruligas la cigaron per alumeto.

La alumeto brulas.

Kion faras la sinjoro? Ĉu vi havas alumeton? Kion vi faras per la alumeto? Kion vi bruligas per la alumeto? Ĉu vi havas fajron en via koro?



**Kuirilo.**

Kion faras Adamson?

Kio brulas? Kion volas Adamson ekbruligi? Kio estas en la mano de Adamson? En kiu mano li havas la alumeton? Ĉu vi laboras per la dekstra mano? Ĉu vi laboras per la dekstra kaj maldekstra manoj?

(*Dekstra mano kaj maldekstra mano = dekstra kaj maldekstra manoj.* Ni diras ankaŭ *ambaŭ* manoj. *Ambaŭ* = ĉiuj du.)

Ĉu ambaŭ manoj de Adamson estas plenaj? Kion li faras per la alumeto?

Ĉu Adamson havas alumeton? Kion oni faras per la alumeto? Kio estas sur la fino de la alumeto, kiam ĝi brulas? (*Fajro.*)



Granda fajro sur la kuirilo. La tre malgranda fajro estas fajrero.

Kia estas la fajro? Ĉu la petrolkuirilo brulas bone? Kion faras



Adamson? (Li ektimas.) Kio ektimigas lin? Ĉu vi vidas tre malgrandajn ruĝajn partojn de la fajro? Kio estas tio? (Tio estas fajrero. Fajrero estas ruĝa punkto el la fajro.)

Ĉu vi ŝatas manĝigi la birdojn? Ĉu vi manĝigas ilin per tuta pano? (Ne, nur per *paneroj*. Panero estas tre malgranda parto de la pano.)

Ĉu la birdoj ŝatas la paneron? Ĉu la fajrero povas bruligi domon? Ĉu vi komprenas: akvero?

Ĉu vi havas monon? Ĉu vi komprenas: monero? Ĉu vi havas monerojn? Ĉu vi povas al mi monerigi cent dolarojn? Kial vi ne povas monerigi cent dolarojn?

La sufikso *-ero-* signifas la plej malgrandan parton de la tuto.



Kien li metis la lignon? Ĉu li nun povas uzi la aparaton? Ĉu la aparato nun estas uzebla? Ĉu Esperanto estas uzebla en la tuta mondo? Kie vi povas uzi Esperanton? Ĉu oni povas uzi Esperanton ĉie? Kia homo estas Adamson?



Adamson alportas lignon.

Kia estas la petroلكuirilo? Kion faras Adamson? (Li *alportas* lignon. Ligno estas mortinta arbo.)



Averto sur la benko. Ĝi estas nove pentrita.


Kion taras la sinjoro? Kie li sidas? Kio estas sur la benko? (Sur la benko estas papero kaj sur la papero estas skribite: *Atentu!* La benko estas *ĵus pentrita!*)

Ĉu la sinjoro vidas la paperon? Kial estas la papero tie? (La papero *avertas* la homojn. Sur ĝi estas averto.)

Ĉu la sinjoro ekvidis la averton? Kion li faras? Kiu estas sur la benko? Kie estas la sinjoro? (Li *foriris*.)



Kio restis sur la benko? (Pantalono.) Ĉu la historio estas melankolia? Kian pantalonon vi havas? Ĉu la sinjoro foriris kun la pantalonon? Kio restis sur li? (Jako — simila al la palto, sed malgranda, kaj veŝto sub la jakon.)



La anseroj iras unuope.

Kiel iras la anseroj? Kiel marŝas la soldatoj? Kiomope iras la anseroj? Ĉu la soldatoj marŝas duope? Ĉu la lernantoj sidas unuope en la benkoj?

Ĉu en la lokomotivo estas homoj? Kiu estas la unua homo en la lokomotivo? (La unua homo en la lokomotivo estas la lokomotivestro.)

Kiu estas la unua homo en la urbo? (La urbestro.) Kiu estas la urbestro en via urbo? Kiu estas la estro de via klubo? Ĉu la estraro (estr-aro) de via klubo estas bona? Ĉu ilia laboro estas kontentiga?

Kion faras la lokomotivestro? (Lgvidas la lokomotivon.)

**Estro = gvidanto.**

Ĉu vi estas gvidanto? Ĉu vi bezonas gvidiston en granda fremda urbo? Ĉu vi vidis jam la belan

Esperantan gvidlibron de Milano kaj la aliajn turistajn prospektojn? Ĉu vi scias, ke multaj urboj eldonis Esperantajn prospektojn?



**Negro kun eleganta kolumo kaj ombrelo.**

Ĉu la negro estas eleganta? Kio estas sur lia kolo? (Sur la kolo estas kolumo.)

*Um-* estas sufikso, kiun ni uzas, se ni ne havas alian uzeblan sufikson. Sed estas tre malmultaj vortoj kun la sufikso *-um-*.

Jen malgranda listo de *um-*vortoj: Malvarma — malvarmumi, pro la malvarmo esti malsana.

Vento — ventumi, fari venton, kiam estas tre varma vetero, por ke ni fartu pli bone. Ventumilo — ilo, per kio la sinjorinoj ventumas sin dum la somero kaj dum la baloj.

Proksima — proksimume, mi ne scias tute precize, kiom. Ekz.: la monto estas proksimume 400 metrojn alta.

Krom tiu listo ne estas tro multaj *um-*vortoj.

Kiam mi revidos vin? Ĉu vi ofte rerigardas, kiam vi iras sur la strato? Kiam vi revenos? Ĉu vi rekonas la Esperantajn vortojn, kiujn vi lernis? Kiam vi reiros hejmen? Kio estas en la manoj de Adamson, kiam li revenas al la petrolkuirilo?



### Kies krono estas tio ?

Kiu havas kronon ? Kies krono estas sur la bildo ? (La krono de la reĝo.) Kies ĉefurbo estas Stockholm ? Kies ĉefurbo estas London ? En kies domo vi loĝas ?

Kaj nun la instruisto vere adiaŭas :

*Estimata Sinjorino, Fraŭlino aŭ Sinjoro !*

Hodiaŭ vi finas la lecionojn. Eble mi povis simpatiigi al vi la facilan lingvon kaj la belan, praktikan movadon. Nun mi adiaŭas. Sed antaŭ tio mi havas grandan peton kaj fortan deziron. *Mi ne volas adiaŭi vin.* Mi deziras vin vidi, revidi, en la Esperantistaj kluboj. Vi lernis multajn vortojn, vi scias multe, tamen vi ankoraŭ ne estas perfekta Esperantisto. Sed espereble baldaŭ vi estos tia. Vi devas vin perfektigi, paroli en la lingvo, por ke

vi povu kompreni kaj komprenigi vin. Venu do, por ke vi povu paroli en la kluboj kun enlandaj kaj eksterlandaj samideanoj. Kaj korespondu kun hotentotaj aŭ aliaj gesamideanoj kaj legu la Esperantajn gazetojn kaj librojn. Vi scias, ke originalaj kaj tradukitaj verkoj tre multaj *aperis* en Esperanto; legu nian literaturon. Kaj tiel, kiu scias, vi eble estos ano de Esperantista Akademio.

Venu, por ke oni instruu vin pri la praktika Esperanto. Eble vi scias, ke la Esperantistoj havas grandajn organizaĵojn, kiuj ĉie havas personojn (delegitojn) por servi la anojn. Ni jam ellernis la gramatikon, sed tio ne estas *sufiĉa*. Anstataŭ forgesi, lernu plu.

Per unu frazo : *Ĝis la plej baldaŭa revido !*



Adiaŭ. Ĝis revido.

## Notas

1. **estus . . . inta** expresa una condición pasada, o una suposición dependiente de ella. **Se li estus rigardinta, li ne estus falinta**—si él hubiese mirado no se habría caído.
2. **Bruli**—quemarse, consumirse por el fuego; es verbo intransitivo. Quemar es **bruligi**. **Ekbruligi**—encender, comenzar a quemar. Del mismo modo: **la akvo bolas**—el agua hierve, **la kuiristino boligas la akvon**—la cocinera hace hervir el agua. **Morti**—morir, **mortigi**—matar (causar la muerte).
3. **Ambaŭ**—ambos-as.
4. El sufijo **-er** señala la partícula o el elemento: **fajro**—fuego, **fajrero**—chispa, **mono**—dinero, **monero**—moneda, **pano**—pan, **panero**—migaja.
5. **Alporti**—traer.
6. **ĵus**—recién.
7. El sufijo **-um** no tiene sentido definido. Por lo tanto las palabras que con el se forman deben ser aprendidas como palabras raíces. **Kolo**—cuello (pescuezo), **kolumo**

—cuello (de vestido), **aero**—aire  
**aerumi**—airear, **kruc**—cruz  
**krucumi**—crucificar.

8. **Krom**—aparte de, además de, sin contar.
9. 400 **metrojn alta**. Este es llamado acusativo de medida: **La tablo estas du metrojn longa**.
10. El prefijo **re-** indica repetición reiteración: **rekomenci**—recomenzar, **relegi**—releer.
11. **Kies**—de quien, cuyo, **ties**—de ese, del cual, **ies**—de alguien, **ĉies**—de todos, **nenies**—de nadie.
12. El sufijo **-estr** indica el jefe, principal, la autoridad: **Urbestro**—alcalde, **ŝipestro**—comandante de un buque, **estro**—jefe.
13. El sufijo **-op** expresa colectividad **duope**—de a dos, en yunta.
14. **Por**—para. **Por lerni**—para aprender, **por ke vi lernu**—para que Ud. aprenda, **por ke vi povu lerni**—para que Ud. pueda.
15. Si se lo usa como prefijo **el** señala la terminación, la plenitud de una acción: **ellerni**—aprender completamente, hasta el fin, **eluzi**—usar, aprovechar hasta el fin.

(quien, cual) Interrogativo y relativo	k	i	u = individuo, identidad
(ese, eso) Demostrativo	t		o = cosa
(alguien, algo) Indefinido	-		a = clase, cualidad
(todos, cada) Total	ĉ		e = lugar
(nada, nadie) Negativo	nen		en = dirección
			om = cantidad
			am = tiempo
		el = modo	
		al = causa	
		es = posesión	

## LEGAĴOJ

### Moderna Fabelo pri la eta Birdo kaj la Arbeto

Foje eta birdo tre tre *enuis* kaj flugis al *arbeto*. La eta birdo diris al la arbeto:

— Kara arbeto, *lulu* min!

— Unue mi estas Arbeto Moŝto, — respondis la arbeto — due mi nun ne havas oficialajn horojn, kaj trie mi absolute ne havas humoron luli vin, vi, signifna birdeto!

La eta birdo tre malgajigis, foriris. Ĝi iris, iradis, fine ĝi renkontis beston. La besto havis barbon kaj ĝi diris:

“Mek-mek”! Tiu ĉi besto estis la *kapro*.

La eta birdo diris:

— Kapro, manĝu la arbeton!

Sed la kapro ne volis manĝi la arbeton kaj tial la arbeto ne lulis la etan birdon. *Denove* iris, iradis la eta birdo. Nun ĝi renkontis grandan beston en la arbaro. La besto havis fortajn dentojn kaj ĝi similis al hundo, sed estis pli forta ol la hundo. Tiu besto estis la *lupo*.

— Lupo, disŝiru la kapron!

— Pardonon, mia kara, — diris la lupo — vi estas tro diktatora hodiaŭ. Eble mi *volonte* manĝus vin, sed vi estas tro malgranda. Estos plej bone, se vi foriros.

La lupo ne volis disŝiri la kapron, a kapro ne volis manĝi la arbeton kaj la arbeto ja ne lulis la etan birdon.

Denove iris, iradis la eta, malgaja birdo. Foje ĝi renkontis aŭtomobilon. *Gentile* ĝi diris al la aŭtomobilo:

— Kara, bonodora Benzin-aparato, ektimigu la lupon!

La aŭtomobilo havis alian *direkton*. Ĝi ne volis ektimigi la lupon, la lupo ne volis disŝiri la kapron, la kapro ne volis manĝi la arbeton kaj la arbeto ne volis luli la etan birdon.

La eta birdo estis tute melankolia. Ĝi iris, iradis, fine ĝi renkontis fajron.

— Fajro, bruligu la aŭtomobilon!

— *Certe vi kredas*, ke mi estas *freneza*. La aŭtomobilo estas *asekurita*. *Vane* mi ne laboras, — respondis la fajro.

La fajro ne volis bruligi la aŭtomobilon, la aŭtomobilo ne volis ektimigi la lupon, la lupo ne volis disŝiri la kapron, la kapro ne volis manĝi la arbeton kaj la arbeto ja ne volis luli la etan birdon.

Iris, iradis, plore la eta birdo; foje ĝi renkontis akvon.

— Akvo, mi petas vin, *estingu* la fajron.

— Mi ne havas tempon, mia kara, — diris *milde* la akvo — hodiaŭ mi havas tre multe da laboro. Nun mi devas iri al kontraŭalkohola kunsido. Eble morgaŭ! Ĝis revido, mia kara, ĝis revido!

La akvo ne volis estingi la fajron, a fajro ne volis bruligi la aŭtomobilon,

la aŭtomobilo ne volis ektimigi la lupon, la lupo ne volis disŝiri la kapron, la kapro ne volis manĝi la arbeton kaj la arbedo ja ne lulis la etan birdon.

Iris, iradis malgaje la eta birdo. Foje ĝi renkontis bankdirektoron.

— Tre estimata sinjoro Bankdirektoro! Patro de la malriĉuloj! Trinku la akvon!

Akvon! Absolute ne! Mi estas tre okupita. Ĉu vi komprenas, kio estas fajfilo? Nu, fajfilo estas *grava objekto*, per kiu oni *fajfas*. La fajfilo havas gravajn partojn. Tre grava parto de la fajfilo estas la *truo*. Nu, mi nun organizas la fajfil-truo-eksporton al Hotentotlando. Mi ne havas tempon, bedaŭrinde. Kaj mi tre malofte trinkas akvon, prefere ĉampanon. Ĉu vi ne havas alian aferon? Ĝis revido, do ĝis revido, sinjoro. Eble alian fojon.

La bankdirektoro ne volis trinki la akvon, la akvo ne volis estingi la fajron, la fajro ne volis bruligi la aŭtomobilon, la aŭtomobilo ne volis timigi la lupon, la lupo ne volis disŝiri a kapron, la kapro ne volis manĝi

la arbeton kaj la arbedo ne lulis la etan birdon.

Iris, iradis senespere la eta birdo. Fine ĝi renkontis tre belan, modernan, simpatian, maldikan, junan sinjorinon.

— Belega sinjorino, mi petas vin, kisu la bankdirektoron.

— Ĉu li estas bela?

— Ne, li estas malbela.

— Ĉu li estas juna?

— Ne, li estas maljuna.

— Ĉu li havas longajn harojn?

— Li absolute ne havas harojn.

— Ĉu li estas riĉa?

— Jes, jes, li estas riĉega.

— Riĉa? Ho bone, mi kisas lin

Kuris la eleganta sinjorino, kisis la bankdirektoron. Kuris la bankdirektoro por trinki la akvon, kuris la akvo por estingi la fajron, kuris la fajro por bruligi la aŭtomobilon, kuris la aŭtomobilo por timigi la lupon, kuris la lupo por disŝiri la kapron, kuris la kapro por manĝi la arbeton kaj la arbedo ja lulis la etan birdon.

Se la bankdirektoro ne estus riĉa, mia fabelo *daurus* pli longe.

## Originalaj Poemoj

Ho, mia kor'.

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,  
El mia brusto nun ne saltu for!  
Jam *teni* min ne povas mi facile,  
Ho, mia kor'!

Ho, mia kor'! Post longa laborado  
Ĉu mi ne *venkos* en *decida* hor' ?  
*Sufiĉe!* Trankviliĝu de l' batado,  
Ho, mia kor'!

Ludoviko Zamenhof.

## Kanto de l' Vagabondo

Vagabond' de l' mondo estas mi  
*vaganta* sur la ter'.  
En animo *regas* harmoni'  
kun *gojo* kaj esper'.  
Se *trompas* min la *sortfavor'*,  
*perfidas* amatin' ;  
vagabond' de l' mondo en la kor'  
mi restos ĝis la fin'.

J. Baghy.

## Aforismoj

Feliĉa estas fiŝo tuta,  
Ĉar fiŝedzino estas muta.

La piro *kreskas* sur la arbo,  
Sur viro *kreskas* nur la barbo.

La hundo *svingas* sjan *voston*,  
Se vidas ĝi viandan *oston*.

Raymond Schwartz.

## Pri la Unua Esperanto-Kongreso en Boulogne-sur-Mer 1905

Trans ĉiuj stratoj de la urbeto marborda *balanciĝis* verdaj flagoj kun la stelo de la espero. Ĉirkaŭ la teatro jam aŭdiĝis nur la lingvo internacia. Angloj kun flanela ĉapo, francoj en solena frako, poloj, rusoj, holandanoj en vojaĝa vesto, ĉarmaj hispaninoj kun koloraj ŝaloj renkontiĝis sur la *placo* kaj *babilis* kune. Ili sin komprenis. *Flue* kaj facile flugis la paroloj. De lipo al orelo. De svedoj al italoj. Falis, falis muroj inter la popoloj . . .

*Subite eksonis* la muziko de la himno *La Espero* :

*En la mondon venis nova sento.*

*Tra la mondo iras forta voko.*

Samtempe ni ĉiuj stariĝis. Jen sur scenejo, kun la *estraro* de la kongreso, eniris la amata *Majstro*. Malalta, timema, *kortuŝita*, kun frunto tre granda, *rondaj okulvitroj*, barbeto jam griza. Ĉio jam flugis aŭ *svingiĝis* en aero, manoj, ĉapoj, tuko . . . Sed jam li

ekparolis . . . Tra *silento* sonis lia vortoj :

" Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej *diversaj regnoj* de la mondo, por frate *premi* al si *reciproke* manojn, pro la nomo de la granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas . . .

Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. *Modesta* estas nia kunveno ; la mondo ekstera ne multe scias pri ĝi kaj la vortoj, kiuj estas parolataj en nia kunveno, ne flugos telegrafe al ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo ; ne venis regnestroj nek ministroj por *ŝanĝi* la politikan karton de la mondo ; ne brilas *luksaj* vestoj kaj multego da imponantaj ordenoj en nia salono, . . . sed tra la aero de nia salono flugas *misteraj* sonoj, sonoj tre malaltaj, ne aŭdeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema ; ĝi estas la sonoj de io granda, kio nun naskiĝas. Tra la aero flugas misteraj

*fantomoj* ; la okuloj ilin ne vidas, sed la animo ilin sentas ; ili estas la *imagoj* de l' tempo estonta, de tempo tute nova . . . . "

Kiam *residis* Zamenhof, denove *aklamata* senfine, multaj okuloj estis *malsekaj*. Tre *simple*, tre *sincere pasis*

horo, malfacile rakontebla . . . *Ciufoje*, kiam ĉeestinto rememoras tiun horon, *larmo* brilas en rigardo lia. Nova tempo ja naskiĝis tiam. Eĉ ne *mondmilito* povis ĝin *detru*i.

Edmond Privat.

## Tradukitaj Poemoj

### Dornrozet

Goethe.

Vidis knab' : Jen, juna flor' !  
Rozujet' kampara !  
Bela, kiel la aŭror' !  
Li alkuris ĝoje por  
Vidi, kiel kara !  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
Rozujet' kampara.

Diris knab' : Mi volas vin,  
Rozujet' kampara.  
Diris roz' ; Mi boras vin,  
Ĉiam vi memoras min,  
Pro l'dolor' amara.  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
Rozujet' kampara.

Knabo rozon ŝiris do  
De l' rozuj' kampara,  
Ĝi, *defende*, pikis tro !  
Sed ne helpis *ve* kaj *ho*  
Kontraŭ vol' barbara.  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
Rozujet' kampara.

(El la germana : K. Kalocsay.)

### En la Arbaro Val'a

Johano Vajda.

En arbaro pra-*profunda*,  
En la densa herb' abunda  
De l' *azil'* kaŝita vala,  
Ombro-densa kaj *vuala*.

Ho, *kiele estus bone*  
Vivi tiel monotone  
En dometo, en azilo  
Vivi pace en trankvilo.

Plu ne *zorgi pri la mondo*,  
Pri *mizero* de l' mondrondo  
Kaj pripensi sur la limo  
La venontan en proksimo.

Pri la nuboj *meditadi*,  
En printempaj floroj *vadi*  
Kaj rigardi sur la monto,  
En estinton, al venonto,

Nevideble, jar' post jaro,  
El la seka foliaro  
De l' vivarbo, je la fino  
Fali al la tera *sino*,

Kaj en nekonata *tombo*  
Endormiĝi sub *branĉ*-ombro  
Plu nenion voli por mi,  
Nur ripozi, dormi, dormi.

(El la hungara : F. Szilágyi.)



## Miniaturó

Edít Södergren.

loron vi serĉis — trovis frukton,  
nton vi serĉis — trovis maron,  
irininon vi serĉis — trovis animon,  
- malkontenta vi estas.

(El la sveda: *Magda Carlsson.*)

## Flirtas Haga Papilio

Bellman.

(Parto.)

Flirtas Haga papilio  
en *nebul'* kaj en sun-or',

faras domon sur folio  
kaj la liton sur la flor'.

*Et-estajojn* en la *marĉo*

naskis jam la suna varm'.

*Ludas* la *zefira arĉo*

*pompas* la printempa ĉarm'.

(El la sveda: *E. Malmgren.*)

## Pensoj

Espero estas la plej bona afero,  
se oni ne havas ion pli bonan.

(*Wilde.*)

Ne estas io pli bela, ol la homa  
korpo, *escepte*, se ĝi vidiĝas el ĉifona  
pantalono.

(*Ignotus.*)

Malamo ne estas estingebla per  
malamo, nur per amo.

(*Buddha.*)

Kiam Adamo unue dormis en la  
Paradizo, estis *kreita* al li la virino.  
Malfeliĉa Adamo. Lia unua sonĝo  
estis por li la lasta *ripozo*.

(*Claudius.*)

Ho, la viv' nur estas spiro sur spegulo,  
Ombro de l' kuranta nubo sur *rivero*.

(*Petöfi.*)

## Fotoj pri la legajoj :

1. Moderna Fabelo : eta birdo — birdeto — malgranda birdo. Bonodora — bon-odora. Estingu — malbruligu.
2. Poemoj : Kor', favor', k.t.p.—koro, favoro. En poezia la terminación o del substantivo puede omitirse, siendo reemplazada por el apóstrofe. Asimismo con el a de la (de l', ver página 57, nota 5). Estas son las únicas terminaciones que pueden omitirse.
3. "Domrozeto" : Roz'uj'eto — roz-arbeto.
4. "En la Arbaro Val'a" : (Val estas hungara vilaĝo). Kiele — kiel.
5. "Flirtas Haga Papilio" : (Haga estas sveda loko). Et-estajoj — etaj (malgrandaj) est-ajoj. Estajo — un ser.

# Tabelo pri la Prefiksoj kaj Sufiksoj

## Prefiksoj

- bo-** parentesco político: **bofrato**—cuñado. Vidu en la 10-a leciono.
- dis-** dispersión: **doni**—dar, **disdoni**—distribuir. 13-a leciono.
- ek-** acción breve o que comienza: **vidi**—ver, **ekvidi**—apercibir, advertir. 15-a leciono.
- eks-** ex: **eksministro**—exministro.
- fi-** moralmente malo. 14-a leciono.
- ge-** ambos sexos reunidos: **gepatroj**—padre y madre. 9-a leciono.
- mal-** lo contrario, lo opuesto: **malriĉa**—pobre. 2-a leciono.
- mis-** equivocadamente, "al revés", "de través": **miskompreni**—comprender "al revés". 14-a leciono.
- pra-** ancestral, bis-: **praavo**—bisabuelo. 12-a leciono.
- re-** repetición: **refari**—rehacer. 16-a leciono.

## Sufiksoj

- aĉ-** de mala calidad: **ĉevalo** caballo, **ĉevalaĉo** mancarrón, jamelgo. 14-a leciono.
- ad-** acción continuada: **paŝado** tiroteo 15-a leciono.
- aj-** cosa o substancia: **skribajo** un escrito, **dolĉajo** un dulce, cosa dulce. 13-a leciono.
- an-** miembro partidario, habitante: **amerikano** un americano, **kristano** un cristiano. 10-a leciono.
- ar-** conjunto de cosas semejantes: **arbo** árbol, **arbaro** bosque, **vorto** vocablo, **vortaro** vocabulario. 9-a leciono.
- ĉj-** diminutivo cariñoso masculino: **Petro Pedro**, **Peĉjo** Pedrito, Pedrin. 12-a leciono.
- ebl-** posibilidad, que se puede hacer: **vidi ver**, **videbla** visible; **kredi** creer, **kredebla** creíble. 7-a leciono.

- ec-** nombre de una cualidad: **mol blanda**, **moleco** molicie, **blan dura**; **infano** niño, **infanec** infancia. 10-a leciono.
- eg-** aumentativo: **domo** casa, **dom ego** casona, **caserón**; **granda** grande, **grandega** enorme; **pluvo** llover, **pluvegi** llover a cántaros 6-a leciono.
- ej-** lugar destinado a: **lerni** aprender, **lernejo** escuela; **kuiiri** cocinar, **kuirejo** cocina. 4-a leciono.
- em-** inclinación, tendencia: **labori** trabajar, **laborema** laborioso, trabajador; **babili** charlar, **babil-ema** charlatán, hablador. 10-a leciono.
- er-** partícula, elemento: **sablo** arena, **sablero** grano de arena; **mono** dinero, **monero** moneda. 16-a leciono.
- estr-** jefe, autoridad: **ŝipo** buque, **ŝipestro** capitán, comandante; **urbo** ciudad, **urbestro** alcalde. 16-a leciono.
- et-** diminutivo: **vojo** camino, **vojeto** caminito, senda; **varma** caliente, **varmeta** tibio; **ridi** reír, **rideti** sonreír. 6-a leciono.
- id-** descendencia: **bovo** buey, **bovido** ternero; **koko** gallo, **kokido** pollo. 8-a leciono.
- ig-** causar, volver, convertir en: **blanka** blanco, **blankigi** blanquear; **morti** morir, **mortigi** matar; **forta** fuerte, **fortigi** fortalecer, fortificar. 8-a leciono.
- iĝ-** hacerse, volverse; **ruĝa** rojo, **ruĝigi** enrojarse; **sidi** estar sentado, **sidiĝi** sentarse; **movi** mover, **moviĝi** moverse. 14-a leciono.
- il-** instrumento: **tranĉi** cortar, **tranĉ-ilo** cuchillo. 5-a leciono.
- in-** femenino: **frato** hermano, **fratino** hermana; **koko** gallo, **kokino** gallina. 1-a leciono.

**id-** digno de, que merece: **admiri** admirar, **admirinda** admirable; **vidi ver**, **vidinda** digno de verse. 15-a leciono.

**ing-** que contiene parcialmente, vaina: **kandelo vela**, **kandelingo** candelero; **glavo** espada, **glavingo** vaina de espada. 13-a leciono.

**ist-** profesión, ocupación habitual: **ŝuo** zapato, **ŝuisto** zapatero; **okulo** ojo, **okulisto** oculista; **polico** la policía, **policisto** un policía. 2-a leciono.

**nj-** diminutivo cariñoso femenino: **patrino** madre, **panjo** mamá, mamita. 12-a leciono.

**obl-** multiplicativo: **duobla** doble; **centoble** cien veces; **multoblige** multiplicar. 12-a leciono.

**on-** fracción: **duono** medio, mitad; **centono** una centésima parte; **duonigi** partir por la mitad. 12-a leciono.

**op-** colectivo, grupo: **duope** de a dos; **centope** de a cien, por centenares. 16-a leciono.

**uj-** contenedor, recipiente: **supo** sopa, **supujo** sopera.

También se lo usa para plantas frutales: **vinbero** uva, **vinberujo** vid, parra (que contiene uva).

Y para nombre de países: **anglo** un inglés, **Anglujo** Inglaterra (que contiene a los ingleses). 13-a leciono.

**ul-** persona caracterizada por . . . : **blinda** ciego, **blindulo** un ciego; **juna** joven, **junulo** un joven; **miliono** millón, **milionulo** millonario. 11-a leciono.

**um-** sufijo indefinido: **kolo** cuello, pescuezo, **kolumo** cuello (de vestido); **vento** viento, **ventumi** dar viento, abanicar; **ventumilo** abanico. 16-a leciono.

# VOCABULARIO

-a adjetivo  
**aboni** abonarse  
**absoluta** absoluto  
**abunda** abundante  
**aĉeti** comprar  
**acida** ácido, agrio  
**-aĉ-** (ver pág. 88)  
**-ad-** (ver pág. 88)  
**adiaŭ** adiós  
**adjektivo** adjetivo  
**adreso** dirección, domicilio  
**advokato** abogado  
**aero** aire  
**afero** asunto, cosa (affaire)  
**akademio** academia  
**ajn** (cual, quien) quiera (ver pág. 61)  
**-aj-** (ver pág. 88)  
**aklami** aclamar  
**akra** agudo, acre  
**aktoro** actor  
**akvo** agua  
**al a, hacia**  
**alia** otro  
**alkoholisto** alcoholista  
**alta** alto  
**alumeto** fósforo, cerilla  
**alveni** llegar  
**amara** amargo  
**ambaŭ** ambos  
**ami** amar  
**amiko** amigo  
**-an-** (ver pág. 88)  
**anaso** pato  
**anekdoto** anécdota  
**angla** inglés (adj.)  
**angelo** ángel  
**animo** alma  
**ankaŭ** también  
**ankoraŭ** aún, todavía  
**anonci** anunciar  
**ansero** ganso  
**anstataŭ** en lugar de  
**-anta** participio activo presente  
**antaŭ** ante, delante de  
**aparato** aparato  
**aperi** aparecer  
**apetito** apetito  
**aprilo** abril  
**apud** junto a, al lado de

-ar- (ver pág. 88)  
**arangi** arreglar, disponer  
**arbo** árbol  
**arĉo** arco (violín)  
**arĝento** plata (metal)  
**-as** tiempo presente de verbo  
**asekuri** asegurar (la vida)  
**-ata** participio pasivo presente  
**atendi** esperar, aguardar  
**atenti** prestar atención  
**atleto** atleta  
**aŭ** ó, ú  
**aŭdi** oír  
**aŭgusto** agosto  
**aŭroro** aurora  
**aŭskulti** escuchar  
**aŭto(mobilo)** auto(móvil)  
**aŭtobuso** autobús  
**aŭtuno** otoño  
**avelo** avellana  
**averti** advertir  
**avo** abuelo  
**azeno** asno  
**azilo** asilo

**babili** charlar  
**baki** hornear  
**balanci** balancear, medir  
**baldaŭ** pronto  
**balo** baile (reunión)  
**banano** banana  
**bani** bañar  
**banko** banco (finanzas)  
**barbara** bárbaro  
**barbiero** barbero  
**barbo** barba  
**bardo** bardo  
**bati** golpear  
**bedaŭri** lamentar  
**bela** bello  
**benko** banco (asiento)  
**benzino** nafta  
**bero** baya  
**besto** bestia, animal  
**bezoni** necesitar  
**biero** cerveza  
**bifstekoj** bife  
**bildo** imagen, figura  
**birdo** ave, pájaro  
**blanka** blanco  
**blinda** ciego

**blonda** rubio  
**blovi** soplar  
**blua** azul  
**bo-** (ver pág. 88)  
**boato** embarcación  
**boji** ladrar  
**bona** bueno  
**bonvoli** tener la amabilidad, tener a bien  
**bori** agujerear  
**boto** bota  
**bovo** bucy  
**branĉo** rama  
**brando** aguardiente  
**brasiko** repollo  
**brava** bravo  
**brili** brillar  
**bruli** quemarse, arde  
**bruna** marrón  
**brusto** pecho  
**buŝo** boca  
**butero** manteca

**cent** 100  
**ceremonio** ceremonia  
**certa** cierto, seguro  
**cigaro** cigarro  
**cikonio** cigüeña  
**cirklo** círculo  
**citrono** limón

**ĉambro** pieza, habitación  
**ĉampano** champaña  
**ĉapelo** sombrero  
**ĉar** porque  
**ĉarma** encantador  
**ĉe** en, en lo de, junto a  
**ĉefa** principal  
**ĉevalo** caballo  
**ĉi tie** aquí, acá  
**ĉi tio** esto  
**ĉi tiu** este, esta  
**ĉia** de toda clase  
**ĉial** por toda causa  
**ĉiam** siempre  
**ĉie** en todas partes  
**ĉiel** de todos modos  
**ĉielo** cielo  
**ĉien** hacia todas partes  
**ĉies** de todos  
**ĉifono** harapo, trapo  
**ĉio** todo  
**ĉiom** toda la cantidad

**ĉirkaŭ** alrededor  
**ĉiu** cada uno  
**ĉiuj** todos  
**-ĉj-** (ver pág. 88)  
**ĉokolado** chocolate  
**ĉu** ¿es qué... ¿caso...  
partícula interrogativa  
(?).

**da de** (medida, cantidad)  
**danci** danzar  
**danki** agradecer  
**daŭri** continuar  
**de de**  
**decembro** diciembre  
**decidi** decidir  
**defendi** defender  
**dek** 10  
**dekstra** derecho (lado)  
**delegi** delegar  
**delegito** delegado  
**demandi** preguntar  
**denove** de nuevo  
**densa** denso  
**dento** diente  
**deserto** postre  
**detru** destruir  
**devi** deber  
**deziri** desear  
**dialogo** diálogo  
**diamanto** diamante  
**digesto** digestión  
**dika** grueso  
**diktatoro** dictador  
**dimanĉo** domingo  
**Dio** Dios  
**diri** decir  
**direkto** dirección (a  
seguir)  
**dis-** (ver pág. 88)  
**disko** disco  
**diversa** diverso  
**do** pues  
**doktoro** doctor  
**dolĉa** dulce  
**dolori** doler  
**domo** casa  
**doni** dar  
**dormi** dormir  
**dorno** espina  
**dorso** espalda, dorso  
**drinki** beber por vicio  
**du** 2

**dua** segundo  
**dum** durante, mientras

**-e** adverbio  
**-ebl-** (ver pág. 88)  
**-ec-** (ver pág. 88)  
**eĉ** hasta, siquiera  
**edzo** esposo  
**-eg-** (ver pág. 88)  
**egalia** igual  
**-ej-** (ver pág. 88)  
**ek-** (ver pág. 88)  
**eks-** (ver pág. 88)  
**eksporto** exportación  
**ekster** fuera (de)  
**ekzemplo** ejemplo  
**el de, de** entre  
**elefanto** elefante  
**eleganta** elegante  
**elektra** eléctrico  
**-em-** (ver pág. 88)  
**en en,** dentro  
**energia** energético  
**enui** aburrirse  
**episkopo** obispo  
**-er-** (ver pág. 88)  
**escepto** excepción  
**esperi** esperar (tener  
esperanza)  
**esti** ser, estar  
**estimi** estimar  
**estingi** extinguir  
**-estr-** (ver pág. 88)  
**-et-** (ver pág. 88)  
**eterna** eterno  
**ezoko** lucio (pez)

**fabelo** fábula  
**facila** fácil  
**fajfi** silbar  
**fajro** fuego  
**fali** caer  
**familio** familia  
**fantazio** fantasía  
**fantomo** fantasma  
**farbo** materia colorante  
**fari** hacer  
**farti** estar, hallarse de  
salud  
**favoro** favor  
**februaro** febrero  
**feliĉa** feliz

**fenestro** ventana  
**fermi** cerrar  
**festi** festejar  
**fi-** (ver pág. 88)  
**fianĉo** novio  
**filo** hilo  
**filmo** "film"  
**fini** terminar  
 **fingro** dedo  
**fiŝo** pez  
**flago** bandera  
**flanelo** franela  
**flari** oler  
**flava** amarillo  
**flirti** revolotear  
**floro** flor  
**flugi** volar  
**flui** fluir  
**fojo** vez  
**folio** hoja  
**fonto** fuente  
**for** fuera, lejos  
**forgesi** olvidar  
**forko** tenedor  
**formo** forma  
**forno** horno  
**forta** fuerte  
**frako** frac  
**franca** francés  
**frato** hermano  
**fraŭlo** (un) soltero  
**fraŭlino** señorita  
**frazo** frase  
**fremda** extraño, extran-  
jero  
**freneza** loco  
**frue** temprano  
**frukto** fruto  
**frunto** frente (de la cara)  
**fumi** fumar

**gaja** alegre  
**gazeto** periódico  
**ge-** (ver pág. 88)  
**germana** alemán  
**gipso** yeso  
**glaso** vaso  
**glavo** espada  
**glui** pegar (con cola)  
**gorilo** gorila  
**grado** grado  
**gramofono** gramófono  
**granda** grande

**gratuli** felicitar  
**grava** importante  
**griza** gris  
**gusto** gusto  
**gvidi** guiar

**ĝardeno** jardín  
**ĝentila** gentil, cortés  
**ĝi** ello  
**ĝirafa** jirafa  
**ĝis** hasta  
**ĝojo** regocijo, alegría

**halti** detenerse, hacer alto  
**haro** pelo  
**haremo** harem  
**harmonio** armonía  
**havi** tener, poseer  
**hejmo** hogar  
**hejti** calentar  
**hela** claro, luminoso  
**helpi** ayudar  
**herbo** hierba  
**hieraaŭ** ayer  
**himno** himno  
**hispana** español  
**historio** historia  
**ho** ho  
**hodiaŭ** hoy  
**homo** hombre, ser humano  
**honorario** honorario  
**horloĝo** reloj  
**horo** hora  
**hotentoto** hotentote  
**humoro** humor  
**hundo** perro  
**hungara** húngaro

**-i** infinitivo del verbo  
**ia** alguna clase  
**ial** por alguna causa  
**iam** alguna vez  
**-id-** (ver pág. 88)  
**ideo** idea  
**ie** en alguna parte  
**iel** de algún modo  
**ies** de alguien  
**-ig-** (ver pág. 88)  
**-iĝ-** (ver pág. 88)  
**-il-** (ver pág. 88)  
**ili** ellos, ellas  
**imagi** imaginar

**imiti** imitar  
**impona** imponente  
**-in-** (ver pág. 88)  
**-ind-** (ver pág. 89)  
**infano** niño  
**-ing-** (ver pág. 89)  
**inko** tinta  
**instrui** enseñar, instruir  
**instrumento** instrumento  
**-inta** participio activo pasado  
**inteligenta** inteligente  
**interesa** interesante  
**intima** íntimo  
**io** algo  
**iom** algo (cantidad)  
**iri** ir  
**-is** tiempo pasado del verbo  
**-ism-** ismo  
**-ist-** (ver pág. 89)  
**-ita** participio pasivo pasado  
**itala** italiano  
**iu** alguien, alguno

**-j** plural  
**jako** chaqueta, saco  
**jam** ya  
**januaro** enero  
**japana** japonés  
**jaro** año  
**je** preposición indefinida  
**jen** he aquí  
**jes** sí  
**ju (pli)** . . . cuanto (más) . . .  
**des (pli)** tanto (más)  
**julio** julio  
**juna** joven  
**junio** junio

**ĵaŭdo** jueves  
**ĵeti** arrojar  
**ĵus** recién

**kafo** café (bebida, grano)  
**kakto** cacto  
**kalendaro** calendario  
**kalkuli** calcular, contar  
**kampo** campo  
**kanario** canario  
**kandelo** vela

**kanti** cantar  
**kapitano** capitán  
**kapo** cabeza  
**kapro** cabra  
**kara** querido, caro  
**karaktero** carácter  
**karbo** carbón  
**karto** tarjeta, naipe  
**kaŝi** esconder  
**katalogo** catálogo  
**katastrofo** catástrofe  
**kato** gato  
**ke** que (conjunción)  
**kelka** algún  
**kelkaj** algunos  
**kelnero** mozo, camarero  
**kesto** caja, cajón  
**kia** que (clase)  
**kial** por qué  
**kiam** cuando  
**kie** donde  
**kiel** como  
**kies** cuyo  
**kilogramo** quilo  
**kilometro** kilómetro  
**kio** que (cosa)  
**kiom** cuanto  
**kiu** que, quien  
**kisi** besar  
**klara** claro  
**klini** inclinar  
**klubo** club  
**knabo** muchacho  
**koko** gallo  
**koleri** encolerizarse  
**kolo** cuello  
**kolonelo** coronel  
**koloro** color  
**kombi** peinar  
**komenci** comenzar  
**kompreni** comprender  
**koni** conocer  
**kontenta** contento  
**kontraŭ** contra  
**korekti** corregir  
**koro** corazón  
**korpo** cuerpo  
**kosti** costar  
**kostumo** traje  
**koto** barro  
**koverto** sobre (de carta)  
**krajono** lápiz  
**krei** crear

**kredi** creer  
**kreksi** crecer  
**krii** gritar  
**krokodilo** cocodrilo  
**krom** aparte de  
**krono** corona  
**k.t.p.** etc.  
**kuiiri** cocinar  
**kulero** cuchara  
**kun** con (en compañía)  
**kune** junto  
**kuraci** curar, tratar enfermedad  
**kuraga** valiente  
**kuri** correr  
**kurteno** cortina  
**kuŝi** yacer  
**kuzo** primo  
**kvanto** cantidad  
**kvar** 4  
**kvin** 5

**la** el, la, los, las  
**labori** trabajar  
**laca** cansado  
**lakto** leche  
**lampo** lámpara  
**lando** país  
**lango** lengua (órgano)  
**larino** lágrima  
**larĝa** ancho  
**lasta** último  
**laŭta** ruidoso, en alta voz  
**lavi** lavar  
**leciono** lección  
**legi** leer  
**legomo** legumbre, hortaliza  
**leporo** liebre  
**lerni** aprender  
**lerta** hábil  
**letero** carta  
**levi** levantar  
**li** él  
**libro** libro  
**ligi** ligar, atar  
**ligno** madera  
**likvoro** licor  
**lingvo** lengua, idioma  
**linio** línea  
**lipo** labio  
**listo** lista  
**literaturo** literatura

**litero** letra  
**loĝi** habitar  
**loko** lugar  
**lokomotivo** locomotora  
**longa** largo  
**ludi** jugar, tocar música  
**luksa** lujoso  
**luli** acunar  
**lundo** lunes  
**luno** luna  
**lupo** lobo  
  
**majo** mayo  
**majstro** maestro (guía espiritual)  
**mal-** (ver pág. 88)  
**mano** mano  
**manĝi** comer  
**marĉo** pantano  
**mardo** martes  
**maro** mar  
**marŝi** marchar  
**marto** marzo  
**maŝino** máquina  
**matematiko** matemáticas  
**mateno** mañana (parte del día)  
**meblo** mueble  
**mediti** meditar  
**melankolia** melancólico  
**melodio** melodía  
**mem** mismo  
**merkredo** miércoles  
**meti** poner  
**mezo** medio (centro)  
**mi** yo  
**miaŭi** maullar  
**mil** 1000  
**milda** dulce (de carácter)  
**miliono** millón  
**milito** guerra  
**mineralo** mineral  
**miniaturó** miniatura  
**ministro** ministro  
**minus** menos (signo)  
**minuto** minuto  
**miri** admirar  
**mis-** (ver pág. 88)  
**mistero** misterio  
**mizero** miseria  
**moderna** moderno  
**modesta** modesto  
**mola** blando

**momento** momento  
**monato** mes  
**mondo** mundo  
**mono** dinero  
**monto** montaña  
**montri** mostrar  
**morgaŭ** mañana (día siguiente)  
**morti** morir  
**moŝto** título honorífico  
**motoro** motor  
**movi** mover  
**mueli** moler  
**multa** mucho  
**multaj** muchos  
**muro** muro  
**muso** laucha  
**muta** mudo  
**muzeo** museo  
**muziko** música

**-n** acusativo  
**nacio** nación  
**naĝi** nadar  
**naski** parir  
**naskigi** nacer  
**natura** natural  
**naŭ** 9  
**nazo** nariz  
**ne** no  
**nebuló** niebla  
**negro** un negro  
**neĝi** nevar  
**nenia** de ninguna clase  
**neniam** nunca  
**nenie** en ninguna parte  
**neniel** de ningún modo  
**nenies** de nadie  
**nenio** nada  
**neniom** nada (cantidad)  
**neniu** nadie, ningún  
**nepo** nieto  
**nevo** sobrino  
**ni** nosotros  
**nigra** negro  
**-nj-** (ver pág. 89)  
**nokto** noche  
**nomo** nombre  
**normala** normal  
**nova** nuevo  
**novelo** novela corta  
**novembro** noviembre  
**nu** y bien, pues bien

nubo nube  
 nun ahora  
 nur solamente

-o sustantivo  
 objekto objeto  
 -obl- (ver pág. 89)  
 oceano océano  
 odoro olor  
 ofta frecuente  
 ok 8  
 okazi ocurrir, tener lugar  
 oktobro octubre  
 okulo ojo  
 okupi ocupar  
 ol que (comparación)  
 ombrello sombrilla, paraguas  
 ombro sombra  
 oni se (pronombre)  
 -on- (ver pág. 89)  
 onklo tío  
 -onta participio activo futuro  
 -op- (ver pág. 89)  
 operacii operar  
 opero ópera  
 orango naranja  
 ordeno orden (condecoración)  
 ordinara ordinario  
 orelo oreja  
 organizi organizar  
 originala original  
 orkestro orquesta  
 oro oro  
 -os tiempo futuro del verbo  
 osto hueso  
 -ota participio pasivo futuro  
 ovo huevo

pacienco paciencia  
 paco paz  
 pafi disparar (un arma)  
 pagi pagar  
 pago página  
 paki empaquetar  
 palmo palmera  
 palto gabán  
 pano pan  
 pantalono pantalón

papero papel  
 papilio mariposa  
 paradizo paraíso  
 pardoni perdonar  
 parkere de memoria  
 paroli hablar  
 parto parte  
 pasi pasar  
 pastro sacerdote  
 patro padre  
 peco pedazo, pieza  
 pendi pender  
 pensi pensar  
 pentri pintar  
 per con (por medio de)  
 perfekta perfecto  
 perfidi traicionar  
 periodo periodo  
 persono persona  
 peti pedir, rogar  
 petrolo petróleo, querosén  
 piedo pie  
 piki picar, pinchar  
 piro pera  
 placo plaza  
 plači agradar  
 plafono cielo raso  
 planko piso de habitación  
 plej (lo—) más  
 plena pleno, lleno  
 pli más  
 plori llorar  
 plu (no, aun) más  
 pluraj varios  
 pluralo plural  
 plus (+)  
 pluvi llover  
 po a razón de  
 poemo poema  
 poeto poeta  
 pola polaco  
 politiko política  
 pomo manzana  
 pompo pompa  
 popolo pueblo, población  
 porcelano porcelana  
 pordo puerta  
 porko cerdo  
 porti llevar  
 portreto retrato  
 post después, detrás  
 poŝto correo

poŝtmarko sello postal  
 povi poder  
 pra- (ver pág. 88)  
 praktika práctico  
 preciza preciso  
 preferi preferir  
 premi apretar  
 preni tomar, coger  
 preskaŭ casi  
 pri acerca de  
 printempo primavera  
 pro por (a causa de)  
 profunda profundo  
 programo programa  
 proksima cerca  
 promeni pasear  
 promesi prometer  
 prospekto prospecto  
 pseŭdonimo pseudónimo  
 pulmo pulmón  
 punkto punto  
 pura puro, limpio

radioaparato aparato de radio  
 rakonti contar, relatar  
 rato ratón  
 razi afeitar  
 re- (ver pág. 88)  
 reciproka recíproco  
 regi regir, gobernar  
 regno reino, estado  
 reĝo rey  
 remi remar  
 respondi contestar, responder  
 resti quedar, permanecer  
 ricino ricino  
 riĉa rico  
 ridi reir  
 rigardi mirar  
 ringo anillo  
 ripozi reposar  
 rivero río  
 rompi romper  
 ronda redondo  
 rozo rosa  
 ruĝa rojo

sabato sábado  
 sablo arena  
 salajro salario, sueldo  
 salato ensalada



salo sal  
salono salón  
salti saltar  
saluti saludar  
sama mismo, igual  
sana sano  
sandviĉo "sandwich"  
sango sangre  
sankta santa, san  
sapo jabón  
sata saciado  
sceno escena  
sciencia científico  
scii saber  
se si (condición, duda)  
sed pero, sino  
seĝo silla  
seka seco  
sekundo segundo (tiempo)  
semajno semana  
sen sin  
sendi enviar  
senti sentir  
sep 7  
septembro setiembre  
serĉi buscar  
serpento serpiente  
servi servir  
ses 6  
sezono estación (del año)  
si sí (mismo)  
sidi estar sentado  
signali señalar  
signifi significar  
silenta silencioso  
simbolo símbolo  
simili parecerse, ser similar  
simio mono, simio  
simpatia simpático  
simpla simple  
sincera sincero  
singularo singular (gramática)  
sinjoro señor  
sino seno  
situacio situación  
skribi escribir  
soifa sediento  
sola solo  
soldato soldado  
solena solemne

soleo lenguado (pez)  
somero verano  
songi soñar  
sono sonido  
sorto suerte, hado  
speĝulo espejo  
spiri respirar  
sporto deporte  
staci(dom)o estación (ferrocarril)  
stango vara, palo, asta  
stari estar de pie, parado  
statuo estatua  
stelo estrella  
stomako estómago  
strato calle  
streĉi tender, poner en tensión  
strofo estrofa  
sub bajo, debajo  
subita súbito  
suferi sufrir  
sufiĉa suficiente  
sufikso sufijo  
sukcesi tener éxito  
sukero azúcar  
suno sol  
super sobre, por encima  
supo sopa  
sur sobre  
surda sordo  
sveda sueco  
svingi agitar, blandir  
  
ŝalo chal  
ŝanĝi cambiar  
ŝati apreciar, gustar  
ŝi ella  
ŝipo buque  
ŝiri desgarrar  
ŝlosi cerrar con llave  
ŝranko armario  
ŝtono piedra  
ŝtopi tapar, obturar  
ŝtrumpo media, calcetín  
ŝuo zapato  
  
tabelo lista, tabla (de multiplicar, etc.)  
tablo mesa  
tago día  
tajloro sastre  
tamen sin embargo

tasoz taza  
teatro teatro  
teknika técnico  
teksto texto  
telefonu telefonar  
telegramo telegrama  
telero plato  
tempo tiempo  
teni tener  
teo té  
tero tierra  
terpomo papa, patata  
tia tal, de tal clase  
tial por eso  
tiam entonces  
tie allí, allá  
tiel así, de tal modo  
ties de ése, de aquel  
timi temer  
tio eso  
tiom tanto (cantidad)  
tiri tirar (hacia si)  
titolo título  
tiu ese, esa, aquel, aquella  
tomato tomate  
tondi cortar con tijeras  
tordi torcer  
tra a través  
traduki traducir  
tramo (tramveturilo) tranvía  
tranĉi cortar  
trankvila tranquilo  
trans más allá, al otro lado de  
tre muy  
tremi temblar  
tri 3  
trinki beber  
trompi engañar  
trovi encontrar  
trumpeto trompeta  
truo agujero  
tuko paño, tela  
tuŝi tocar  
tuta total, completo  
  
-u imperativo del verbo  
-uj- (ver pág. 89)  
-ul- (ver pág. 89)  
-um- (ver pág. 89)  
ungo uña  
uniformo uniforme

**unu** 1  
**urbo** ciudad  
**-us** condicional del verbo  
**utila** útil  
**uzi** usar

**vadi** vadear  
**vagabondo** vagabundo  
**vagi** vagar  
**vagono** vagón  
**valo** valle  
**vana** vano  
**varma** caliente  
**ve** ay  
**vegetarano** vegetariano  
**veki** despertar  
**vendi** vender  
**vendredo** viernes  
**veni** venii

**venki** vencer  
**vento** viento  
**vera** verdadero  
**verbo** verbo  
**verda** verde  
**verko** obra (de arte o literatura)  
**verso** verso  
**vespero** anochecer  
**vesto** ropa, prenda de vestir  
**veŝto** chaleco  
**vetero** tiempo (estado atmosférico)  
**vi** usted, ustedes  
**viando** carne (comestible)  
**vidi** ver  
**vidvo** viudo  
**vilaĝo** aldea

**vino** vino  
**vintro** invierno  
**viro** varón hombre,  
**viŝi** limpiar fregando  
**vitriolo** vitriolo  
**vivi** vivir  
**viziti** visitar  
**vojaĝi** viajar  
**voki** llamar  
**voli** querer, tener voluntad  
**volonte** de buena gana  
**vorto** palabra, vocablo  
**vosto** cola, rabo  
**vualo** velo  
**zefiro** céfiro  
**zorgi** cuidar de

## CUADRO DE VOCES SIMPLES

	INDIVIDUO	CUALIDAD	COSA	POSESION	CANTIDAD	LUGAR	TIEMPO	CAUSA	MODO
<b>INDEFINIDOS</b>	<b>Iu</b> ALGUNO ALGUIEN	<b>Ia</b> ALGUN ALGUNA	<b>Io</b> ALGO, AL- GUNA COSA	<b>Ies</b> DE ALGUNO	<b>Iom</b> ALGO (CANTIDAD)	<b>Ie</b> EN ALGUN SITIO	<b>Iam</b> ALGUNA VEZ	<b>Iol</b> POR ALGUN MOTIVO	<b>Iel</b> DE ALGUN MODO
<b>INTERROGATIVOS RELATIVOS</b>	<b>Kiu</b> QUIEN EL CUAL EL QUE	<b>Kia</b> QUE CUAL	<b>Kio</b> QUE LO QUE	<b>Kies</b> DE QUIEN CUYO	<b>Kiom</b> CUANTO	<b>Kie</b> DÓNDE	<b>Kiam</b> CUANDO	<b>Kial</b> POR QUÉ	<b>Kiel</b> CÓMO DE QUÉ MODO
<b>DEMOSTRATIVOS</b>	<b>Tiu</b> ÉSE AQUEL	<b>Tia</b> TAL	<b>Tio</b> ESO	<b>Ties</b> DE TAL PERSONA	<b>Tiom</b> TANTO	<b>Tie</b> ALLI, AHI	<b>Tiam</b> ENTONCES	<b>Tial</b> POR ESO	<b>Tiel</b> DE TAL MODO, ASI
<b>COLECTIVOS</b>	<b>Ĉiu</b> CADA UNO TODO	<b>Ĉia</b> CADA	<b>Ĉio</b> TODO	<b>Ĉies</b> DE CADA UNO DE TODOS	<b>Ĉiom</b> EL TODO	<b>Ĉie</b> EN TODAS PARTES	<b>Ĉiam</b> SIEMPRE	<b>Ĉial</b> POR TODA RAZON	<b>Ĉiel</b> DE TODOS MODOS
<b>NEGATIVOS</b>	<b>Neniu</b> NADIE NINGUNO	<b>Nenia</b> NINGUN NINGUNA	<b>Nenio</b> NADA	<b>Nenies</b> DE NADIE	<b>Nentom</b> NADA EN ABSOLUTO	<b>Nenie</b> EN NINGUN SITIO	<b>Neniam</b> NUNCA	<b>Nenial</b> POR NINGUN MOTIVO	<b>Nentel</b> DE NINGUN MODO

# LA ESPERO

(Himno esperantista)

En la mondon venis nova sento,  
Tra la mondo iras forta voko;  
Perflugiloj de facila vento  
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta  
Ĝi la homan tiras familion:  
Al la mond' eterne militanta  
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero  
Kolektigas pacaj batalantoj,  
Kaj rapide kreskas la afero  
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaro,  
Inter la popoloj dividitaj;  
Sed dissaltos la obstinaj baroj,  
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,  
Komprenante unu la alian,  
La popoloj faros en konsento  
Unu grandan rondon familian

Nia diligenta kolegaro  
En laboro paca ne lacigos,  
Ĝis la bela songo de l' homaro  
Por eterna ben' efektiviĝos.

L. ZAMENHOF.

# ENHAVO

	Paĝo
Prefacio e Instrucoes . . . . .	3
1. Artikoio. Substantivo. Verbo. Personaj pronomoj. (Mi, etc.) Kiu, kio. Elparolo, akcento. Sufikso ; -in-	5
2. Adjectivo. Sufikso : -ist-. Prefikso : mal-	10
3. Personaj pronomoj : ni, ili kaj ilia, akuzativo. Pluralo de la substantivoj kaj adjektivoj. Kie. Koloroj	14
4. Kia. Sufikso : -ej-. La akuzativo. Estinta tempo (-is). Imperativo (-u). Pri Adamo kaj Evo	19
5. Kun Per. Genitivo (de). Sufikso : -il-. Poseda pronomo (mia etc.). La numeraloj. Infinitivo (-i). Pri la kapo	25
6. Korpopartoj. Kie, ĉi tie ktp. Sufiksoj : -eg-, -et-. La futuro : -os. Kial	31
7. Kiel. La adverbo : -e. Sufikso : -ebl-. Komparo. Pri la jaro	36
8. De, al. Sufiksoj : -id-, -ig-. Pri bestoj. La muta edzino	40
9. Prepozicioj kun akuzativo Kien. Kondiĉa formo : -us. Prefikso : ge-, sufikso : -ar-	45
10. Sufiksoj : -ec-, -em-, -an-. Prefikso : bo-. Anekdotoj pri la maljuneco kaj bopatrino	49
11. Sufikso : -ul-, Prefikso : eks-. La aktivaj participoj : -ant-, -int-, -ont-. Pri la hotentota korespondantino	53
12. Kiam. Pasivaj participoj : -at-, -it-, -ot-. Prefikso : pra-. Aritmetikaj funkcioj. Anekdoto pri la knabo kaj doktoro	58
13. Sufiksoj : -uj-, -aj-, -ing-. Prefikso : dis-. Kiom. Kioma. Prepozicio : je. La sezonoj	62
14. Sufiksoj : -iĝ-, -aĉ-. Prefiksoj : fi-, mis-. Ju . . . des . . . Pri Esperanto	68
15. Sufiksoj : -ad-, -ind-. Prefikso : ek-. La vortoj : da, po. Anekdoto pri la statuo	73
16. Estinta tempo de la kondiĉa formo : estus . . . inta. Sufiksoj : -er-, -op-, -estr-, -um-. Prefikso : re-. Kies. Akuzativo mezura (400 metrojn alta monto). Korelativa tabelo. (Kiu, kio, etc.)	78
Letero al la lerninto	83
Moderna Fabelo (Szilágyi)	84
Ho, mia kor' (Zamenhof)	85
Kanto de l'Vagabondo (Baghy)	85
Aforismoj (Schwartz)	85
Pri la Unua Esperanto-kongreso (Privat)	86
Dornrozeto (Goethe—Kalocsay)	86
En la Arbaro Val'a (Vajda—Szilágyi)	87
Miniaturo (Södergren—Carlsson)	87
Flirtas Haga Papilio (Bellman—Malmgren)	87
Pensoj	87
Tabelo pri la Prefiksoj kaj Sufiksoj	88
Vocabulario	90
Cuadro de voces correlativeas	97
Himno esperantista	98

Este libro se terminó de imprimir el 30 de Marzo  
de 1970 en la Imprenta Publigráf - Gariboldi S. R. L.,  
Riña 887 - Rosario